HUNGARA VIVO

4
1985
16,-Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemoraĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Vaskó Tibor. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség Házi Sokszorosítójában. Felelős vezető: Szabó Imre. Budapest, 1985. július. Törzsszám: hearota 85-021ĵ. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben ös a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft , fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII.Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVa jaro, 1985 n-ro 4
(122)

ENHAVO

Virinoj en Hungario 122
Fenyvesi E.: Esperantistino sur la monda pinto de virina ŝako 124
László I.: Departemento Zala 126
Benczik V.: Ducent horoj trans la Granda Muro 128
Ĉiutagaj radiodissendoj en Esperanto 131
Szenes I.: Pri la neceso de la internacia lingvopolitiko 132
Gozsdu E.: Ultima ratio (*József Kiss*) 134
Hungara Poezio 137
Mihalkov, G.: Eŭgeno Miĥalski – la unua individua voĉo en la Esperanto-poezio 138
Panoramo 140
Karinthy F.: Geniulo *(I. Nagy)* 142
Fenyvesi E.: Revuo de revuoj 143
Bálint Sz.: La revido 144
Beŝŝenyei T.: La historio de la teo 145
Nemere I.: La trezoro 4. 146
Bérci Darázs 70-jara 148
Originala Poezio 149
D-ro Hevesy G.: Pri la uzo de la pronomoj 150
La Fridteknika Industria Kooperativo 30-jara (*E. Fenyvesi*) 152
Desegnaĵoj de Jenő Dallos 157
Fenyvesi E.: Gaja paĝo 158
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Leterkesto, Korespondi deziras 160

Sur la frontpaĝo: foto de Z. Fejér

Virinaj temoj...

enkondukas tiun ĉi numeron de HV. Jam sur la frontpaĝo oni renkontas foton de junulino, kaj sur la sekva paĝoparo analizan artikolon pri la situacio de virinoj en la hungara socio. La elstarajn kapablojn de virinoj pruvas la intervjuo kun Susana *Polgár*, 15-jara knabino, kiu posedas la titolon de *vira internacia ŝakmajstro*. Ankaŭ ŝiaj du fratinoj – Judit kaj Sofia – havantaj ankoraŭ nur 10, respektive 8 jarojn, atingas atentindajn rezultojn en la ŝakludado. Kaj ĉiuj tri knabinoj estas esperantistoj.

Imre *Szenes* artikolas pri la neceso de internacia lingvopolitiko, aperas dua parto de la artikolo „Ducent horoj trans la Granda Muro", ni prezentas la du radiostaciojn (Pekinon kaj Varsovion), kiuj ĉiutage dissendas en Esperanto.

Literaturamantoj trovos en tiu ĉi numero poemojn originalajn kaj tradukitajn, filozofian novelon de la hungara aŭtoro Elek *Gozsdu*, kaj la eseon de Georgi *Mihalkov* pri la soveta esperantista poeto Eŭgeno *Miĥalski*. Daŭras la felietona romano de István *Nemere* – ĉu oni trovos la trezoron? D-ro Georgo *Hevesy* eseas pri la uzado de la Esperantaj pronomoj – liaj konsiloj estas tre praktikaj kaj akceptindaj.

Ekde nun en ĉiu numero ni aperigos daŭrigendan rakonton: montriĝis, ke multloke oni utiligas tiujn en la lingvoinstruado – fakte la verkado de daŭrigoj estas tre amuza formo de lingva ekzercado.

Ŝatantoj de la grafikarto certe volonte vidos la ne nepre ridigajn, amarajn karikaturojn de la hungara artisto Jenő *Dallos*. Tiujn sekvas la kutimaj rubrikoj, kaj jen, tio estas la 122-a numero de Hungara Vivo...

VIRINOJ EN HUNGARIO

UN proklamis la jaron 1975 „La Jaro de la Virino". Sed baldaŭ konferenco, aranĝita sub la aŭspicioj de UN en Meksikurbo, trovis ke unu jaro tute ne sufiĉas por plenumi eĉ onon de la farendaĵoj, necesaj por plibonigi la situacion de virinoj. Tial oni decidis nomi la periodon 1975-84 „La Jardeko de la Virino". Kiel devizon de la jardeko oni elektis: „Egaleco, progreso, paco."

La virina movado en Hungario

La unua virina organizaĵo estis fondita en Hungario en la jaro 1904 kun la nomo „Hungarlanda Laboristina Unuiĝo". Ĝin iniciatis Mariska Gárdos, elstara figuro de la hungara laborista movado, kiu naskiĝis en la jaro 1885, kaj la centjaran datrevenon de ŝia naskiĝo vaste oni festas en Hungario.

La ĉefa celo de tiu unua virina organizaĵo estis la atingo de politika egaleco por la virinoj. Tio estis la centra slogano de la unua virintaga demonstracio, kiu okazis en la jaro 1914; sed, kompreneble, ne mankis ankaŭ ekonomiaj celoj, kiujn esprimis la devizo „Por egala laboro egalan salajron!"

Judit Csehák, vicĉefministro, la sola virino en la registaro

Dum la revolucia periodo en la jaroj 1918-19 la virina movado atingis signifajn sukcesojn, sed la sekvaj 25 jaroj de la kontraŭrevolucia reĝimo nuligis tiujn atingaĵojn. De tempo al tempo estis leĝe limigita la proporcio de virinoj, akcepteblaj al universitataj fakultatoj (ordinare je 30 procentoj), en la morala edukado estis aplikita hipokrita severeco, ktp.

Virinoj troveblas en ĉiu laborloko



Post la liberiĝo en la jaro 1945 la atingo de la jura, ekonomia kaj kultura egaleco de la virinoj fariĝis iom post iom parto de la ŝtata programo. La virina movado havis dum la pasintaj kvardek jaroj variajn organizajn formojn: nun la centra organo de la movado estas Nacia Konsilio de Hungaraj Virinoj. Aperas pluraj gazetoj, kiuj popularigas la celojn de la virina movado, inter ili la plej granda estas la semajngazeto *Nok Lapja* (Gazeto de Virinoj), kies eldonkvanto estas ĉ. unu miliono, kaj ĝi estas sendube la plej populara familia bildgazeto en Hungario.

Politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj

Virinoj ricevis ĝeneralan balotrajton nur en la jaro 1945. Unu jaron poste oni likvidis ĉiujn limigojn, kiuj koncernis la studadon de virinoj en altlernejoj kaj universitatoj.

En rapida ritmo realiĝis la partopreno de virinoj en la produktado. En la jaro 1970 41%, en 1985 46% de la virinoj en laborkapabla aĝo trovis dungiĝon.

En kelkaj profesioj la proporcio de virinoj estas aparte alta: 65% de vendistoj, 79% de bazlernejaj instruistoj kaj 44% de kuracistoj estas virinoj. Tiuj altaj proporcioj naskas ankaŭ problemojn diversajn — unu el la celoj de la virina movado estas ĝuste mildigi tiujn problemojn.

Laboro kaj familiaj devoj

Grava dilemo por la laborantaj virinoj estas la akordigo de familiaj kaj laboraj devoj. En la hungaraj familioj la plimulto de la familiaj devoj ŝarĝas la virinojn: viroj nesufiĉe partoprenas en la hejmaj laboroj, edukado de infanoj ktp. Virino, kiu volas fari plenvaloran laboron en sia posteno kaj scii en ordo ankaŭ sian hejmon, devas fari duoblan laboron.

Dum la lastaj jaroj tiu dilemo pliakriĝis pro la stagnado de la vivnivelo

kaj la altiĝo de prezoj. Estas menciinde, ke la prezaltiĝo estis la plej rimarkinda en la sfero de servoj kaj de prilaboritaj (telerpretaj) manĝaĵoj. Sekve la plej multaj familioj devis parte aŭ tute rezigni pri ili, kio grave plimultigis la hejme farendajn laborojn.

Virinoj kaj infanoj

Havi infanojn estas la natura deziro de ĉiu sana virino, kaj la hungara familiopolitiko intense subtenas tiun deziron de virinoj. Por certigi la harmonian edukiĝon de la infanoj dum la unuaj jaroj de ilia vivo, post la nasko ĉiu patrino dum tri jaroj povas resti hejme kun la infano, ricevante de la ŝtato monan subtenon, kiu dum la unuaj kvar monatoj egalas al ŝia plena salajro, poste ordinare varias inter ties 20–40%. (Ĉe infanoj 1-3 jaraj laŭ familia decido povas resti kun la infano ĉu la patrino, ĉu la patro.) Post tri jaroj la patrino (aŭ la patro) nepre rehavas sian pli fruan postenon. Se infano malpli ol 10-jara malsaniĝas, la patrino (aŭ la patro) povas resti kun li aŭ ŝi hejme, ricevante la saman kompenson, kvazaŭ ŝi aŭ li mem estus malsana.

Se iu virino tamen ne volas resti hejme kun sia infano ĝis ties tria jaro, eblas loki la infanon en infanvartejoj: aktuale 15,7% de la infanoj 0–3 jaraj estas lokitaj tie. En la infanvartejoj unu vartistino prizorgas averaĝe ses infanojn.



Ankaŭ tekniko ne estas fremda al virinoj

En infanĝardenoj trovas lokon 87% de la infanoj 3–6 jaraj. Tie unu vartistino prizorgas averaĝe 14 infanojn.

La pago por la prizorgado en infanvartejo aŭ infanĝardeno estas simbola; ĝi dependas de la familia enspezo, sed eĉ la plej alta pago por tago estas nur ĉ. 8% de la averaĝa tagsalajro.

Restas ankoraŭ farendaĵoj

La atingoj sur la kampo de egalrajtigo de virinoj estas imponaj, tamen restas ankoraŭ farendaĵoj.

Estas maltrankviliga fenomeno, ke malgrandiĝas la socia prestiĝo de profesioj, kie altiĝas la proporcio de virinoj, kaj tio respeguliĝas ankaŭ en la salajroj.

La salajroj de virinoj 20–25% estas malpli altaj ol tiuj de viroj. Tio ordinare sekvas el la malpli alta instruiteco de virinoj, sed tre ofte virinoj ricevas malpli altan salajron simple pro tio, ĉar ili estas virinoj.

Vane virinoj havas egalajn politikajn kaj kulturajn rajtojn, se tiuj rajtoj ne realiĝas en la praktiko. Ekz. nur 23% de la virinoj, farantaj fizikan laboron, posedas faklaboristan kvalifikon (ĉe viroj tiu proporcio estas ĉ. duobla), en la registaro troviĝas nur unu virino (vic-ĉefministro), la Politburoo de la Partio tute ne havas virinan membron, kaj ankaŭ en la Parlamento kaj la Centra Komitato de la Partio la proporcio de virinoj estas nekontentiga. Inter mezaj gvidantoj la situacio estas pli bona, sed restas abundaj taskoj por la virina movado kaj la tuta hungara socio ankaŭ dum la sekvaj jaroj kaj jardekoj.



La etuloj

admire aŭskultas

la vortojn de la vartistino

en la infanĝardeno

Esperantistino sur la monda pinto de la virina ŝako

Ankoraŭ gimnazia lernantino, la eta *Susana Polgár* altiris al si la atenton de la ŝakista mondo. Ankoraŭ 15-jaraĝa, ŝi sinsekve jam du fojojn suprenkuris al la *unua loko de la monda ranglisto.* Tiun eldonas la Internacia Ŝakista Federacio (FIDE), kalkulante la akiritajn poentojn de la ŝakistinoj. Pasintjare atribuis al ŝi la internacia federacio la altan titolon: *vira internacia majstro,* kiu estas ega escepto inter ŝakistinoj. Ŝi estas esperantistino.

Ĉio ĉi kompreneble venis post abundo de antaŭaj sukcesoj. Ankaŭ ŝakistoj devas de ŝtupo al ŝtupo paŝi supren, se ili volas regi ĉampione la artajn kombinojn de la movoj, la atakan-defendan strategion de sia liliputa armeo. La ŝakteorio jam grandioze riĉiĝis, la lernendaj komplikaĵoj iĝis nekredeble disbranĉiĝintaj, kaj tamen, elstara ŝakisto devas enkapigi ĉiujn branĉetojn de la multegaj situacioj. Alie la kontraŭulo havos avantaĝon, kaj la ludo estos perdita. Kiu volas venki sur la ŝaktabulo, tiu ne povas permesi al si surpriziĝi eĉ en la plej neatendita situacio.

Susana en la aĝo de 13 jaroj jam akiris la titolon de „vira majstro", eksterordinara afero eĉ inter la multaj hungaraj viraj ŝakistoj. Estinta 12-jara, en internaciaj virinaj turniroj ŝi superis grandmajstrinojn, kaj plenumis la normojn de ĉiuj majstro-titoloj por ŝakistinoj. Oni povus diri, ke tio ne estis por ŝi malfacila – ja, ŝi havis ankoraŭ 10 jarojn, kiam oni registris ŝin „virina ŝakmajstro". Neniam antaŭe okazis io simila! Kompreneble ŝi daŭre staris je la pinto de la Hungarlanda ranglisto de la ŝakistinoj. Tio estis des pli klara, ĉar tiutempe ŝi ofte venkis eĉ dum viraj turniroj, kaj konkursis kun multe da sukceso sur la gvidaj tabuloj de la ĉampionteamo MTK-VM.

Ĉu tiu surprizega ŝak-kariero progresos, kaj ĝis kiu grado, tiurilate la respondon ni ricevos dum la venontaj jaroj. Kaj tre verŝajne, ŝiaj konkurantoj, kiuj eventuale superos ŝiajn sukcesojn, troveblas ene de ŝia familio. Ili daŭre lernas unu de la alia kiel bonaj fratinoj, neniam inter ili aŭdeblas kverela vorto. *Judit,* ankoraŭ 8-jara, jam eminente ludas eĉ „fulmrapidajn" partiojn, kaj kune kun la 10-jara *Sofia,* ofte akiris unuajn lokojn de „fulmturniroj" (5-minuta pripensado permesata) inter „grandaj" konkursantoj.

– *Kio estas la ŝlosilo de la eksterordinaraj rezultoj de viaj filinoj? – mi demandis ilian patron, László Polgár, psikologo-pedagogon.*

– La ŝlosilo troveblas verŝajne en nia bone bazita eduksistemo. Ankaŭ mia edzino estas mezlerneja instruistino pri la germana, rusa kaj Esperanto lingvoj. Nia celo estas pleje disvolvi la kapablojn, kiujn havas niaj filinoj. Certe, ni faras tion laŭ speciala maniero: ni lasas ilin elekti kion ili volas fari, ĉar ni fidas je ili. Tamen ni klopodas krei la cirkonstancojn por tiu elektado, fakte tiamaniere ni influas ilin. Jam en la aĝo de 4-5 jaroj ni kondukis ilin al la „serioza ludado", por ke ili ekkonu la plezurojn de la scio, de la malkovrado kaj pensado.

– *Tiel frue, ĉu ĝi ne estis troa ŝarĝo?*

– Por ili tute ne. Evidentiĝis – ankaŭ niaj infanoj rimarkis –, ke eĉ la plej etaj rezultoj havas bonajn efikojn je ili. Kreskis iliaj emoj kaj fervoro, ankaŭ la celkonscia volo por plenumi taskojn. Kaj ili alkutimiĝis mem decidi kion ili faros, lernos, ankaŭ krei la propran opinion ĉiurilate, eĉ pri si mem. Ni vidas, ke kreiĝas bonega fundamento por ilia homa aŭtonomio. Ili havas multajn geamikojn tra la mondo, precipe ŝakludantojn. Multe ili korespondas, ankaŭ Esperantlingve. Mi devas aldoni, ke depost kiam ili ekkonis la ŝakludon – tio okazis kiam ili atingis la aĝon de 4-5 jaroj – ilia preferata ludo iĝis la nigra-blanka tabulo. Ili mem decidas kompreneble, kiam kaj kiel ili ludas ŝakon, kaj kun kiu. Krom ĝi ili ŝatas la pilkludojn kaj volas ofte ekskursi en la naturon, kiun ili tutkore ĝuas. Jam frue ili sciis skribi, legi kaj kalkuli, kaj avide ili legis ŝaklibrojn kaj la ŝakrubrikojn en la infanaj kaj ceteraj gazetoj. Baldaŭ ili eĉ ne prenis ŝaktabulon: estis granda travivaĵo por ili, ke oni povas ŝakludi ankaŭ blinde, sole laŭ memoro. Ni, gepatroj, vere admiras ilin, pro la kapablo ludi en sesjara aĝo blindpartiojn, eĉ simultanojn! La rapidpartiojn ili aparte ĝuas.

Susana, Judit kaj Sofia (Foto de Z. Fejér)

– *La internacia ŝakliteraturo estas ege vasta en multaj lingvoj. Ĉu vi kapablas studi sufiĉe da ili? – mi demandas Susanan.*

– Mi lernis frutempe Esperanton de mia patrino, poste aldoniĝis la germana kaj la rusa lingvoj. Oni ofte in-

kaj la altiĝo de prezoj. Estas menciinde, ke la prezaltiĝo estis la plej rimarkinda en la sfero de servoj kaj de prilaboritaj (telerpretaj) manĝaĵoj. Sekve la plej multaj familioj devis parte aŭ tute rezigni pri ili, kio grave plimultigis la hejme farendajn laborojn.

V irinoj kaj infanoj

Havi infanojn estas la natura deziro de ĉiu sana virino, kaj la hungara familiopolitiko intense subtenas tiun deziron de virinoj. Por certigi la harmonian edukiĝon de la infanoj dum la unuaj jaroj de ilia vivo, post la nasko ĉiu patrino dum tri jaroj povas resti hejme kun la infano, ricevante de la ŝtato monan subtenon, kiu dum la unuaj kvar monatoj egalas al ŝia plena salajro, poste ordinare varias inter ties 20–40%. (Ĉe infanoj 1-3 jaraj laŭ familia decido povas resti kun la infano ĉu la patrino, ĉu la patro.) Post tri jaroj la patrino (aŭ la patro) nepre rehavas sian pli fruan postenon. Se infano malpli ol 10-jara malsaniĝas, la patrino (aŭ la patro) povas resti kun li aŭ ŝi hejme, ricevante la saman kompenson, kvazaŭ ŝi aŭ li mem estus malsana.

Se iu virino tamen ne volas resti hejme kun sia infano ĝis ties tria jaro, eblas loki la infanon en infanvartejoj: aktuale 15,7% de la infanoj 0–3 jaraj estas lokitaj tie. En la infanvartejoj unu vartistino prizorgas averaĝe ses infanojn.



Ankaŭ tekniko ne estas fremda al virinoj

En infanĝardenoj trovas lokon 87% de la infanoj 3–6 jaraj. Tie unu vartistino prizorgas averaĝe 14 infanojn.

La pago por la prizorgado en infanvartejo aŭ infanĝardeno estas simbola; ĝi dependas de la familia enspezo, sed eĉ la plej alta pago por tago estas nur ĉ. 8% de la averaĝa tagsalajro.

Restas ankoraŭ farendaĵoj

La atingoj sur la kampo de egalrajtigo de virinoj estas imponaj, tamen restas ankoraŭ farendaĵoj.

Estas maltrankviliga fenomeno, ke malgrandiĝas la socia prestiĝo de profesioj, kie altiĝas la proporcio de virinoj, kaj tio respeguliĝas ankaŭ en la salajroj.

La salajroj de virinoj 20–25% estas malpli altaj ol tiuj de viroj. Tio ordinare sekvas el la malpli alta instruiteco de virinoj, sed tre ofte virinoj ricevas malpli altan salajron simple pro tio, ĉar ili estas virinoj.

Vane virinoj havas egalajn politikajn kaj kulturajn rajtojn, se tiuj rajtoj ne realiĝas en la praktiko. Ekz. nur 23% de la virinoj, farantaj fizikan laboron, posedas faklaboristan kvalifikon (ĉe viroj tiu proporcio estas ĉ. duobla), en la registaro troviĝas nur unu virino (vic-ĉefministro), la Politburoo de la Partio tute ne havas virinan membron, kaj ankaŭ en la Parlamento kaj la Centra Komitato de la Partio la proporcio de virinoj estas nekontentiga. Inter mezaj gvidantoj la situacio estas pli bona, sed restas abundaj taskoj por la virina movado kaj la tuta hungara socio ankaŭ dum la sekvaj jaroj kaj jardekoj.

La etuloj

admire aŭskultas

la vortojn de la vartistino

en la infanĝardeno

Esperantistino sur la monda pinto de la virina ŝako

Ankoraŭ gimnazia lernantino, la eta *Susana Polgár* altiris al si la atenton de la ŝakista mondo. Ankoraŭ 15-jaraĝa, ŝi sinsekve jam du fojojn suprenkuris al la *unua loko de la monda ranglisto.* Tiun eldonas la Internacia Ŝakista Federacio (FIDE), kalkulante la akiritajn poentojn de la ŝakistinoj. Pasintjare atribuis al ŝi la internacia federacio la altan titolon: *vira internacia majstro,* kiu estas ega escepto inter ŝakistinoj. Ŝi estas esperantistino.

Ĉio ĉi kompreneble venis post abundo de antaŭaj sukcesoj. Ankaŭ ŝakistoj devas de ŝtupo al ŝtupo paŝi supren, se ili volas regi ĉampione la artajn kombinojn de la movoj, la atakan-defendan strategion de sia liliputa armeo. La ŝakteorio jam grandioze riĉiĝis, la lernendaj komplikaĵoj iĝis nekredeble disbranĉiĝintaj, kaj tamen, elstara ŝakisto devas enkapigi ĉiujn branĉetojn de la multegaj situacioj. Alie la kontraŭulo havos avantaĝon, kaj la ludo estos perdita. Kiu volas venki sur la ŝaktabulo, tiu ne povas permesi al si surpriziĝi eĉ en la plej neatendita situacio.

Susana en la aĝo de 13 jaroj jam akiris la titolon de „vira majstro", eksterordinara afero eĉ inter la multaj hungaraj viraj ŝakistoj. Estinta 12-jara, en internaciaj virinaj turniroj ŝi superis grandmajstrinojn, kaj plenumis la normojn de ĉiuj majstro-titoloj por ŝakistinoj. Oni povus diri, ke tio ne estis por ŝi malfacila – ja, ŝi havis ankoraŭ 10 jarojn, kiam oni registris ŝin „virina ŝakmajstro". Neniam antaŭe okazis io simila! Kompreneble ŝi daŭre staris je la pinto de la Hungarlanda ranglisto de la ŝakistinoj. Tio estis des pli klara, ĉar tiutempe ŝi ofte venkis eĉ dum viraj turniroj, kaj konkursis kun multe da sukceso sur la gvidaj tabuloj de la ĉampionteamo MTK-VM.

Ĉu tiu surprizega ŝak-kariero progresos, kaj ĝis kiu grado, tiurilate la respondon ni ricevos dum la venontaj jaroj. Kaj tre verŝajne, ŝiaj konkurantoj, kiuj eventuale superos ŝiajn sukcesojn, troveblas ene de ŝia familio. Ili daŭre lernas unu de la alia kiel bonaj fratinoj, neniam inter ili aŭdeblas kverela vorto. *Judit,* ankoraŭ 8-jara, jam eminente ludas eĉ „fulmrapidajn" partiojn, kaj kune kun la 10-jara *Sofia,* ofte akiris unuajn lokojn de „fulmturniroj" (5-minuta pripensado permesata) inter „grandaj" konkursantoj.

– Kio estas la ŝlosilo de la eksterordinaraj rezultoj de viaj filinoj? – mi demandis ilian patron, László Polgár, psikologo-pedagogon.

– La ŝlosilo troveblas verŝajne en nia bone bazita eduksistemo. Ankaŭ mia edzino estas mezlerneja instruistino pri la germana, rusa kaj Esperanto lingvoj. Nia celo estas pleje disvolvi la kapablojn, kiujn havas niaj filinoj. Certe, ni faras tion laŭ speciala maniero: ni lasas ilin elekti kion ili volas fari, ĉar ni fidas je ili. Tamen ni klopodas krei la cirkonstancojn por tiu elektado, fakte tiamaniere ni influas ilin. Jam en la aĝo de 4-5 jaroj ni kondukis ilin al la „serioza ludado", por ke ili ekkonu la plezurojn de la scio, de la malkovrado kaj pensado.

– Tiel frue, ĉu ĝi ne estis troa ŝarĝo?

– Por ili tute ne. Evidentiĝis – ankaŭ niaj infanoj rimarkis –, ke eĉ la plej etaj rezultoj havas bonajn efikojn je ili. Kreskis iliaj emoj kaj fervoro, ankaŭ la celkonscia volo por plenumi taskojn. Kaj ili alkutimiĝis mem decidi kion ili faros, lernos, ankaŭ krei la propran opinion ĉiurilate, eĉ pri si mem. Ni vidas, ke kreiĝas bonega fundamento por ilia homa aŭtonomio. Ili havas multajn geamikojn tra la mondo, precipe ŝakludantojn. Multe ili korespondas, ankaŭ Esperantlingve. Mi devas aldoni, ke depost kiam ili ekkonis la ŝakludon – tio okazis kiam ili atingis la aĝon de 4-5 jaroj – ilia preferata ludo iĝis la nigra-blanka tabulo. Ili mem decidas kompreneble, kiam kaj kiel ili ludas ŝakon, kaj kun kiu. Krom ĝi ili ŝatas la pilkludojn kaj volas ofte ekskursi en la naturon, kiun ili tutkore ĝuas. Jam frue ili sciis skribi, legi kaj kalkuli, kaj avide ili legis ŝaklibrojn kaj la ŝakrubrikojn en la infanaj kaj ceteraj gazetoj. Baldaŭ ili eĉ ne prenis ŝaktabulon: estis granda travivaĵo por ili, ke oni povas ŝakludi ankaŭ blinde, sole laŭ memoro. Ni, gepatroj, vere admiras ilin, pro la kapablo ludi en sesjara aĝo blindpartiojn, eĉ simultanojn! La rapidpartiojn ili aparte ĝuas.

Susana, Judit kaj Sofia (Foto de Z. Fejér)

– La internacia ŝakliteraturo estas ege vasta en multaj lingvoj. Ĉu vi kapablas studi sufiĉe da ili? – mi demandas Susanan.

– Mi lernis frutempe Esperanton de mia patrino, poste aldoniĝis la germana kaj la rusa lingvoj. Oni ofte in-

vitis min konkursi al Bulgario, kie mi kun granda emo alproprigis la bulgaran lingvon. Tiu ne montriĝis malfacila por mi, ĉar mi multe okupiĝis pri la parenca rusa lingvo, ja mi studadis la sovetajn ŝaklibrojn kaj revuojn, eĉ paroli mi havis ofte eblon dum konkursoj en Moskvo, ankaŭ kun la plej eminentaj ŝakistoj de la mondo. Restos neforgeseble por mi, kiam la eksmondĉampiono Tal, aŭdinte mian nomon, ne nur alparolis min, sed li eĉ ekludis kun mi rapidpartiojn. „Se vi venkas ĉi tie niajn majstrojn are – li diris –, tiam ankaŭ mi elprovos vian forton." Kaj ni ludis sufiĉe longdaŭre.

Esperanto helpis min kiel bazo por lerni aliajn lingvojn. Dum kelkaj monatoj mi ellernis ekzemple la anglan ĝis tia grado, ke nun bone komprenas la anglalingvajn ŝaklibrojn kaj la abonitajn fakrevuojn. Post la printempe organizita grandioza turniro en Novjorko, – kie mi kaj la altprestiĝa Cramling, sveda ŝakistino, atingis samgrade bonajn poziciojn inter la eminentaj konkursantoj – tiea televido-kompanio invitis min por pluraj prelegoj ĉiaŭtune – fakte por komentarii la finalon de la mondĉampionado inter Karpov kaj Kasparov. Mi devas konfesi, ke tiu tasko, vere honoriga, ege surprizis min.

– *Certe vi partoprenis jam turnirojn de Esperanto-organizafoj, ĉu ne?*

– Memkompreneble, plurfoje mi ludis dum tiuj, ekzemple en Ĉeske Budejovice, Varna, Targoviŝte, kaj aliloke. Ankaŭ Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI) ne malofte organizas tiajn. Miaj fratinoj nun preparas sin por la turniro de E-ŝakistoj en Weimar, GDR. Cetere, kie ajn mi konkursas, mi renkontiĝas kun geamikoj-esperantistoj, ja mi havas tutmonde multajn. Mi sukcese konvinkis jam plurajn gravajn ŝakistojn, eĉ grandmajstrojn pri la utileco de la Internacia Lingvo. Jam Esperante ni interparolas...

– Susana volonte verkas fakajn artikolojn – menciis ŝia patro. – Ŝi redaktas jam ŝakrubrikon por magazino, eĉ verkas faklibrojn. Kelkaj estas jam pretaj en manuskripto. La Scienca Eldona Centro de UEA pretas eldoni tiun, kiun ŝi verkis en Esperanto.

– *Mi povas nur gratuli, kara Susana, pro la alta sukceso: dufoje stari sur la pinto de la virina ranglisto de la mondo en via aĝo! Interese, aŭdeblis ankaŭ riproĉoj, ĉar vi konkursas nur en viraj turniroj!*

– Estas bedaŭrinda afero, ke por virinoj oni organizas apartajn turnirojn. Tio kontraŭdiras la principon de la virina egalrajteco. Superflue mencii, ke virinoj laboras en multaj sferoj kune, en la samaj vicoj kie la viroj. Rigardu la lernejojn, universitatojn, eĉ plurajn sportobranĉojn, ankaŭ la konkursojn de la stenografistoj. Virinoj havas egalajn kapablojn por la intelektaj agadoj. Kompreneble, se virino volas atingi rezultojn similajn al tiuj de la viroj, ankaŭ ŝi devas „trejni" sin kaj toleri similajn kondiĉojn kiel la viroj. Sed tio plene eblas.

Cetere mi, kiu – bone kompreneble – preferas la pli fortajn kontraŭulojn kaj la malfacilajn konkursojn, pretas ludi kun virinoj. Dum majo mi faris sukcesplenan simultanludon en Vieno kontraŭ membroj de la Aŭstria nacia virina teamo. Mi venkis ĉiujn dek ŝakistinojn, kvankam ili montris altajn ludkapablojn. Nun, en la plej frua ranglisto, mi troviĝas sur la 2a loko, kelkajn poentojn post la soveta mondĉampionino Ĉiburdanidze, kaj min sekvas Cramling.

– *La legantoj de Hungara Vivo interesiĝos ankaŭ pri viaj lastatempaj ŝakrezultoj, dum turniroj!*

– Sporta vivo bezonas preskaŭ senĉese konkursadon, ja tio pruviĝas la plej taŭga trejnado. Kaj mian vivon – krom la gimnazia lernado, pri kiu mi tre bone sukcesas – plenigas mia vera pasio, la ŝakludo. Turniroj tre altiras min, ju pli malfacilaj ili ŝajnas pro la „timigaj" konkursantoj, des pli mi preferas ilin. Kiel membro de la hungara ĉampionteamo, ĉi-jare mi venkis 5-foje el ok partioj, la restintaj iĝis sendecidaj. Tio signifas tre altan, pli ol 80%-an sukceson. En Budapeŝto okazis nekutima, altgrada turniro de 20 majstroj, kun templimo de nur 30 minutoj. En ĝi mi havis la unuan lokon antaŭ la hungara vira eksĉampiono Forintos kaj internacia majstro Petrán. Sed mi ne volas preterlasi miajn etajn fratinojn, kiuj eminente partoprenas la ĉampionadon de junulaj teamoj (ĝis 21-jaraj). Tie Judit triumfis en ĉiuj 6 partioj, Sofia el la ses gajnis kvar partiojn. Sed ŝi estas ankoraŭ nur 8-jara...

– *Kiam mi venis al via familia hejmo, vi analizis partiojn kun via trejnisto. Laŭ miaj konoj, tion oni faras precipe antaŭ gravaj turniroj tiel diligente. Ĉu vi dirus, kara Susana, iom pri viaj sekvontaj konkursoj?*

– Vere, nuntempe mi devas sisteme analizi multajn partiojn de la venontaj kontraŭuloj, kaj ili ne estas malmultaj! Baldaŭ mi ekveturos kun mia patrino al la Federacia Respubliko Germanujo, kien mi estas invitita konkursi en pluraj grandaj urboj inter multaj grandmajstroj. Same mi konkursos en Amsterdamo. Ne estos facila afero, sed mi faros kion mi kapablos, espereble mi havos interesajn, eĉ belajn partiojn. Kiel mi menciis, mi flugos al Novjorko por televido-prezentadoj. Reveninte mi partoprenos fortajn turnirojn en Bruselo, Hamburgo kaj aliaj urboj en FRG, ankaŭ en Vieno. Tiel okazos verŝajne ĝis la fino de la jaro. Vi ne demandis, sed mi mencias, ke Judit kaj Sofia kun granda plezuro partoprenos denove rapidkonkursojn, kie ili kutimas inter plenaĝuloj atingi elstarajn lokojn, ofte ili eĉ triumfas. Cetere okazis foje, ke ni triope akiris la unuajn tri lokojn inter viroj. Nu, pri tiuj okazoj vi povis legi en la hungaraj ĵurnaloj, kiam ili publikigis informojn pri la rezultatoj. Ni ŝatas ja la seriozajn fortostreĉojn, kaj la rapidturniroj nepre postulas ĝin de ĉiu ajn.

– Miaj filinoj vivas feliĉan, agrablan infanaĝon – prenas la vorton denove s-ano Polgár. – Ververe, ĉiutage ili ĝuas sian intelektan evoluon. Plezuron kaj ĝojon ili ĉerpas kaj el la ŝakludo, kaj el la multe ŝatata Esperanto, kiun uzi-utiligi ili neniam preterlasas, se nur iomete tio eblas. Ni, gepatroj instigas ilin elekti realajn celojn, vivi kiel sporton ŝatantaj kaj honestaj homoj.

E.F.

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Zala



Preĝejo en Velemér

Jen, tiu ĉi departemento estas la sudokcidenta angulo de Hungario. Geografie ĝi montras la varian buntecon de la pejzaĝoj Transdanubiaj, t.e. alternas mildaj montetoj kaj valoj. Riveretoj, etaj lagoj formas la akvan provizon de la ĉirkaŭaĵo, kaj la arbaroj, troviĝantaj ĉie en la departemento, ofertas riĉajn ekskurseblojn por naturamikoj.

La departemento Zala ĝis la lastaj tempoj estis malmulte konata eĉ de hungaroj. Sed depost kelkaj jaroj ĉiam pliiĝas la interesiĝo koncerne la belajn pejzaĝojn de la departemento. La fremdultrafikaj oficejoj per diligenta laboro malkovras la turismajn vidindaĵojn de la teritorio.

Ekirante de la norda rando, menciindas la nomo de la vilaĝo *Egervár* (egervaar). La unua mencio pri ĝi en malnovaj dokumentoj devenas el la dektria jarcento. La tiama nomo „Castrum Egerwar" aludas pri la iama regado de la Romianoj. Dum la liberbatalo de Ferenc Rákóczi (1703-1711) la burgo de la vilaĝo havis gravan rolon. Hodiaŭ en la burgo funkcias turista hotelo kaj ĝia korto ĉiusomere donas hejmon por muzikaj, teatraj aranĝaĵoj.

Zalaszentgrót (zalasentgroot) estas granda vilaĝo, ĝi fariĝis konata precipe per siaj ekleziaj artmemoraĵoj. Ĝia barokstila romkatolika preĝejo konstruiĝis meze de la dekoka jarcento kaj ene ĝi havas plurajn gotikajn artobjektojn.

En la kastelo de la familio Batthyány hodiaŭ funkcias kuracpedagogia instituto.

La ĉefloko kaj administra centro de la departemento estas *Zalaegerszeg* (zalaegerseg), kun 60 000 loĝantoj. Ĝi

Vilaĝa muzeo en Zalaegerszeg

situas apud la rivero Zala. Per fervojo kaj aŭtobuslinioj la urbo havas bonajn vetureblojn al ĉiuj direktoj de la lando.

La historiaj fontoj mencias ĝian nomon ekde la dektria jarcento. Dum la turka invado (16-18a jarcentoj) ĉirkaŭ la urbo oni konstruis lim-burgon, ŝirmitan de marĉoj, kaj tio savis la urbon kontraŭ la turka okupado.

La industriiĝo de la urbo disvolviĝis post la dua mondmilito. Hodiaŭ la urbo disponas pri pluraj modernaj granduzinoj kaj fabrikoj, kiuj produktas multajn varojn kaj por eksporto, kaj por enlandaj bezonoj.

El inter la vidindaĵoj de la urbo elstaras la Muzeo Göcsej (geĉej). En ĝi oni povas rigardi la specialan etnografian kolektaĵon el la samnoma, okcidenta parto de la departemento. Krome, aparte ekzistas Vilaĝ-muzeo Göcsej, sur kies teritorio oni prezentas la iaman vivon, popolarton kaj agrikulturon de la popolo. En la romantikaj arbaroj de Göcsej troveblas belaj ĉasistkasteloj.

La dua grandurbo de la departemento estas *Nagykanizsa* (nadjkaniĵa), kun 50 000 loĝantoj. Ĝi konstruiĝis ĉe ambaŭ bordoj de la kanalo Principalis. La historio de la urbo komenciĝis ĉ. la jaro 1000, kaj ĝi estis relative trankvila ĝis la mezepoka turka invado. En la jaro 1600 la turkoj okupis ĝin kaj tiu okupado daŭris 90 jarojn.

La evoluo de Nagykanizsa komenciĝis post la liberbatalo de 1848/49, kiam ĝi fariĝis grava centro de la fervoja linio inter Budapeŝto kaj Triesto. Je la komenco de la dudeka jarcento la urbo jam havis plurajn fabrikojn, kaj tiu evoluo vere disvolviĝis post la dua mondmilito. Ĉar en la ĉirkaŭaĵo funkcias pluraj naftoproduktejoj, hodiaŭ oni nomas la urbon ankaŭ „nafto-urbo".

Nagykanizsa estas riĉa je arkitekturaj artobjektoj. Precipe la eklezi-karakteraj konstruaĵoj estas interesaj por la turistoj.

En la proksimo de Nagykanizsa situas unu el la ne delonge famiĝintaj termobanejoj de Hungario: *Zalakaros* (zalakaroŝ). Je la komenco de la sesdekaj jaroj, dum nafto-esplorado oni malkovris valoran kuracakvon de 90°C, kiu baldaŭ famigis la nomon de Zalakaros, ne nur en Hungario, sed ankaŭ trans la landlimoj. La evoluigo de la banejo komenciĝis en 1964 kaj en 1971 oni deklaris ĝian akvon oficiale „rekomendinda kuracakvo" precipe por reŭmatismaj kaj ginekologiaj malsanuloj. Hodiaŭ la banejo disponas pri ĉiuj instalaĵoj, kiuj kapabligas ĝin akcepti en- kaj eksterlandajn gastojn.

Fine ni menciu interesan specialaĵon de la departemento, sen kiu ne povus esti kompleta nia priskribo. Nome temas pri unike protektata teritorio, pri la Eta-Balatono. La rivereto Zala ĉe la plej suda punkto de Balatono enfluas la lagon. Tie etendiĝas plurcent-hektara pramarĉo, kiu iam estis golfo de Balatono. Dum jarmiloj tiu teritorio pleniĝis per la sedimento de la rivereto Zala, kaj nuntempe ĝin tute kovras kanaro. Tiel ĝi fariĝis ideala farmo por specialaj kreskaĵoj kaj birdaro. Raraj akvaj birdoj loĝas tie dum la tuta jaro, kaj pluraj birdospecoj (migrantaj birdoj) aperadas tie porokaze, dum certaj sezonoj nur.

Pro la dezirinda kvieto de la scienca esplorlaboro de tiu teritorio ĝi estas vizitebla nur kun la permeso de la Nacia Naturprotekta Oficejo. Eta Balatono funkcias ankaŭ kiel „natura filtrilo" de la rivereto Zala, kiu nutras Balatonon.

En la departemento la komencoj de la E-movado datiĝas en 1912. Dum la 30-aj jaroj precipe fervojistoj kaj poŝtistoj aktivis por la disvastigo de IL. Inter la postmilitaj jaroj 1945-48 ankaŭ laboristoj aliĝis al la movado.

En 1978 oni aranĝis sukcesplenan Junularan Esperanto-Renkontiĝon en la urbo Zalaegerszeg, kun 260 partoprenantoj.

La esperantistoj de Nagykanizsa en 1979 aranĝis Transdanubian Pionirrenkontiĝon, kiun partoprenis ĉ. 250 gejunuloj.

Nuntempe 7 grupoj funkcias en la departemento, en Zalaegerszeg, Nagykanizsa kaj Nagyrécse, sume kun 240 membroj.

Pluraj esperantistoj de Zalaegerszeg kaj Nagykanizsa havas internaciajn kontaktojn kun la samideanoj de Pollando kaj Sovetio.

István *László*

Pitoreska pejzaĝo en Zalaegerszeg (Fotoj de Z. Fejér)

Vilmos Benczik

Ducent horoj trans la Granda Muro

„En la ĉielo estas la Paradizo, sur la tero estas Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ" – tion diris ĉinaj antikvuloj, kaj certe ili ne troigis, tiel multaj pitoreskaj lokoj koncentriĝas ĉirkaŭ tiuj du urboj. La ĉefa ero de la vidindaĵoj estas la t.n. Okcidenta Lago – lago fakte negranda, ampleksanta sur ses kvadratajn kilometrojn. Ĝin ĉirkaŭas milde ondantaj montetoj, kaj la favoraj geografiaj donitaĵoj jam en la antikvaj tempoj altiris homojn: la agrable varma kaj vivige humida klimato faris ĝin eminente taŭga loĝloko.

Ĉirkaŭ la lago kaj en la lago mem troviĝas dek diversaj vidindaĵoj. Estas notinde, ke la diversaj pagodoj, temploj aŭ aliaj konstruaĵoj havas unu komunan karakterizan trajton: nome, ili mirinde harmonie adaptiĝas al la natura medio, kvazaŭ estas ĝia parto. La ĉinaj arkitektoj dum la pasintaj jarcentoj – eĉ jarmiloj – neniam strebis montri sian potencon super la naturo: ili bone komprenis, ke arto estas ne spiti la naturon, sed rimarki ties harmonion, kaj provi rekrei ĝin. La konstruintoj de la Lagmeza Pavilono, de la Tombo kaj Templo de Jŭe Fej (fama generalo de la suda Song-dinastio, kiu en la 12-a jarcento batalis kontraŭ la nordaj invadintoj) aŭ de la Templo de Lingjin estis majstroj de sia arto.

Simpleco tamen ne signifas primitivecon aŭ senfantaziecon. La plej bona ekzemplo por tio estas la artefarita insulo Eta Jinggoŭ, sur kiu troviĝas interna lageto, ankaŭ artefarita, ĉirkaŭata de salikoj kaj floroj. Kronas tiun rafinitan natur-arkitekturan plenumon agrabla insuleto en la interna lago de la artefarita insulo...

Hangĝoŭ estas fama centro de la ĉina silkoindustrio. En la silkofabriko, kiun ni vizitis, ni povis sekvi la teknologian vojon de la fadenoj, ĝis ili fariĝis vestaĵoj, tablotukoj aŭ silke reproduktitaj kopiaĵoj de famaj klasikaj pentraĵoj. Cetere, estis tiu fabriko, kiu antaŭ kelkaj jaroj produktis la silke teksitan portreton de Zamenhof.

Post tri tagoj, pasigitaj en Hangĝoŭ, sekvis trajna veturo tra Ŝanhajo al Suĝoŭ, kiun ĉinoj nomas „Venecio de la Oriento". Tiu ĉi urbo havas malpli ol unu milionon da loĝantoj, kaj fakte estas ne la urbo mem, kiu allogas turistojn, sed ĝiaj ĝardenoj, el kiuj kelkaj havas pli ol mil jarojn. En tiu regiono la nivelo de la grundakvo estas

La Ĝardeno de la Humila Administranto en Suĝoŭ



Knabinoj en taoistaj vestaĵoj en Suĝoŭ

Junaj esperantistinoj en Suĝoŭ

tre alta, kaj ĝi nutras multegajn riverojn kaj lagetojn. Fakte tiuj riveretoj kaj lagetoj servas kiel baza elemento de la Soĝoŭaj ĝardenoj: la riveretojn traarkas pontetoj, inter la lagetoj kondukas ombraj padoj, kaj abundas simplaj, tamen tre rafinite konstruitaj pavilonoj, en kiuj oni povas agrable ripozi, spektante la varian tamen harmonian kunekziston de akvo, bosketoj kaj homfaritaj objektoj. La beleco kaj harmonio de la ĉi tieaj ĝardenoj influis ankaŭ la konstruintojn de la Somera Palaco apud Pekino (ĉinlingve Jihejŭan, t.e. Ĝardeno de Harmonia Unuiĝo): pluraj eroj de la cetere belega ĝardeno ĉirkaŭ la palacaj konstruaĵoj – la ĉinaj imperiestroj videble ne estis puritanuloj – estis kopiaĵoj de la ĝardenoj de Suĝoŭ.

En Suĝoŭ ni vizitis fabrikon de ventumiloj – tiu ĉi urbo estas fama produktanto de la karakteriza objekto de la ĉina kulturo. Ni povis admiri la mirindan lertecon de laboristoj kaj laboristinoj, kiuj per miniaturaj iloj mane segis-boris-bruligis la bonodoran

Suĝoŭ – Venecio de Oriento



Unu el la kvar gardistoj de budaismaj sanktejoj



santalan lignon por krei el la senanima materialo majstroverkojn.

Post dutaga restado en Suĝoŭ ni veturis al Ŝanhajo, por pasigi tie unu tagon. Kelkaj horoj kompreneble ne povas sufiĉi por eĉ iomete ekkoni urbegon, kiu havas 12 milionojn da loĝantoj, tamen ni povis iomete gustumi la tre karakterizan atmosferon, en kiu sintezigas ĉina tradiciemo kaj mondumeco.

Denove al Pekino – restas al ni ankoraŭ unu tago. La antaŭtagmezon ni pasigas en la jam aludita Somera Palaco. Ĉin konstruigis la lasta imperiestra dinastio Qing (ĉin). Oni povus sur dekoj da paĝoj denombri la belaĵojn de la ĝardeno, kiu estas la reganta elemento de la tuto, tamen mi menciu nur la Longan Koridoron, kiu estas 728 metrojn longa tegmentita promenejo. La tegmento konsistas el 564 lignopaneloj, kiuj surhavas pentraĵojn pri konataj ĉinaj pejzaĝoj, floroj kaj birdoj – kaj ili ĉiuj estas malsamaj.

La horojn antaŭ la forveturo ni pasigis en kunveno kun la laborantoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino. Ili – kiel ĉiuj renkontitaj ĉinaj esperantistoj – deziris havi kritikojn pri sia laboro kaj konsilojn por la plua agado.

Ĉinaj esperantistoj estas multaj, kaj ili treege deziras havi kontaktojn kun eksterlandanoj. Ili estas sciavidaj, diligente studas la lingvon – kiu por ili estas certe pli malfacila, ol por eŭropanoj – kaj volas ekkoni ankaŭ la Esperantan kulturon. Nun certan malhelpon por ili signifas la ioma manko de lerniloj (ĉe la komenco de la studado), kaj la praktika maleblo veturi eksterlanden. La malhelpo por veturi estas esence ekonomia: la personaj enspezoj en Ĉinio verŝajne ankoraŭ longe ne ebligos al simpla civitano fari eksterlandajn vojaĝojn.

Ni renkontis esperantistojn krom en Pekino, ankaŭ en Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ. La plej impresa estis la renkontiĝo kun la Suĝoŭaj esperantistoj – ili estis multaj, relative bone regis la lingvon kaj estis tre-tre malfermitaj en sia konduto. La plimulto el ili estis juna – inter 20-30 jaroj – kaj troviĝis kelkaj aĝaj personoj: la meza generacio mankas, pro evidentaj kaŭzoj.

Male, en Pekino ni renkontis esperantistojn mezaĝajn; ili estis plejparte profesiaj esperantistoj. Oni devas diri, ke la bazo de la Pekina esperantista vivo estas la profesiaj esperantistoj de EPĈ kaj Radio Pekino – ĉiuj bone informitaj ankaŭ pri la internacia movado. Iliaj konoj, diligenteco kaj sindediĉo povas esperigi nin pri vasta disvolviĝo de la Esperanto-movado en Ĉinio. Ankaŭ la agado de Ĉina Esperanto-Ligo profitas el la ekzisto de tiuj du Esperantaj bazoj.

Malpli ol dek tagoj en Ĉinio – estas aroganteco fari ajnan konkludon post tiel mallonga restado pri lando, en kiu vivas kvarono de la tutmonda loĝantaro. Antaŭ nur dek jaroj tiu ĉi lando estis kvazaŭ forfermita disde la mondo – ĝi mem forfermis sin. Nun la fenestroj kaj pordoj estas malfermitaj, la monda aero eninundas, kaj ankaŭ la homoj vivantaj tie spiras pli libere. Ĉe hazardaj surstrataj aŭ entrajnaj konversacioj evidentiĝas, ke ankaŭ sub la puritane ĝiskole butonitaj Sun Jatsen-kostumoj (cetere portataj jam ne tiel ĝenerale; en Ŝanhajo, Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ eĉ tre malmulte) la homaj koroj same sopiras por paco kaj feliĉo, kiel ĉie ajn en la mondo.

Pagodo de la Norda Templo en Suĝoŭ



Ĉiutagaj radiodissendoj en Esperanto



S-ro Andrzej Pettyn parolas el Varsovio

S-ino Hang Chun estas aŭdebla el Pekino

RADIO POLONIA

La 4-an de aprilo 1959 la unuan fojon la esperantistoj povis aŭdi radioprogramon en la Zamenhofa lingvo el Varsovio. Depost tiam forpasis pli ol 26 jaroj, dum kiuj la radioprogramoj el la pola ĉefurbo por multaj novaj adeptoj de Esperanto estis la unua impona pruvo pri la vera uzebleco de la Internacia Lingvo.

La baza celo de Radio Polonia estas prezenti al la eksterlanda esperantistaro Pollandon – la pasinton, nuntempon kaj la estontajn aspirojn de la pola popolo.

Sed Radio Polonia ne limigas sian temaron je Pollando. Ĝia raportisto ĉeestas ĉiun Universalan Kongreson, kaj eĉ aliajn gravajn esperantistajn kulturajn arangojn, kiel ekzemple la Esperantajn teatrajn festivalojn en Budapeŝto.

Estas aparte atentindaj la literaturaj programoj de Radio Polonia. La redaktoroj regule prezentas al la aŭskultantoj pecojn ankaŭ el la originala literaturo de Esperanto.

La Redakcio de Radio Polonia volonte atendas la leterojn de la aŭskultantoj po pere de tiuj ĉiam plibonigi la elsendojn.

Jen, la horoj de la dissendoj kaj ankaŭ la ondolongoj: 5,30-6,00 per la ondoj 200 m, 50,04 m kaj 41,27m. 11,00-11,25 per la ondoj 41,99 m kaj 31,50 m. 15,30-15,55 per la ondoj 41,18 m kaj 31,01 m. 16,30-16,55 per la ondoj 49,22 m kaj 41,18 m. 21,30-21,55 per la ondoj 50,04 m, 49,22 m, 41,18 m kaj 200 m.

La adreso de la Redakcio: **Radio Polonia Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.**

Radio Polonia dissendas ĉiutage ses duonhorajn programojn en la Internacia Lingvo.

RADIO PEKINO

Radio Pekino ekparolis la unuan fojon en Esperanto la 19-an de decembro 1964. Komence ĝi dissendis ĉiusemajne dufoje duonhoran programon, kaj la elsendoj estis direktitaj nur al Eŭropo. Sed post nelonge sekvis elsendoj al Sud-orienta Azio, kaj same al Ameriko.

Radio Pekino nuntempe jam dissendas ĉiutage kvarfoje po duonhoran programon, kaj trovas aŭskultantojn en proksimume kvindek landoj. Tiuj aŭskultantoj ofte sendas al la Redakcio leterojn, esprimante sian opinion pri la enhavo kaj la lingvaj kvalitoj de la elsendoj.

La centra celo de la programoj estas prezenti la ĉinan vivon, tion servas la regulaj rubrikoj kiel Ĉina Kulturo, Vojaĝo en Ĉinio, raportoj pri la nuntempa vivo en tiu granda lando . La programo Esperanto Marŝas informas pri la vivo de la ĉina kaj internacia Esperanto-Movado.

Ekde 1982 Radio Pekino regule sendas raportiston al la Universalaj Kongresoj, kaj detale informas siajn aŭskultantojn pri tiuj grandaj eventoj de la esperantista vivo.

Radio Pekino dissendas je la sekvaj horoj laŭ Universala Tempo (UTC). 11,00-11,30 (por Japanio kaj Koreio) per la ondoj 31,64 (9480 kHz) kaj 25,86 m (11600 kHz). 13,00-13,30 (por Sud-orienta Azio) per la ondoj 25,67 m(11685 kHz) kaj 19,50 (15385 kHz). 20,00-20,30 (por Europo) per la ondoj 40,16m (7470 kHz) kaj 30,10 m (9965 kHz). 22,30-23,00 (por Centra kaj Suda Ameriko) per la ondoj 30,93 m (9700 kHz) kaj 26,21 m (11445 kHz).

La adreso de la Redakcio. **Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.**

Pri la neceso de internacia lingvopolitiko

La koncepto „lingvopolitiko" estas io nova en la hungara kultura gazetaro. Maloftas artikoloj pri tiu temo, tamen, ili iom post iom plimultiĝas. „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo), la hungarlingva revuo de HEA atente sekvas la tiutemajn publikaĵojn, kaj, se necese, reagas al ili. Ĉi-sube ni publikigas la iom koncizigitan tradukon de tia reago el la plumo de Imre Szenes, *ĉefredaktoro de „Világ és Nyelv".*

Kio estas la lingvopolitiko? Ĝi estas tuto de tiuj paŝoj kaj aranĝoj de iu ŝtato, potenco aŭ institucio, per kiuj la lingvouzo estas rekte aŭ malrekte, tamen celkonscie regulata, influata. Kiam la unuaj konkerantoj de la monda historio subjugis unu aŭ plurajn najbarajn tribojn tiel, ke ili altrudis al tiuj ankaŭ la uzon de sia lingvo – jen, tio estis jam lingvopolitiko.

Kiel antaŭbildon de la lingvopolitiko de la modernaj Eŭropaj naciaj ŝtatoj eblas konsideri la edikton de Francisko la 1-a, franca reĝo, en 1539 – asertas József Hermann en sia studo aperinta en la ĉijara 3-a n-ro de la hungarlingva monata gazeto „Kritika" La reĝo deklaris oficiala lingvo la francan per sia duvizaĝa ordono, samtempe li forpuŝis la aliajn lingvojn – ne nur la latinan, sed ankaŭ la parolatajn lingvojn de la lando, unuavice la ĉefan rivalon, la provencan.

Elirante el tiu mallonga historia retrospektivo, József Hermann strebas konturi la variecon kaj oftan malsimplecon de la lingvopolitikaj situacioj. Nun la unuan fojon okazas en Hungario, ke aperas publikaĵo kun lingvopolitika temo por la plej vasta legantaro. Komence de sia artikolo, la aŭtoro aludas la konatan fakton, ke en la lastaj jardekoj multfoje kaŭzis konfliktojn la lingva demando en diversaj landoj, ĉar la naciaj, naciminoritataj, etnaj identeco kaj solidaro – kiuj reliefiĝas ankaŭ en la lingva kontinueco – pruviĝis ĉie, tamen ĉefe en Eŭropo, profunda kaj rezistema, daŭra. „Krom la interna evoluo de la lingvistiko kaj moderna sociologia lingvistiko, t.n. sociolingvistiko ankaŭ tio motivas – daŭrigas József Hermann –, ke aktualiĝis science esplori la eblajn celadojn, efikon kaj rimedojn de la lingvopolitiko, kaj antaŭ ĉirkaŭ du jardekoj ekformiĝis ankaŭ la scienco lingvopolitiko kiel specifa, komuna esplorbranĉo de lingvistiko, sociologio kaj politiko. Ĉe ni okazis nur la unuaj, vojserĉaj paŝoj sur la kampo de tiuj esploroj..."

En la sekvaj partoj la aŭtoro – kiu estas cetere direktoro de la Lingvistika Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj – atentigas, ke malmultaj scias: pure unulingva, plene samnacieca lando sen etnaj minoritatoj apenaŭ troviĝas en la mondo. Krom la analizado de la multspecaj rilatoj de la faktoj, li tuŝas ankaŭ la kelkfoje timige interplektitan lingvopolitikan situacion de la evolulandoj sendependaj nur kelkajn jardekojn. En ili kunvivas kaj rivalas kelkdek, eĉ kelkloke pli ol cent pli-malpli grandaj lingvoj, apud kiuj kutime daŭre tenas, eĉ fortigas siajn poziciojn en la ŝtata kaj kultura vivo la lingvo de la iama koloniiga potenco.

Kiel bazan rekonon la lingvistiko konstatas, ke ĉiuj homaj lingvoj bazas sin sur komunaj strukturaj trajtoj, kaj ĉiuj lingvoj de la homaro estas samvaloraj el la vidpunkto de esprimivo kaj evolukapablo konvena al la sociaj bezonoj. Tamen diferencas disde si la historie elformiĝinta uzrondo de la lingvoj, kaj ĉio ĉi influas ilian „fortostaton", disvastiĝan kaj pluekzistan povon.

„Tiajn, historie kondiĉitajn malsamecojn ni povas konstati inter la opaj lingvoj laŭ iliaj funkcioriĉeco, sociaj kaj kulturaj roloj. Ĉe la pinto de la vico troviĝas relative malgranda grupo de tiuj lingvoj (inter ili ankaŭ la hungara), kiuj – havante firman kaj historian skribsistemon – estas uzataj senbare kaj kun la necesa efikogrado en ĉiuj agosferoj de la ŝtata vivo, kaj funkcias kiel instrulingvoj en ĉiuj fakoj ĝis la plej alta ŝtupo; el tiu grupo selektiĝas kelkaj lingvoj, kiuj estas vaste kaj regule uzataj ekster la denaska parolantaro en la trafiko inter malsamlingvuloj, kiuj tiel ekhavis fortikan internacian komunikan funkcion (tiaj estas la angla, franca, rusa, hispana kaj ankoraŭ iuj 'kontinentoskalaj' internaciaj lingvoj, ekzemple krom la ĉisupraj en Eŭropo la germana)."

Pri la „fortostato" de la lingvoj, plenumantaj ankaŭ internaciajn rolojn, ĉefe pri tiu de la angla kaj franca, necesas tamen rimarki, ke ilian relative vastan uzon „ekster la denaska parolantaro" ni ne povas atribui al ilia aparte elstara lingva kvalito. Multe pli al la antaŭaj imperiismaj konkeroj de la ŝtatoj, kiuj uzas ilin kiel majoritatan denaskan, gepatran lingvon, kaj respektive al iliaj ekonomiaj, armeaj kaj politikaj fortoj, multfaceta influo kaj povo, kiuj ĉiuj devenas el la menciitaj historiaj eventoj. Estas alia demando, ke en la diversaj historiaj epokoj la opaj ŝtatoj simile per devigoj certigis la regionan gvidrolon por sia lingvo – tamen ĉiukaze en mezuroj dependantaj de la ekonomiaj, armeaj povoj kaj ekspansikapablo.

Laŭ tiuj faktoj la homaro jam delonge bezonus ankaŭ interŝtatan lingvopolitikon, kiu ĝenerale reguligas ĉiujn lingvajn rilatojn de la internaciaj kontaktoj. Io tia ankoraŭ tamen ne ekestis ĉar la kondiĉoj por la elformiĝo matu-

riĝis nur en la plej lasta periodo. Ĝis nun naskiĝis diversaj lingvopolitikaj reglamentoj kaj aranĝoj nur kun enŝtata valido. Eĉ la plimulto de tiuj koncernas ĉefe la regulojn pri uzado kaj evoluigo de la majoritata enlanda lingvo, respektive la malsamgradan certigon aŭ ĝuste limigon, subpremon de la lingvaj rajtoj de la naciminoritatoj.

Pri internacikaraktera lingvopolitiko ni povas paroli nur relative, kaj en du sencoj. Unue, la bazaj dokumentoj de UN, Unesko kaj la Aktoj de Helsinki fiksas la lingvajn rajtojn de la naciminoritatoj, kaj devigas la ŝtatojn certigi tiujn rajtojn. Do, ili koncernas la demokratian reguladon de la lingva situacio ene de la opaj ŝtatoj, nome tion, kion la lingvopolitikaj leĝoj devas enhavi eĉ cetere. Due, diversaj interŝtataj konvencioj decidas pri la t.n. oficialaj kaj laborlingvoj de UN, Unesko kaj ĉiuj aliaj internaciaj organizoj, forumoj kaj konferencoj, kongresoj. Cetere ankaŭ inter la laborlingvoj havas la ĉefan rolon tiuj lingvoj, kiuj estas uzataj en UN kaj Unesko, unuavice la angla kaj la franca.

Samtempe la konservado de tiuj privilegioj estas grava parto de la ŝtata lingvopolitiko de la koncernaj ŝtategoj. Plie, ili ĉiuj uzas signifajn materialajn rimedojn kaj instancojn por certigi kiel eble plej vastan lokon por siaj lingvoj – konkurante kun la aliaj – en la lerneja kaj eksterlerneja instruado de fremdaj landoj. Estas bedaŭrinde, ke la eminenta artikolo de József Hermann ne tuŝas tiujn gravajn fenomenojn de la lingvopolitiko.

Mi ne kredas, ke la kaŭzojn de tio klarigus: „Inter tia kompleksеco de la konsidereblaj faktoroj la scienco statas ankoraŭ ĉe la inventaro de la lingvopolitikaj problemoj kaj situacioj, kvankam la taskoj alte superas tion: estas pli kaj pli brula bezono havi prognozon, povi dedukti la vojojn en la plua formiĝo de la lingvopolitikaj situacioj, povi antaŭvidi la atendeblajn efikojn de la lingvopolitikaj aranĝoj."

Post plua analizado de la temo la aŭtoro konstatas: „La demando pri la agnormoj kaj eblaj celadoj de la lingvopolitiko estas plie malklara ol la tasko de prognozo; tiu demando cetere el la kampoj de lingvistiko kaj sociologio transiras jam al la socia etiko kaj politiko..." Fine, la ĉefa esenco de lia studo riveliĝas en la sekvaj pensoj: „...la baza celo de la demokratia, kaj plie tiu de la socialisma lingvopolitiko ĝenerale ne povas esti io cetera krom la konservado kaj gardado de la naciaj, minoritataj, etnaj, t.n. gepatraj lingvoj kaj la riĉigo de iliaj funkcioj..."

Pri tiu celo ankaŭ la monda Esperanto-movado plene konsentas, ĉar ĝi estas tiu baza evidenteco de ties ideoj kaj strebadoj, kiun nenio modifas. Tamen, el la sama vidpunkto estas unuflanka kaj malkompleksa tiaspeca koncepto, eĉ mallarĝigo de la lingvopolitiko. La konservado de la evoluintaj kaj evoluantaj gepatraj lingvoj povas gajni eternan validecon nur kun la certigo de ilia egalrajteco en la drivo de la nuntempa multfaceta internaciiĝo. Kaj ne nur laŭ la internaj juraj garantiaĵoj de la plurlingvaj ŝtatoj. Estus samrange grave krei la internaciskalajn kaj ceterajn kondiĉojn de la egalrajteco. Sed ĉio ĉi fariĝus ebla, nur se en la internacia vivo estus solvebla la nuligo de la t.n. mondlingva privilegio de kelkaj ŝtategoj. Tion sole kondiĉus, se la registaroj de la ŝtatoj – kadre de monda konvencio – akceptus Esperanton kiel neŭtralan internacian helpan lingvon kaj ili interkonsentus instrui ĝin kiel unusolan fremdan lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo kaj poste iom post iom realigi ĝian ĝeneralan aplikadon sur ĉiuj kampoj de la internaciaj kontaktoj. La aliaj fremdaj lingvoj restus fakultativaj studobjektoj.

La plej grava rezulto estus, ke jam ene de unusola jardeko por ĉiu homo eblus certigi la spirite egalrangan komunikadon en ĉiuj oficaj kaj privataj sferoj de la internaciaj rilatoj. Por la denaskaj parolantoj de ĉiuj lingvoj tio havus netakseble altan socian, kulturan, demokratian kaj psikologian signifon el la vidpunkto de la nacia memrespekto kaj konscio pri identeco. Ĉion ĉi kompletigus la kreskanta preteco de la popoloj kaj individuoj egalrange kunlabori internacinivele. Tio estus la vere kompleta senco de la lingvopolitiko formita kaj en ŝtataj, kaj en interŝtataj kadroj. En la rekono kaj vasta diskonigo de ĉio ĉi devus plenumi la gvidrolon la lingvistoj kaj la lingvistiko.

Por József Hermann la postulo de kompleksеco ŝajnas esti io alia. Pri ĝi li skribas: „La lingvopolitiko en plena senco inkludas cetere krom la formado kaj influado de la uzrondo de la lingvoj parolataj en la ŝtato, ankaŭ la altigon kaj instigon de la loĝantara lingva klereco, scio de fremdaj lingvoj. Tiu tasko kompletigas, helpas ankaŭ la farendaĵojn rilate al la gepatra lingvo." Tio estas vera. Tamen, se tiaspeca kompleksеco restos plue ĉe la koncepto „ni lernu mondlingvojn", tiukaze ĝi ne plenumas ion alian ol fortigas plu la lingvajn privilegiojn, ekzistantajn nuntempe en la internaciaj kontaktoj, kaj konservas la plenan malegalecon de la gepatraj lingvoj.

Tiel daŭre restus la kontraŭdira situacio, kiam ene de la ŝtatoj la lingvopolitiko ĉie certigus la egalrangecon inter la gepatraj lingvoj de la kunvivantaj nacioj kaj naciminoritatoj; samtempe ĝuste tiu ĉi sama lingvopolitiko plie grandigus la malegalecon de la gepatraj lingvoj sur la interŝtata nivelo; t.e. ke por naŭ dekonoj de la homaro ĝi malhelpus, sed almenaŭ tre malfaciligus la eblon egalrange partopreni la internacian komunikadon.

Mi scias, ke formi ĝeneralan, demokratian internacian lingvopolitikon bezonas longedaŭran historian lukton. Kaj tio estas strikte kunligita ankaŭ kun la evoluo de la pli kompleksa politika lukto por la paca kunlaboro inter la popoloj. Realigi ĝin estas do multe pli malfacile ol krei justan lingpolitikon kadre de la opaj ŝtatoj. Tamen, la lukto por la internacia lingvopolitiko havas jam tian harditan kaj spertan socian kaj sciencan bazon, kia estas la monda Esperanto-movado, baldaŭ centjara.

Tio signifas ke ankaŭ la internacia lingvopolitiko estas unu el tiuj mondaj sortoproblemoj de la homaro, por kies solvo lukto estas jam delonge aktuala; kiel tion entreprenis jam aŭtoritataj lingvistoj dise en la mondo.

Imre *Szenes*

Elek Gozsdu
(1849–1919)

ULTIMA RATIO*

Estis varma, sunradia oktobra tago, kiam lastfoje mi ĉasadis skolopojn sur la marĉtereno de K. La skolopoj pasie persistis sub la varmo de la akre bruletiga suno, flugadis malvigle kaj al mi venis en la kapon rigardi la horloĝon nur tiam, kiam ekmankis al mi kartoĉoj.

Estis la tria posttagmeze. Mi tute solis sur la vasta marĉtereno. Nenio ĝenis la profundan, mutan silenton. De tempo al tempo ekflugetis antaŭ mi skolopo pepanta, kiam mi laŭiris la padon de l' bordo. Por kelkaj momentoj super la kapo mi aŭdis tiun siblan sonon, dronantan en tenere mallaŭta dekresĉendo, kiun kaŭzas la klako-tinto de alte flugantaj anasoj; la intermita pepoĉo de sovaĝanseroj el la nevidebla alto aŭdiĝis de pli kaj pli fore, poste baldaŭ ĉiuj ĉoĉoj perdiĝis je profunda silento.

Nenio aŭdiĝis ankaŭ de la paŝtejoj sur la fora ebenaĵo, nek de la novalaj agroj.

La suno sin kaŝis malantaŭ la maldensaj blankaj nuboj, kirliĝantaj de okcidento; ĝiaj radioj estiĝis pli obtuzaj, kvazaŭ ili brilus malantaŭ iu kurteno, delikate diafana, kaj fare de tio la ombroj iĝis pli helaj, preskaŭ blueskaj. La flaviĝantaj kano, kariko, junko spegulis orecan lumon; la verda koloro iĝis pli malheltona, profunda; tie kaj aliloke akvosurfacoj briletis en klara, arĝenteca pompo sur la bruna marĉgrundo.

Eĉ unu herbero aŭ kano ne balanciĝis, sed la marĉo tamen ne aspektis senviva. Tio estis ne la rigidiĝinta senmovo, nek la dormema trankvilo, kiu karakterizas la somerajn vesperojn, precipe en junio, sed postrestis io el la rezigna, timema kvieto – kiam malfruaj ĝermoj apenaŭ sin elŝovas el la tero, kaj ilia verdaĵo efikas nur komune, kiel reflekta koloro, ekvilibre de la flava kano matura, de la junko ekbruniĝinta kaj de la malpure bruna karikostoplejo.

Malgaja estas la marĉo, tamen ĉi-sezone ĝi pleje altiras. Travideblas la aero, lumpenetras; nek la fortaj lumoj, nek la tremantaj ondoj de varmego trompas. Ĉio aspektas en sia vere vera koloro; kaj tiu profunda, grize-bruna koloro, kiu karakterizas ĉiun opan vegetaĵon, terbulon ĉi-tempe en aŭtuno, donas la dolorecan, tristan etoson, al kiu mi tiel volonte allasas min.

Mi iris sur la bordo nur lantpaŝe.

Mi direktis min al la altaĵeto, kiu kvazaŭ kunligas la marĉon longspace. Mi estis sufiĉe laca kaj ĝojis, kiam mi ekvidis iom pli fore ĉaron knarruliĝantan inter la brasikokampoj, ŝarĝate per herbaĉoj, tigoj. Ĝi iris malrapide, mi facile ĝin atingis. Al la ĉaro estis jungita flava, maljuna ĉevalaĉo.

– He, oĉjo, ĉu vi min veturigus al la vilaĝo?

– Nur ĝis la tombejo mi veturas, ne plu. Ĝis tie mi volonte veturigos la sinjoron! – respondis la oldulo, kiu sidis en la antaŭa sidloko de la ĉaro. Liaj kruroj pendis libere.

Li ŝajnis esti jam ege maljuna. Lian sulkan vizaĝon kovris maldensa barbo. Liaj neĝblankaj lipharoj estis tonditaj kurte, la blankaj haroj falis en maldensaj bukloj sur la magrajn, ostecajn ŝultrojn. En sia harplena, granda mano li tenis longan vipon, kaj intermite kun terura fortostreĉo li svingis ĝin al la flava ĉevalaĉo, kiu tiam faris pli viglan ekmovon, sed baldaŭ revenis al la antaŭa malrapida irmaniero.

– Vi vidas, sinjoro, ĝi malfortas, kiel mi mem! Maljunaj ni estas ambaŭ!

La oldulo havis voĉon, kvazaŭ iu kriadus de fora loko sur la kampo. Sentiĝis ĉe li la fortostreĉo, lia voĉo tamen estis febla, preskaŭ flustreca.

– Ĉu vi scias, kiel ni faru? – mi diris al li. – Mi ne enĉariĝos, nur la fusilon kaj tiujn ĉi birdojn kun la tornistro mi metos en vian ĉaron kaj bele-trankvile mi iros apud la ĉaro. Konsentite?

– Egale, ĉu sur ĝi, ĉu apud ĝi. Mia flavulo ne tre zorgas pri tio. La tombejo cetere ne estas malproksime! Kaj ĉi tiu tigaro ne multe pezas!

– Kaj do, kion vi faras en la tombejo, oĉjo?

– Kion mi faras? Jen, mi tie loĝas. Mi gardas la mortintojn.

– Ĉu de longa tempo?

– Dio jam scias, de kiam! Eble jam ĉirkaŭ depost kvardek jaroj, se ne pli!

– Ankaŭ dum la revolucio, en tempo de Lajos Kossuth vi jam loĝis tie?

La oldulo prigratis sian orelon, kraĉetis, kaj diris:

– Nu jes, en la sama loko! Kiel mi memoras, tiutempe pereis mia pli granda filo, Julĉjo. Ankaŭ pri Lajos Kossuth mi aŭdis. Li abolis la servutlaboron, kaj protektis la malriĉulojn. Ĉu li ankoraŭ vivas? Jam maljunega li povas esti, la povra.

– Eble tiom li aĝas, kiom vi! Cetere kiom da jaroj vi havas, he?

La oldulo pensadis kaj komencis ridi.

– Kiu tion scius? Kaj krome por kio utilas tion scii?

– Nu, tamen?

– Proksimume okdek kaj kelke da jaroj mi ja servadis. Eble pli aŭ malpli, egalas!

Ni ambaŭ eksilentis. Mallaŭte mi paŝadis apud la ĉaro, kaj meditis pri tio, kiel feliĉa povis kaj povas esti ĉi tiu homo, kiu siajn jarojn ne kalkulas, por kiu la tempo ne havas valoron, en kies vivo la okazaĵoj ne kreis epokojn, sed kies tagoj pasadis en kvieta trankvilo, glate, senbrue, kiel la riveroj de ebenaĵoj.

Post dek minutoj ni atingis la tombejon.

Belan tombejon mi imagis ĉiam tia, kia estis la tombejo de K. En ĝi estas nur unu vojo, kiu dividas la tuton je du partoj. La tomboj kuŝas unu apud la alia en plena senordo, kelkloke pli dense, kelkloke male, kiel tion diktas la kaprico de la maljuna gardisto. La tuta tombejo plenas de arbustoj, sarkindaĵoj, nur ie-tie ruĝas jen unu, jen alia kaduka marmorkruco. Alta herbaro kovras la tuton, kaj la novaj tomboj, kun siaj nigre-brunaj kumuloj ŝajne ne aspektas malafablaj. Ja la vice metitaj urbaj tomboj, tiuj kazernumitaj mortintoj, kuŝantaj po tabuloj numerite unu apud la alia kvazaŭ en deponejo, en siaj naŭzo kaj teruro sentigis al mi la abomenon de la morto. Ĉi tie la tomboj estis lokitaj dise, inter arboj kaj arbustoj; bunta herbotapiŝo ilin kovras; vera arbareto ĝi estas, kie oni trafas tombojn nur tie-alie, kaj la aro de lignokrucoj, malvarmaj ŝtonamasoj ne ĝenas la okulojn. Altaj akacioj ĉirkaŭas la tuton, kaj la senbrua silento, la kvieto, trovanta sin inter la arboj, la absoluta manko de ĉia pompo, riĉeco donas al tiu loko ian mildan, malgajan aspekton.

Kiam mi elvenis el la tombejo, la oldulo jam maljungis la ĉevalon, deprenis la kolbridon de ĝia kapo, kaj lasis ĝin libere paŝtiĝi ĉe la fosaĵo de la tombejo. Aŭdiĝis, kiel la ĉevalo rakmaĉis la herbon.

– Ĉu vi havas bonan akvon, oĉjo? Mi soifas.

– Jes. Mi portas ĝin el la stepa puto, ĝuste ĉe la fervoja eskarpo.

Nur nun mi rigardis pli bone la oldulon, kiam li eniris la malaltan kabanon por akvo.

Li estis magra, osteca homo. Iam antaŭlonge li povis esti tre forta; tion pruvis liaj vastaj manplatoj, fortaj ostegoj. Malgraŭ lia tuta maljuneco li moviĝis facile, kaj liaj viglaj, bluaj okuloj kun la konstanta sereno donis ian gajan, afablan aspekton al la vizaĝo. Lia tuta staturo estis altira, kaj ŝajnis, ke la morna okupiĝo lin tuŝas senefike.

Post nelonga tempo li eliris el la kabano, kaj kunportis akvon en bruna argilkruĉo, panon, volvitan en tuko, dispecigitan salon en iu blanka ĉifoneto kaj manplaton da krudaj verdaj paprikoj.

Li metis la akvon antaŭ min, senvorte eksidis sur la tero, poste komencis ĝue manĝi.

Pecon li detranĉis el la maizfaruna pano; distranĉis la verdajn paprikojn, salis ilin, kaj alterne jen pecon da pano, jen pecon da verda papriko li metis en sian buŝon.

La homoj ja povis sin nutri ĉi tiel antaŭ miljaroj; diferencas nur tio, ke ĉi tiu homo tranĉadis la panon kaj paprikojn per tranĉilo. Por li la civilizacio signifis nur la tranĉilon, almenaŭ koncerne la nutradon.

– Ĉu ĝi bone gustas al vi, oĉjo?

– Troviĝas inter la paprikopecoj ankaŭ dolĉaj. Al la akragustaj mi jam alkutimiĝis. De mia infanaĝo tio estas mia manĝo dum la tuta somero – respondis la oldulo, kaj maĉadis fervore, kun granda plezuro. – Mi proponus ankaŭ al vi, sinjoro, sed mi scias, ke vi ne ŝatas ĝin. Mi ja ŝatas!

– Kial vi ne vizitas kelkfoje la vilaĝon? Tie vi certe ricevus varman manĝaĵon. Al viaspeca maljunulo bone efikas ja la varma supo!

– Oni alportas tion al mi kelkfoje. Precipe post enterigo de infano! Nu, kaj pro kio mi vizitus la vilaĝon?

– Nur por ne enui.

La oldulo ekridetis.

– Enui! Ja, kial enui, se mi vivas, vidas kaj aŭdas! La tago nur forpasas! Jen per manipulado ĉirkaŭ la arboj, jen per fos-laboro, jen per dormetado mi pasigas la tempon, krome ankaŭ rigardadi mi kutimas; sed pri la nokto pli bone ne paroli! Mi ne kapablas kutimiĝi al la fervojo ĉi proksime! Jam duonhoron antaŭe mi aŭdas, kiam bruegvenas la maŝino! Ĉefe en vintro, kiam la fajfo plie aŭdiĝas! Ĝi tiel krakas, susuregas, ke preskaŭ timon tio vekas. Neeble alkutimiĝi!

– Kvankam sen ĝi la mondo jam ne povas ekzisti, oĉjo!

La oldulo denove ekridetis.

– Ne povas ekzisti? Kial ne! En la pasinto kial do ĝi povis ekzisti? Pro mi ĝi neniam trafiku! En tiu trajno ja vojaĝas sufiĉe multaj, tage-nokte, sen ĉeso. Mi jam ofte pensadis, de kie ja oni venas, kien iras? Mi opinias, ke tiu fervojo estas direktita de la malvarma maro ĝis la varma maro. Sed kial oni vojaĝas? Plena miraklo! Ne alportas bonon ĉi kuro-rekuro!

La oldulo jam etendis sian manon al la kruĉo, kaj trinkis el ĝi longe, bonguste. La lipojn malsekiĝintajn li viŝis per la maniko de sia ĉemizo, poste ceremonie ekbatis fajron, kaj ekfumis. Li turnis sin al mi, kaj kun kontenta afablo diris:

– Vi vidas, sinjoro, nun mi fartas tute bone. Ĉi tiel ja mi povus sidadi kiu scias ĝis kiam.

– Kaj pri kio vi meditas ĉitempe?

– Kiu scias? Pri diversaĵoj. Mi rigardadas la arbojn apude. Ĉiuj plenkreskis sub miaj okuloj, en ilia arbet-aĝo mi jam konis ilin. Sole tiu frakseno ekstrema, tiu ja altis ankaŭ tiam, kiam mi venis ĉi tien.

– Kiel vi alvenis? Ja tiutempe vi estis juna homo, ĉu ne?

– La interna deziro min venigis al ĉi tiu loko. Bruan vivon mi neniam ŝatis. Pereis miaj infanoj, mia edzino, do por kiu penadi plu? Pro kio? Ĉi tie mi kontentige vivadas; se mi restus inter la aliaj, eble jam ankaŭ super mi oni movadus la pioĉon.

– Ĉu vi koleras la homojn?

– Tute ne. Kial koleri ilin? Neniu al mi pekis! Sed mi preferas esti ĉi tie.

– Tamen estas agrable, se foje-foje vi aŭdas novaĵojn pri mondaj eventoj, ĉu ne?

– Ne necesas por mi, ja neniam tion mi deziris. Ankaŭ sen tio mi ĉiam vivis en trankvila paco. Ĉiu zorgu nur pri siaj propraj aferoj, damaĝoj. Mi havas zorgojn nur pro la leporoj, kiam abundas neĝo, ĉar tiam venadas la friponoj, kaj demaĉas miajn arbetojn. Via sinjora moŝto eĉ ne imagas, kiom da friponeco sin kaŝas en leporo! Ĝi embuskas ĉe angulo de tombo, mi preskaŭ surpaŝas ĝin, tamen ĝi ne flankensaltas. Ĝi ŝajnigas, ke ĝi dormas, kvankam bone vidas min la fripono!

– Nu, sed se ekestus denove revolucio, aŭ la rusoj volus for-preni nian landon, ja eĉ via moŝto ekmoviĝus, ĉu ne?

– Ĉu la rusoj ne estas homoj? Min ja eĉ ili ne formanĝus.

– Sekve, oĉjo, vi ne estas bona patrioto, vi ne ŝatas la patrujon.

La oldulo per montrofingro depremis la cindron en sia pipo, minuton li ŝajnis cerbumi, kaj poste li diris kun ruza rideto:

– Sed ja la patrujo ŝatas min!

En tiu minuto preter la tombejo bru-kuregis fulmrapide la Orient-ekspreso, venanta el Parizo kun longaj, bronzkoloraj vagonoj. Kelkaj pasaĝeroj gapis tra la fenestro; unu ekhavis la ideon svingi per sia ĉapelo al ni. Mi ne povis al li reciproki la saluton, ĉar en la sekva sekundo la vagonaro rapidiris antaŭen jam nur kiel malgranda strio, kaj maldika, longeca fumlinio signis ĝian direkton.

– Vi vidis, oĉjo, kiel salutadis nin tiu sinjoro el la vagonaro? Li vojaĝas nun el Parizo, el la plej bela urbo de la mondo rekte al Turkio!

– El Parizo? – demandis la oldulo kun mira vizaĝo. – Neniam mi aŭdis pri tiu urbo! Vane! Mi ankoraŭ ĝis nun – dank' al Dio – eĉ unufoje ne trapasis la regionlimon. Kaj krome, kien mi estus devinta iri? Kial?

– Ĉu vi ne deziris veturi ien? Homojn, landojn rigardi? Jun-aĝe oni estas iom scivolema!

– Mi estis ĉiam la sama, kiel nun. Dank' al Dio neniam mi devis formoviĝi el ĉi tiu loko. Kion ja mi estus povinta vidi? La maljuneco venas ĉiel ajn. Okazis bone ĉio tiel, kiel okazis.

– Sed la preĝejon vi vizitas foje-foje, ĉu?

– Mi ne! Pro kio? Mi neniam koleris Dion, eble eĉ li ne koleras min! Ni ja estas en trankvila paco!

La oldulo eksilentis, kaj komencis frapeti lante la pipon al sia manplato. El la veŝtopoŝo li eligis ĉifonon, kaj zorgeme envolvis en ĝin la tabakon.

Plenan kontentiĝon radiis liaj movoj, lia mieno. La sereno de trankvilo nestis en liaj sulka vizaĝo, palbluaj okuloj; li parolis tiel, kvazaŭ li tute konscius pri tio, ke sian surteran destinon obeeme li plenumis, kaj jam atendas kun la sento de plenumitaj taskoj, ke li estu deŝirata de la arbo de l' vivo. En lia mallaŭta, preskaŭ flustreca voĉo regis ia forto de konvinkiĝo, kiu ŝajnis fonti rekte el lia animo; en lia parolo enestis ia dolĉa sereno, milda puro, pruvante, ke lia animo neniam malpaciĝis, ke lin sopiroj neniam molestis, male, li plenkreskis kviete, senbrue, same kiel akacio, vartita de neniu travivis la etapojn de kresko en iu forlasita angulo de la tero.

Jen homo, kiu sin anoncas en la civilizacio de miljaroj nur kiel malsovaĝigita sendamaĝa ekzemplero. Li estis unu el la ekzemp-leroj de tiu speciala, granda homgrupo, el kies kaosa amaso foje-foje naskiĝas homoj kun iom fajnaj nervoj, kaj por kies bono-favoro la mondo ŝajnas esti kreita.

Li travivis okdek kaj kelkajn jarojn, sed la ideoj, luktoj, virtoj kaj pekoj de la epoko senbrue lin pretersusuris. Li eĉ konjekton ne havis pri la bataloj, martirvivo de mil kaj mil sennomaj herooj, kiuj preparas civilizacion por la estontaj generacioj, kaj kiuj kun freneza abnegacio laboras en la intereso de sia gento.

Li ne konas tiun voreman klason, per riĉo provizitan, kiu ĝuas la fruktojn de ŝvitlaboro laŭ la maniero de virabeloj. La deziroj, postulataj fare de morbecaj nervoj, la artifika amarto, lukso de okuloj, buŝo – por li tute ne ekzistas. Li ne konas la mensogadon de demagogaj demokratoj, trompojn de monarĥoj, ruzojn de stultaj burokratoj. Por li estas nekonataj la spleno de damoj kaj sinjoroj en teatroj, salonoj. Li aŭdis nek la famon de potenco de rango kaj mono. Li ne havas imagon pri la furioza ĝismort-batalo, en kiu luktas la majoritataj „senhavuloj" kontraŭ la minoritataj „riĉuloj" en intereso de sukcesa vivteno. Li eĉ ne konjektas, ke la menso mem estas la batalilo de tiu lukto, kaj ke la sukceso de la tuta lukto dependas de la valoro de tiu batalilo.

Li vivas rande de iu senkulpa vilaĝo, en arbaro-herbaro. Ĉi tie li plenkreskis en paco, kaj laboris nur tiom, ke li povu kunteni sian korpon-animon. Ambaŭ tiuj estas sanaj.

El la civilizacio restis por li sole kelkaj sendormaj horoj, kiujn kaŭzis la muĝantaj rapidvagonaroj.

Li vivas blinda inter ni, kaj se post dekmil jaroj ia mirakla potenco vekus lin el la trankvila dormo, kaj oni demandus lin, aŭ petus de li, ke li rakontu, kiamaniere vivis la homoj en tiu tempo, ĉar ĉiuj dokumentoj perdiĝis, jam eĉ unu skribita linio ne troviĝas, nek signo, nek fakto, kiuj povus ĵeti almenaŭ eran lumon sur la nuntempan vivon, ja tiu oldulo nur starus senvorte, stulte, kaj povus diri nenion, krom ke lia ordinara manĝaĵo estis verdaj paprikoj kaj maizfaruna pano, kaj la homoj rapidegis en iuj stranga-meĥanismaj veturiloj al certaj direktoj. Eĉ pri ununura malgranda ideo aŭ penso li ne povus raporti kaj ripetadus konstante la samon: „Mi ĉiam estis kontenta – mi vivis, mi mortis. Kion faris la aliaj homoj? Mi ne scias! "

Eble li pravas. Sed eble li pekis kontraŭ sia gento. Kial ne

servis ankaŭ li la grandegajn interesojn de la evoluo? Aŭ eble li estas la kulmino, la senkonscia aperaĵo de iu civilizacia direkto?

Ĉu la sento de la neevitebla forpaso ekregis en li senkonscie kaj paralizis lian agoforton? Ĉu pro ĝi li apatiis kontraŭ si mem kaj sia gento? Ĉu lia apatio estas malsana stato, aŭ nia memmistifika kapablo estas simptomo de feliĉomanio?

Ĉu pravas li aŭ ni? Kiu havas rajton por prijuĝi lin?

Kiam tiel meditante mi rigardis la oldulon, tra la pordego de la tombejo eniris kamparana ĉaro, sur ĝi lada ĉerko de malriĉuloj, mortintaj en hospitalo, kiuj dum siaj surteraj karieroj eĉ tiom da havaĵo, estimo ne akiris, ke ili meritu postmorte almenaŭ kvar tabulojn.

La koĉero alkriis la oldulon:

– He! Oĉjo Mateĉjo! Venu do, ni deprenu la ĉerkon!

La oldulo kiel povis, rapidmove ekstaris, kaj prenante la pioĉon haste iris post la ĉaro. Mi restis tie antaŭ la kabano. La oldulo kun grandaj paŝoj iris apud la ĉaro, kaj post kelkaj minutoj malaperis inter la arboj, arbedoj de la tombejo.

Dum la oldulo estis for, mi eniris lian ĉambron.

La ĉambro estis malalta, unufenestra, aspektis plie kavernaĉo ol ĉambro, kaj la signo de malriĉo, la malpuro kaj ŝimo ekposedis jam la murojn kaj ĉiujn objektojn. Mallarĝa, el pajlo plektita lito sur fostoj, profundigitaj en teron, sur ĝi ĉifona, sakŝtofa mantelo, lignobenko, kaj kapriopieda tableto signifis la tutan meblaron. Sur la sidloko de la vasta, el koto farita bakforno estis granda argilkruĉo, kovrita per malseka teksaĵo, en la angulo staris eluzita sorgobalailo – jen ĉio, kio estis en la ejo.

Malagrabla, mucida estis ene la aero, kaj mi klopodis eliri. Enspirante la liberan aeron, mi rimarkis la oldulon, venantan inter la tomboj, sen ĉapelo, preskaŭ stumbletante.

Lia vizaĝo estis tute pala; la okuloj kaviĝis, la sekaj, ostecaj manoj tremadis, la genuoj senĉese fleksiĝis; li preskaŭ falis.

Li kvazaŭ timigis min. Konsternite mi rapidiris al li.

– Kio okazis, oĉjo Mateĉjo? Kio vin trafis?

Li ne respondis, nur eksidis antaŭ la kabano, kaj rigide, kun preskaŭ apatia algapo rigardis la grundon.

– Kio okazis, oĉjo? Ĉu vi malsanas? Mi donas akvon!

Permane li signis, ke li ne bezonas. Profunde li ekspiris, kaj kun tremanta voĉo, singulte diris:

– Jam la duan fojon! Krevis!

– Kio? Kio krevis?

– La malriĉulo... nuda... kiel la hundon... oni devas ĵeti... en la fosaĵon! Ankaŭ tiun... ni ĵetis. Kaj krakis... kiel fusilpafo! Lia ventro... lia ventro...

La oldulo kovris la mienon per ambaŭ siaj manoj. Mi vidis, kiel eliras liaj larmoj inter la magraj fingroj kaj ruliĝas sur la harplena mansupro, ĉemizo. Li vere suferis. Pli kaj pli amare li murmuretis, sed eĉ unu lian vorton ne eblis kompreni pro la laŭta ploro.

Mi provis lin trankviligi.

– Sed ĉu vin tuŝas la afero? Ja vi eĉ ne konis la malfeliĉulon! Ĉu eble li estis via parenco?

– Ne! Tute ne! – ĝemis la oldulo ĉagrenite. – Sed iam... ankaŭ por mi... same okazos. Li krakis!

Per ĉemizmaniko li viŝadis siajn okulojn larmiĝintajn. Spasma plorsingulto lin kaptis denove. Sian blankharan kapon li apogis al la genuoj kaj infanece ploris.

– Neniun mi havas! Ankaŭ min... oni ĵetos... kiel hundon! Ankaŭ mi... puf...

La eksploda plorego subpremis lian voĉon. Li ankoraŭ plurfoje ekprovis paroli, sed ĉiu fortostreĉo estis vana, ade kunpremiĝis lia gorĝo.

Subite li ekstaris, min eĉ ne rigardis, kaj per manoj kovrante la vizaĝon, li eniris en la kabanon per ŝanceliĝantaj paŝoj.

Mi aŭdis, ke ene li riglis la pordon.

El la hungara: József Kiss

*La lasta saĝaĵo (latinaĵo)

Metropolo (Desegnaĵo de Jenő Dallos)

Hungara Poezio

Gábor Garai
(1929–)

Kion do fari...

Kion do fari, se la korp' kaj amo,
kaj mem la tempo vane argumentis?
Pro vi eĉ etajn kulpojn ni preventis,
por esti pura, kiel diafano.

Mi estis disciplin' kaj fajra flamo,
akuzon brulan la tener' amendis,
nun via manko mian cerbon fendis,
sopiro por vi estas trista vano.

Ja ĉiu penso ĉiam vin alcelas,
vi eĉ foreste kun mi plu ĝemelas,
ĉeeste tamen ŝirmus vi korfundon.

Por aŭdi vin, internen mi aŭskultas,
ĉar mi konservas vin, kiel sepultas
river' fluujon, la cikatro vundon.

Konkeras min...

Konkeras min ĉi duonhora solo,
konkeras eĉ sen vi nun la fascino:
mi min balancas sur teras' de volo,
kaj povus fluge fali al pavimo.

Atentu, por mi vivo multe karas,
mi volus vivi ĝin kun vi ĝismorte,
kaj eĉ por ŝajn' mi ne volonte faras
ĉi sinmortigan ludon timo-porte.

Do estu kun mi en la alto-tento,
super profundo brako etendita,
eĉ sur trapezoj de la firmamento
min ŝirmus via amo infinita.

Se vi alvenos, jam la korp-apudo
min esperigos havi vin ĉiuhore,
kaj kreskos nia hejmo ĉi minuto,
kiu sen vi nun pasas senkonsole.

Tradukis: Vilmos Benczik

Gyula Illyés
(1902–1983)

Doleo, ergo sum
(Suferas mi, do estas)

Doloras ĉiu mia membro: do mi vivas!
Malamas mi ĉi tiun staton, kaj priridas.

Dommastre korpa suferego – mi lamentas –
organojn miajn kiel gastojn nun prezentas.

Zigzagas fajraj fulmoj sur la osto, nervo.
Sen vid' konstatas la brulvundon mi. Observo.

Eksiblas mi; ĉe ĉiu suferego: premo,
grimaco, poste manoprem' kun mia memo!

Ne sciis mi: faring', hepato kie estas,
ke bruo dorsa pri la cerba bulb' atestas.

Konatas ĉio jam: la mordo, pik', angoro.
Mi vivas: vice eklumadas la doloro. –

Revanto estas, kiu nur al ĝoj' rigardas.
Malbone fartas mi, sed mi almenaŭ fartas,

kaj tiu ĉi konsilas, instruadas. Kiaj
la mondo, vivo? Sciis „malsanuloj siaj"!

Kaj kiuj konis super tero, aŭ ĉi-tere
realon, veron? Povraj, suferantaj vere;

aŭ la futuron? La sentemaj kaj humanaj.
Tiele iĝis kuracistoj la – malsanaj!

Eterne restu la konsilo, mia volo:
ganglioj ardaj estu, estroj, por popolo!

Tradukis: Julio Varga

Georgi Mihalkov

Eŭgeno Mihalski – la unua individua voĉo en la Esperanto-poezio

Kiam aperis la vera Esperanto-poezio kaj kiu estis la unua Esperanto-poeto, kiu levis nian originalan poezion al la nivelo de la monda poezio?

Nur tiam ni povas respondi al tiuj ĉi demandoj, se ni bone konas la specifon de la poezia evoluo, kaj se ni bone scias, kiuj estas la kondiĉoj por la apero de la vera poezio.

La antikvaj, kaj la persa, araba kaj japana poezioj klare montras, ke valora, signifa liriko aperas dum periodoj de kultura progreso. La poezio ĉiam kaj en ĉiuj literaturoj ludas la rolon de avangardo, de heroldo, kiu anoncas la aperon de io nova kaj nekonata, aŭ, se ni deziras tion ĉi poezie esprimi: la apero de la liriko en la literaturo de iu ajn popolo aŭ homa grupo, similas al fulmo, kiu subite lumigas la firmamenton, disŝiras la mallumon kaj aŭguras la proksimiĝon de ŝtormo, post kies silentiĝo aperos la dramo, kaj dum la pli trankvila sekva epoko – ankaŭ la romano, ĉar por la apero de la eposaj verkoj estas bezonataj pli trankvilaj, pli maturaj periodoj.

La komparo de la poezio al fulmo ne estas hazarda, ĉar la poezio estas tiu arto, kiu strebas penetri en la estontecon, kiu aŭguras la estontecon. Nur tiam la poezio plenumas sian rolon, se ĝi iĝas ponto el la nuntempo al la futuro, kaj ne hazarde la plej talentajn poetojn la homaro nomas profetoj.

La dua demando devas esti, kiam aperas vera poeto, aŭ kiam aperas poeto-profeto?

Tio okazas kiam poeto estas antaŭ ĉio individuo, kiu perceptas sian individuecon, sian memon, kiu sentas neeviteblan bezonon enrigardi en sin mem, esplori sin mem, serĉi la respondon al la eternaj demandoj en si mem.

Se ekzistas tiuj ĉi du gravaj kondiĉoj, oni povas atendi la aperon de la vera poezio.

El la vidpunkto de tiuj ĉi konstatoj estas interese esplori kiel naskiĝis la originala Esperanto-poezio, kiel ĝi evoluis kaj kiu estis la unua Esperanto-poeto en kies kreado koncentriĝis kaj riveliĝis tiuj ĉi du kondiĉoj.

La iniciatinto de la originala Esperanto-poezio estas Zamenhof, kiu per siaj unuaj poemoj strebis pruvi la flekseblon kaj la esprimeblojn de la nova lingvo, sed ni ne devas forgesi, ke Zamenhof sentis ankaŭ internan bezonon poezie esprimi la aperon de la Internacia Lingvo.

Sed bedaŭrinde Zamenhof ne estis la unua vera poeto de Esperanto, kaj ne la poeto-profeto de la Internacia lingvo. Liaj poemoj, kiel skribis William Auld en la „Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto", (1979), estas: „sufiĉe simplaj por logi tre variajn homtipojn, kaj sufiĉe emociaj por pruvi la vivecon de la lingvo", sed ili ne havas la forton disŝiri la „densan mallumon" kaj kiel fulmo lumigi la firmamenton antaŭ la ĵus naskita originala Esperanto-poezio.

Kompreneble tion ĉi neniu povis postuli de Zamenhof, kaj ankaŭ la historio de la naciaj literaturoj montras, ke la veraj poetoj, la poetoj-profetoj ne aperas tuj kun la apero de la poezio. Ili venas iom pli malfrue, ili aperas en la momento kiam jam ekzistas iu tradicio en la koncerna poezio. Ili venas ne nur renovigi tiun ĉi tradicion, sed ribeli kontraŭ ĝi, ĉar la vera poezio ĉiam estas ribelo. Ĝi ribelas kontraŭ la malnovaj formoj kaj kreas novajn formojn, ĝi puŝas la evoluon de la poezio antaŭen.

Zamenhof kreis la tradician bazon de la originala Esperanto-poezio. Tiu ĉi poezio celis proklami la „novan senton" kiu venis en la mondon kaj saluti ĝin per la voĉoj de ĝiaj entuziasmaj adeptoj. Tial en la poezio de Zamenhof ni ne aŭdas lian propran voĉon, ni aŭdas ĥoron el pluraj voĉoj. Tiu ĉi poezio estas deklara, patosa, tondra. Tiu ĉi poezio aspiras novan mondon, sed ĝi ne kreas novan poezian mondon.

Laŭ la tradicio de la Zamenhofa poezio tuj aperis pluraj poetoj kaj poemoj, sed la poeto kiu renovigis kaj ribeligis nian poezion aperis iom pli malfrue. Tamen ĉiuj kondiĉoj preparis kaj aŭguris lian aperon.

Malgraŭ tio, ke nur malfacile la Esperanto-movado plivastiĝis, la originala Esperanto-literaturo pliampleksiĝis kaj la apero de la unua vera Esperanto-poeto sekvis logike.

Tiu ĉi poeto, ĉu atendita aŭ ne, aperis, kaj lia nomo estas Eŭgeno Miĥalski.

Ŝajnas al mi, ke ĝis nun oni malmulte parolis pri lia grava rolo en la originala Esperanto-poeto, aŭ ni ankoraŭ ne povas kompreni klare lian signifon. Eble malhelpas nin la mallonga distanco. Ja, depost la apero de lia lasta poemaro pasis nur kvindek jaroj – periodo ne tre favora por la literaturaj historiistoj, aŭ eble la poetoj kiuj aperis post li iom nebuligis lian veran signifon, kaj malgraŭ ke ili daŭrigis lian tradicion, ili ne estis pli signifaj kaj pli gravaj ol li por la originala Esperanto-poezio. Cetere estas aliaj kialoj pri la ne tre reala pritakso de la rolo de Miĥalski, sed pri ili nun ne necesas paroli.

Malgraŭ ĉio Miĥalski estis rimarkita kaj reale pritaksita ĝuste de poeto, kaj tiu ĉi poeto estas William Auld. En sia eseo „Skizo pri la evoluo de la poezia lingvaĵo", kiu aperis en „Hungara Vivo" 1974/3 Auld emfazas la gravecon de la poezio de Miĥalski el lingva vidpunkto. Kompreneble en la poezia lingvo de Miĥalski oni povas plej klare rimarki lian talenton, lian vortforman ribelon, ĉar la poezio estas

koncentrita arto; en malgranda amplekso ĝi esprimas grandan enhavon kaj la rolo de la aparta vorto en la poezio estas grandega. Nun ni ne analizos la poezian lingvon de Miĥalski, ĉar tion W. Auld bone faris en la menciita eseo. Por ni pli gravas kial Miĥalski estas la unua signifa Esperanto-poeto, kaj ĉu li estas tia nur el lingva vidpunkto aŭ ekzistas ankaŭ aliaj kialoj?

Kiel ni jam menciis, necesas pluraj kondiĉoj por la apero de genia poezio, kaj nur tiam povas aperi genia poezio kiam tiuj ĉi kondiĉoj realiĝos en unu personeco. Unu el la kondiĉoj estas la ekzisto de io nova, kiu aŭguras ŝanĝon en la vivo, en la pensmaniero de la homoj. Mem Miĥalski vivis kaj kreis en epoko riĉa je historiaj eventoj. Li estis unu el la atestantoj de grandaj sociaj ŝanĝoj. Due, li estis adepto de nova lingvo, kiu promesis ŝanĝojn en la monda kulturo. Krom tio li estis poeto, kiu strebis enrigardi en sin mem, kiu volis analizi siajn pensojn kaj sentojn. Li jam ne parolis je la nomo de la amaso, sed li parolis per sia persona, maltrankvila voĉo.

Kienas mi? Ne donos mi respondon,
ĝin mi ne scias ankaŭ mem;
similas mi ribelvagantan ondon,
batalantan kontraŭ bordoj de problem'.

Dediĉo al L. Ivn

La demando „Kienas mi? " ne estas nur demando, ĉar ĉiu demando en la poezio enhavas ankaŭ la respondon. Tiu ĉi demando estas la vojo al si mem, la vojo al la estonteco. La poeto deziras penetri en sin mem, kaj, ekkonante sin mem, transiri al la nevideblo, al la estonteco. Tio ĉi estas la eterna homa deziro – enpaŝi la estonton, kaj tial ĉiu poezia demando estas samtempa supozo kaj respondo. Pere de la poezio poeto iĝas esploranto, inventanto kaj profeto. La poeto pere de la fantazio kaj de la vorto enpaŝas la nevideblan mondon, la estonton, ĉar nun la vorto donas al ni la certecon, ke la mondo en kiu ni vivas estas konebla kaj ni povas ekkoni ĝin. Per la komparo, per la metaforo ni povas ekkoni la nekonatecon. Ĝuste tion deziras aludi al ni Miĥalski. Ĝuste tio estas la novo en lia poezio, kaj ĝuste pro tio ni kuraĝas diri, ke Miĥalski estas signifa poeto ne nur por la originala Esperanto-poezio.

Al Vi, sfinkse-enigma „os",
ĝis la scienco Vin solvos,
kun poezia patos'
mi florojn-poemojn disvolvos.

Enkonduko

aŭ:

Al foraj kaj viziaj regionoj
mi venas de l' estonto gasto...

Ciklo de l' Arĝenta Astro

Tiu ĉi ekkono, tiu ĉi enpaŝo en la estonton, aŭ la solvo de la *sfinkse-enigma „os"* per la poezio, alportas senliman feliĉon al la poeto, ĉar la feliĉo estas lumigi de la interne ankoraŭ neekzistantan realon, aŭ pli ĝuste, krei realan mondon el la vidpunkto de la estonto.

Aspiras mi per spiro de l' pasio
elkrei novan mondon de la sonoj –
mi, nova pastro de l' venonta dio:
virgino de l' arĝenta astro
de l' fantaziaj tonoj.

Ciklo de l' Arĝenta Astro

Ĉiu liriko estas interna monologo, en kiu aperas la estonta mem, en kiu diskutas la „asa" mem kaj la „osa" mem. En tiu ĉi diskuto riveliĝas la estonta mem al kiu la poeto rekte aŭ malrekte adresas siajn mesaĝojn.

Al Vi, nekaptebla „os",
neniam kaj ĉiam as'anta,
mi sendas poemojn de pensoj-ĥaos'
el mia menso serĉanta.

Enkonduko

Sed la dialogo inter „as" kaj „os" estas ankaŭ konflikto inter la interna kaj ekstera mondo.

Sintezante en vorto-parol'
ĝiajn fortojn de l' en' kaj ekstero,
mi la menson risortos je Vol'
sur la vojo al plena libero.

Enkonduko

Jes, la poeto estas ĉiam sur la limo de „en'" kaj „ekstero", sur la limo de „as" kaj „os", ĉar la poetoj estas tiuj, kiuj rigardas la nuntempon per la okuloj de la estonto:

...mi, nova pastro de l' venonta dio...

Kaj ĝuste tiu ĉi principa vidpunkto igas la poeton profeto, ĉar tiu ĉi estas la vera poeto, kiu havas klaran konscion pri sia misio, kiu en la nuno kreas la estontan homon.

El kaĝo de l' tagvica trivialo
mi celas al mistera transo,
mi – Don Kiĥot' naivkristala –,
por esti for de Sanĉo-Panso.

Ciklo de l' Arĝenta Astro, III

Kaj mem la poeto konscias sian profetan rolon:

Per miaj frenezaj kaj akraj okuloj
penetras al transa mi viv',
kaj kion de vi kaŝas densaj nebuloj
por mi estas ĝi – efektiv'.

El Ciklo „Frenezo", III

Jes, vera poeto vidas pli malproksimen ol ni, li vidas en la estonton kaj tial li restas por eterne.

Eŭgeno Miĥalski, la poeton kiu „ribela Liberon deziras", ni povas nomi la unua Esperanto-poeto, ĉar per sia kreado li ne nur ribeligis nian poezion, sed li kreis novan tradicion en la originala Esperanto-poezio, kaj, kiel skribis William Auld en la jam menciita verko „Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto": „La vere individua voĉo en Esperanto fariĝis realaĵo, kaj nova generacio havis modelojn pretajn."

PANORAMO

Genscher en Budapeŝto

Fine de junio laŭ la invito de sia hungara kolego Péter *Várkonyi* faris viziton en Budapeŝto Hans Dietrich *Genscher,* ministro pri eksteraj aferoj de la Federacia Respubliko Germanio. Inter Hungario kaj FRG ekzistas tre intima kunlaborado sur multaj kampoj – precipe gravaj estas la ekonomiaj kontaktoj: FRG estas la plej grava komerca partnero de Hungario inter la kapitalismaj landoj.

Dum la intertraktoj la du ministroj priparolis ĉefe aktualajn temojn de la duflankaj kontaktoj, sed ricevis atenton ankaŭ la internacia politika situacio. Hans Dietrich *Genscher* estis akceptita ankaŭ de János *Kádár,* ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio.

Kunsidis la nova Parlamento

En la lasta semajno de junio en Budapeŝto kunsidis la nove elektita hungara Parlamento. La kunsidon malfermis kaj prezidis la plej aĝa parlamentano d-ro László *Pesta.* Oni elektis la funkciulojn de la Parlamento, la membrojn de la Registaro, kaj la membrojn de la Prezidiumo, kiu estas la kolektiva ŝtatestra organo de la Hungara Popolrespubliko. Personaj ŝanĝoj en tiuj gvidorganoj ne okazis.

Tiu ĉi Parlamento havos sian mandaton dum kvin jaroj.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Por komerci kun Hungario

International Herald Tribune – usona anglalingva revuo, aperanta ekster Usono – en junio organizis dutagan konferencon en Budapeŝto kun la titolo „Ebloj de komerco kaj investado en Hungario". La konferencon partoprenis 113 gravaj reprezentantoj de la ekonomia vivo en Okcidenta Eŭropo kaj Usono: ili povis renkontiĝi kun la gvidantoj de la hungara ekonomio kaj senpere informiĝi pri tiuj ebloj, kiujn Hungario ofertas al la eksterlandaj investantoj.

La konferencon partoprenis ankaŭ Armand *Hammer,* 87 jara prezidanto de la usona firmao Occidental Petroleum. Hammer jam de

pli ol kvindek jaroj intense laboras por la evoluigo de la ekonomiaj kontaktoj kun la socialismaj landoj.

Kuracistoj kontraŭ nuklea milito

Inter la 28-a de junio kaj 1-a de julio en Budapeŝto kunsidis la kvina kongreso de kuracistoj, batalantaj kontraŭ nuklea milito. En la kongreso partoprenis Willy *Brandt,* prezidanto de la Socialisma Internacio, Bruno *Kreisky,* ekskanceliero de Aŭstrio kaj Halfdan *Mahler,* ĝenerala direktoro de la Monda Sanitara Organizo (WHO).

La alparolantoj substrekis: ĉiutage en la mondo mortas 40 000 infanoj sekve de la nesufiĉa nutrado, dum la mondo jare elspezas 800 mil milionojn da dolaroj por armiloj (cifero kun 11 nuloj!). Nur 0,03 procentoj de tiu sumo (250 milionoj da dolaroj) sufiĉus protekti tiujn infanojn almenaŭ kontraŭ la epidemoj.

+ PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO +

Ferenc Karinthy
(1921 –)

GENIULO

Cleveland, Ohio, Hopkins Airport. Malbona vetero, nebulo, pluvo kun neĝo en la tuta mez-okcidento, malfruas la aviadiloj, laciga atendado dum longaj horoj en la atendejo de la granda aerodromo; kafo, sandviĉo, viskio, enuo, nenifaro, gazetejoj kaj librovendejoj kun broŝuritaj „best-seller" (furorlibroj), dormeme irantaj-venantaj pasaĝeroj, dormetantaj maljunuloj, ploraĉantaj infanoj, starado tie kaj tie, aŭtomatoj, cigaredo, ĉokolado, maĉgumo, glaciaĵo, televidekranoj montrantaj la horaron, sur kiuj mi vane serĉas la ekiran tempon de mia aviadilo, Delay, Delay, t.e., ke ĝi malfruas kaj ree malfruas, soldatoj, maristoj, civiluloj, informejo, kiu ne scias doni informon, Sorry, Sorry, stevardinoj en uniformo, sencele marŝantaj pakaĵ-laboristoj en laborvesto kun malplenaj puŝĉaretoj, foto-aŭtomatoj, senhaltaj kaj nekompreneblaj monotonaj mikrofonvoĉoj, ĉie en la tuta mondo ĉio samas, senespere samas en nia egalmaniere similformiĝinta mondo.

Hoho, tiaĵon ankoraŭ mi ne vidis. Ankaŭ ĝi povas esti iaspeca aŭtomato, almenaŭ laŭ eksteraĵo, sed supre estas nur du, de tempo al tempo ek-ekbrilantaj literoj: I.Q. Internacia, konvencia mallongigo, *Intelligence Quotient,* Inteligenteca Kvociento. Kio estas tio? Mi paŝas pli proksimen kaj legas la sciindaĵojn, la avizon de uzado. Do, mi enigu unu *quarter,* moneron de kvaron-dolaro, mi elektu temon, premu la ĝustan butonon kaj post miaj respondoj donitaj al la demandoj, aperontaj surekrane, estos konstatita senerare, nerefuteble, kun nedisputebla matematika precizeco, mia intelekta grado: supera intelekto aŭ melonkapulo. Newton aŭ Kaliban. Tion mi devas elprovi, tio valoras dudek kvin cendojn.

El inter la proponitaj faktemoj – politiko, sporto, popmuziko, ekonomiko ktp. – mi elektas la grupon Kulturo-Historio, ĉar ĉi-terene mi opinias min esti la plej sperta, la plej ŝanca. Tuj aperas la unua demando: „Kiu estas Raskolnikoff? " – t.e. Raskolnikov. Kaj sub ĝi kvin respondoj, el tiuj mi devas elekti la ĝustan laŭ la numeroj.

1. Rusa militestro en la milito Napoleona
2. Soveta balet-dancisto
3. Heroo en romano de Dostojevski
4. La inventinto de bovofritaĵo nomita pri li
5. Kunlaboranto de Lenin dum la revolucio

Nu, ĉi tio ne estas tro malfacila, la romanon Krimo kaj puno mi legis la unuan fojon en la aĝo de dek jaroj. Venu la sekva demando. „Kiam estis mortigita Julius Caesar? "

1. 44 B.C. (antaŭ Kristo)
2. A.D. 64 (Anno Domini, t.e. post Kristo)
3. 330
4. 1215
5. 1492

Eĉ tio ĉi ne estas pli malfacila-komplika, jam en la lernejo oni martelis al ni en la kapon la jaron kvardek kvar, nu, kiel povus esti vivinta Caesar en sesdek kvar ĉe la brulo de Romo, kio supozeble estas la krimo de Nerono, persekutinto de la kristanoj; la aliaj datoj, kvankam tre konataj, estas nura ŝerco, erarigo, ke estu pli malfacile diveni ĝin.

Post tio: „Kie estas videbla Guernica, la pentraĵo de Picasso? "

1. Nacia Galerio, Londono
2. Louvre, Parizo
3. Prado, Madrido
4. Bildarejo Tretjakov, Moskvo
5. Muzeo de la Modernaj Artoj, Novjorko

Nu, ĝin mi admiris ĝuste pasintsemajne, kompreneble en la urbo troviĝanta en la lasta linio, en la kvindek tria strato. (De tiam ĝi estas reportita en Hispanion.) Ni daŭrigu. „Kiu estis la prezidento de Usono ĉe la militdeklaro en la dua mondmilito? "

1. Woodrow Wilson
2. Herbert Clark Hoover
3. Franklin Delano Roosevelt
4. Harry S. Truman
5. Dwight David Eisenhower

Pri tio mi memoras, tiutempe en ĉiu gazeto vidiĝis lia foto, Roosevelt en pormalsanula puŝĉareto. Nu, al ĉi tiuj demandoj ne estas bezonata escepta erudicio, altgrada inteligenteco. Ni vidu la lastan! „Kiu verkis operon el la dramo Othello de Shakespeare? "

1. Gioacchino Rossini
2. Giuseppe Verdi
3. Johann Strauss
4. Leonard Bernstein
5. John Lennon

Tio jam ne estas unusenca, ĉar krom la ĝenerale konata opero de Verdi, miamemore, ankaŭ Rossini komponis pecon de muziko. Sed, ĉu la fabrikantoj de la amerika aŭtomato aŭdis pri tio? Prefere mi persistas ĉe la unua respondo, do Verdi.

Bone mi decidis, ĉar la aŭtomato tuj aperigas la finan rezultaton, per brilegaj literoj, mian neapelacieblan kvalifikon: „You are a genius." Vi estas geniulo. Nur jene, simple, mallonge.

Nu, jen. Ankaŭ ĝis nun mi konjektis, nur miaj amikoj, kritikistoj iele ne volas rekoni tion. Sed ĉi tiu komputilo estas senerara, neerarigebla. Ĉu ne? Se ĝi diras, ĉu plaĉas-ĉu ne plaĉas, oni devas kredi ĉi tion al ĝi. Kaj ĉion ĉi por kvarona dolaro. La langvora medio, dormema aerodromo subite vigliĝas, koloriĝas. Homoj, pasaĝeroj, portistoj, sveltaj belaj stevardinoj: geniulo iradas inter vi!

Tradukis: István *Nagy*

REVUO DE REVUOJ

Post kiam la brita ĉefministro, s-ino *Margaret Thatcher* persone respondis kun favoro al Esperanto, pro instigadoj de *David Curtis* kaj „Mondo kaj Lingvo" (Világ és Nyelv), hungarlingva E-gazeto, oni devas kun granda atento konsideri la varman salutleteron de la ĉefministrino al la 69a Brita E-Kongreso. Klara sinteno, aŭtentikaj argumentoj: *„Lingvo estas nun la plej granda barilo en komunikado kaj interkompreno..."* kaj *„Paco, komerco, kulturaj ligoj kaj tiom da aliaj dependas de nia kapablo paroli kun la aliaj."* Ĉu ni vidos tiujn frazojn flagri unue en la E-gazetaro, kaj poste, pro agado de niaj agantoj (kiuj aldirektis la atenton de la scivolaj kaj temojn ĉasantaj ĵurnalistoj) en la monda gazetaro? Estas jam ege dezirende en niaj tempoj, periodo de la lavanga premo de la amaskomunikiloj, ke nia movado establu *sian informcentron,* direktatan al ili – samtempe al niaj propraj organoj por disvastigi plej rapide *niajn informojn!* Tiujn, kiuj meritas vastegan publikigon, pro kio la gazetaron informi kapablaj movaduloj, simpatiantoj kaj organoj povas esti necese mobiliziĝi. BRITA ESPERANTISTO (majo-junio) ne certe atingas la menciitajn, kaj ĉu ili alimaniere urĝe ekscios la suprajn deklarojn, estas tre dubinde! Ne utiligi tiujn vortojn, estus vere pekego, kiun nur triumfanta movado povas permesi al si. Sed triumfonta ne!

Pri altsukcesa iniciato raportis *Stefan Maul* en ESPERANTO AKTUELL (3.), kiu jam forte rilatas la agosferon de la menciita „informcentro", aŭ se vi volas, „informagentejo", kiel ajn multe pli eta (tamen ne bagatela!) ol la konataj gigantoj. UK en Augsburg pere de lerta enkonduka artikolo, kune kun la „ideo de la komuna dua lingvo", sukcesplene vekis grandiozan intereson por la anoncita E-kurso en la ĵurnalo AUGSBURGER ALLGEMEINEN. Komprenu bone la eldirojn kiuj amase revenis kiel eĥo: „finfine nun venis eblo E-on lerni! " Kaj tion substrekis – super ĉiuj esperoj de la redakcio – surpriza aro da mendoj pri la kurs-libro kaj magnetofonkaseto, enhavantaj la (samtempe) publikatan kurson de la prestiĝa ĵurnalo. Pro tiu publikigo, ankaŭ la legantaro, la publiko atribuas al Eo prestiĝon, tiom altan, kian surloke aŭ enlande, eventuale (eble tro ofte!) Eo malhavis.

La agado en kaj por nia Afrika movado dum la lastaj jaroj palpeble plifirmiĝis. Tiu – por ni – ĝis nun malkontentige blanka kontinento, komencas ricevi iom da koloro, kvankam ni evitu jam paroli pri verdo. Admirinde montriĝis ia nova: KONTAKTO (90.) povis redakti tre legindan numeron plejparte el artikoloj ricevitaj kaj verkitaj de afrikanoj-samideanoj. Togo, Benino, Nigerio, Eburio... kaj aliaj landoj de tiu malnova tero prezentis temojn pri sia vivo, pri siaj diversaj problemoj plej gravaj – oni ekkonas el la fonto aferojn, finfine, kaj ne de rapidvizitantoj, aliokulaj ĵurnalistoj, kiel estas kutime tra la tutmonda gazetaro. Videble, alvenis pli da manuskriptoj el Afriko, ol povis aperi en sola numero de nia brave redaktata junulara revuo. Espereble oni trovos eblon por alifoje publikigi el la skribaĵoj. Tamen ni ne povas forgesi gravan aldonaĵon de *Bernard Golden:* tri Afrikecajn popolrakontojn el Ameriko kaj konvenajn komparojn kun la „radikoj". Io aparte brila interesaĵo por nia internacia publiko!

Pri pacmovadaj aferoj, pri pacon sopiraj poemoj kaj rakontoj en la E-gazetaro oni trovas ne malmulte. Krom kelkaj pli kuriozaj ol vere atentindaj artikoloj ie-tie ensoviĝintaj, ĉu pro sinmontremo de pseŭdo-verduloj, ĉu pro neglektemo de redaktoroj, la Eo-movado ĉiam turnas sian vizaĝon al la homara interpaciĝo, kontraŭ la pereiga nuklea katastrofo, kontraŭ la teruraĵoj de la lokaj militoj. *Jindřich Tomišek* kompilis laŭmonatan sinsekvon de la plej gravaj okazaĵoj en 1984 ĉirkau tiu ĉi aksa problemego de la internacia vivo (PACO 3.): sur 3 paĝoj *trarigardi la fluon* de la agoj kaj protestoj, ĉu de registaroj, ĉu de homgrupoj, ekigas meditojn, kaj surprizojn ĉe la enpensiĝema leganto.

Jubileas la plej belaspekta E-revuo, redaktata, bone videble, kun plej granda zorgemo. EL POPOLA ĈINIO (5.) aperas jam de 35 jaroj! Longa-longa periodo estas tiom da jaroj por E-gazeto, efektive jam brava, veterana aĝo, kiun nia movado ĉie ajn alte respektas kaj omaĝas, Havante veran plezuron dum foliumado de ĝiaj paĝoj, oni nun kun admiro rigardas i.a. la multkolorajn *gratulajn* pentraĵojn kaj desegnaĵojn, kiujn ĉinaj pentristoj dediĉis por gratuli la Jubileanton, nian fratan revuon. Estis elstara ideo, okaze de tiu jubileo prezenti deproksime. la redakcion, la kunlaborantojn, persone kaj vere per-sone (kun iliaj vortoj kaj vizaĝoj), tiel enrigardi iomete en ilian klopodadon. Al la aro da gratuloj, ni aliĝas, modeste, kun bukedo de niaj literoj, kun amikaj deziroj al pluaj belaj sukcesoj, dum via brava agado koniganta la popolon kaj landon de la nova Ĉinio!

Nu, tute aliloke, certa Jozefo *From,* kvankam ne tiel pie, kiel lia nomo (=pia) ŝajnigas, inventis grandiozajn novaĵojn. Ni citu tre belan: „Nova kapitalisma civilizo ebligas al ĉiuj siaj civitanoj fariĝi relative riĉaj." Kun granda ĝojo ripetis tiun inventaĵon (ventaĵon) surstrate en Dublino kaj Romo, Bonno kaj Bonaero, la multaj milionoj da senlaboruloj, la senpostenaj instruistoj kaj la senpaciencaj junkuracistoj. En komunismaj landoj „la laboro estas io *hontiga,* malestiminda! ", komparebla nur al la feŭdismo – fantazias nia stranga „eseisto". Kaj tiuj hontantoj baldaŭ detruos, kune kun la 3a mondo, „la okcidentan civilizon en terura kolizio". Jen militincite-mulo en revuo multe pli malmulan nivelon meritanta (MONATO 3.).

Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

La revido

La 15-jara Emil, kiu jam depost 8 jaroj edukiĝis en ŝtata edukejo, ricevis permeson por viziti siajn gepatrojn. Lia patro estis alkoholisto, kiu se ebriiĝis, trabatis la edzinon kaj la filon. La patro, cetere bone salajrita laboristo, sobriiĝinte riparis la frakasitajn meblojn kaj donis monon por la mastrumado.

Bedaŭrinde la drinkado pli ofte ripetiĝis, kaj kiam la patro denove minacis mortigi ilin, la 7-jara Emil eskapis el la hejmo. Post tritaga vagado policistoj en alia urbo kaptis lin, kaj la juĝista decido sendis la knabon al la ŝtata edukejo.

Lia trajno nur posttagmeze estis ekironta, sed Emil jam matene forlasis la instituton. En Budapeŝto la jarfina neĝo jam degelis. Pro la tago de Silvestro la stratoj estis plenplenaj, la strataj vendistoj akre-laŭte ofertis la „novjaran porkidon" el ĉokolado, la sukeran hufferon, kaj aliajn gajigajn petolaĵojn. Emil en la stacidomo sidiĝis sur benko. Monon li ne havis, nur veturbileton kaj scivole rigardis la gajajn homojn. Emil eklegis la leteron, kiun sendis lia patrino:

„Mia karega fileto! Por mi estus la plej granda feliĉo, se mi povus brakumi vin en la lasta tago de la jaro. Sed antaŭ kelkaj tagoj via patro denove estis ege ebria, kaj kiam mi menciis, ke estus dece inviti vin, li respondis: – Nia filo ne kuraĝu aperi antaŭ miaj okuloj, ĉar mi edukos lin per bastono!

Mia kara, kiel ĉiujare, via patro por Silvestro abunde donis monon, mi devas baki kaj kuiri por ke noktomeze li ebriigu sin. Mi timas, se vi venos, estos granda skandalo kaj ni kune devos nin savi ien. Kun multaj kisoj: Via patrino."

La vizaĝo de la knabo malsereniĝis, kaj dum minuto li sentis emon reiri al la edukejo. Tamen li decidis vojaĝi. Okazos, kio okazos...

Li trovis lokon en malplena kupeo. Li sentis dormemon, ĉar jam de tagoj li ne povis bone dormi. Estis varme, liajn piedojn agrable varmigis la subbenka hejtilo. Ankoraŭ li obtuze aŭdis, ke homoj paŝas, fermiĝas pordoj, oni kriadas „feliĉan novjaron! "

Emil vekiĝis. Li vidis trans la fenestro, ke dense falas neĝo. Poste kun surprizo rimarkis, ke vidalvide sidas ĉarma knabino, eĉ jam fraŭlino. Verŝajne ŝi alvenis, dum li dormis. Abrupte li sentis malsaton, sed liaj pensoj turniĝis al la eleganta blonda knabino.

Ŝi ridetis iomete, poste elrigardis tra la fenestro al la stacidomo. Multaj elvagoniĝis tie, kelkiuj venis, sed en la kupeo ili restis duope. La knabino elprenis sukerpaketon kaj prezentis ĝin al Emil:

– Bonvolu preni... bonaj ĉokoladoj.

– Dankon.

– Mi iras hejmen... almenaŭ dum la vintra ferio mi estu en familia rondo... mi jam tre sopiras revidi ilin... Mia patro atendos min ĉe la stacidomo... Ĉu vi ankaŭ estas gimnaziano? – vortgalopis la knabino.

– Jes... mi estas en la unua klaso... – Emil respondis heziteme, tamen triafoje preninte el la ĉokoladoj.

– Ĉu via patro estas brava homo? Ĉar la mia estas vere admirinda!

– Kompreneble... mi pensas, ke ĉiu patro kutimas dorloti sian filon... – respondis dusignife Emil.

Ekstere forta vento blovis la neĝon. La knabino senpacience rigardis plurfoje sian horloĝon, kaj preparis sin por elvagoniĝi. Dume ŝi prenis spegulon kaj rigardis ŝin. La paketon de ĉokoladoj ŝi transdonis al la knabo kun afabla rideto:

– Konsumu ĝin trankvile... hejme mi trovos sufiĉe da ĝi... Kaj mi deziras al vi feliĉan novan jaron!

– Dankon... feliĉan novan jaron ankaŭ al vi!

Emil viŝis la vaporon desur la fenestro, sed la nomon de stacidomo li ne povis deĉifri. Li vidis, ke sur la malplena kajo staras alta viro, kiu jam ekiris al la knabino, ĉirkaŭbrakis unu la alian, longaj minutoj pasis tiel. Kiam la vagono preteriris ilin, la knabino ankoraŭ premis sin al la patro.

Emil, jam sola, malgaje rigardis la forlasitan sidlokon de la knabino. Li aŭskultis la muĝadon de la vento, la monotonan klakadon de la radoj. Tiel stranga estas do la vivo, li pensadis. Iu estas feliĉa, dum alia estas maltrankvila, kiel li, kiu devas eĉ timi de la venontaj horoj!

La vagonaro rapide bremsis kaj skuiĝante haltis. Multaj elvagoniĝis. Li metis la ĉokoladon en la poŝon, alian pakaĵon li ne havis. La neĝoflokoj malvarmigis lian vizaĝon. La laŭtaj bondeziroj baldaŭ postrestis, kaj li iris plu tra etaj stratoj. Ambaŭflanke la fenestroj flave lumis, kaj li preskaŭ sentis, ke en la domoj regis agrabla varmo. La vento denove forte ekblovis, puŝis lian dorson ĝuste al la direkto de la gepatra domo. Emil haltis antaŭ la pordo. Per tremanta mano li sonorigis, tenante en la alia mano la ĉokoladon por doni ĝin donace al la patrino.

* *

Kara Leganto! La redakcio ne scias, kio okazis poste en la gepatra domo, tial ni petas vian helpon. Ni esperas, ke multaj kursanoj ricevos kiel taskon de la kursgvidantoj, daŭrigi kaj fini la supran rakonton – ĉu kolektive, ĉu memstare, depende de la jam akiritaj lingvokonoj. La plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto aperos en Hungara Vivo.

Limdato: *du monatoj post la apero de tiu historio.*

DAŬRIGO

de la novelo „Skandalo en la vilaĝo"

aperinta en la numero 1985/1

Daŭrigas: Jiři Karen, Prago, CS

Ĉiuj konsterniĝis. Sed antaŭ ago, oni devas mediti. Do meditis ĉiuj. *La patro de la fianĉo* tiel Tiu neatendita kuglo! Al mi ŝajnis, ke Ada estas obeema filino: „Jes, paĉjo, vi pravas, paĉjo" kaj tiel plu! Bela, belega hipokrita simulantino. Kion fari nun? Ŝajnigi, ke nenio okazis? Ne, centmile ne! Iri hejmen tuj, kaŝi nin endome kaj paroli kun neniu. Atendi tion, kio okazos pli poste.

Meditis ankaŭ la *patrino de Karlo:* Agu la gepatroj de Ada. Malbone ili prizorgis la edziĝfeston. Nur ili kulpas.

Nenion scii pri sia filino? Nun ili zorgu! Tiu sinjoro NULO, tiu inĝeniero Adamo, tiu malriĉulo, tiu sveltulo, kiu tiom influis Adan! Hejmeniri, rapide nin kaŝi. Kia skandalo!

Meditis pri la okazaĵo ankaŭ *la patro de Ada:* Ĝuste tion devis prepari surprize mia Ada, mia filino! Feliĉon mi volis por ŝi. Karlon atendas bela kariero. Li – estonta kooperativestro. Kia ŝanco: kiom da influaj konatoj havas liaj gepatroj en la ĉefurbo. Vi, malsaĝulino, komforte vi povus vivi. Resti hejme, zorgi nur pri la infanoj, veturadi vizite al Balatono, al Budapeŝto, aĉetadi kion vi ŝatus havi. Vi helpus firmigi la karieron de via edzo, gastigi influajn amikojn. Nature nur ŝatatajn, signifajn. Kaj vi, Karlo, ne sciis regi Adan. Vi, dikulo, stulta, kredinta, ke viaj gepatroj ĉion ordigos anstataŭ vi. Kion fari? Konduti normale. La domego plenas de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Tion oni devas konsumi. Do, ek al laboro konvinki la plejmulton resti kune.

Kaj Adamo, vi, inspiranto de tiu ĉi skandalo! Mi montros al vi, kiu mi estas. Ankaŭ vi, Ada, baldaŭ konstatos, vian eraron. Vi kaj zorgoj! Al tiuj vi ne estas alkutimiĝinta. Vi revenos certe. Nun do ŝajnigi, ke ĉio normalas. La fianĉo restas. La venonta edziĝfesto okazos alimaniere. Hej, Karlo, kuniru. Nenio okazis, ĉu ne?

La aferon pripensis la *patrino de Ada:* Ŝajnigi, ke okazis nenio? Malsaĝa solvo. Mi konas Adan pli profunde ol mia edzo. Tiu mia edzo! Nenion scias pri sia filino. Ŝi estas fiera, eĉ se ŝi faris eraron, neniam ŝi konfesos tion. Kaj ŝi pravas! Karlo estas bonulo, jes. Ne malbonus ilia komuna vivo ekonomie kaj finance. Ĉion ŝi havus. Facile kaj tuj. Sed... sed Adamo estas por Ada pli bona partnero ol Karlo. Filino ĉiam meditema, subtile sentema, ĉiam librojn leginta, eĉ poemojn skribinta. Kaj Adamo? Malriĉulo, orfo, sen influaj kontaktoj. Sed novaj viv-kondiĉoj produktos novajn eblojn. Ĉu ne estas pli bone esti komence malriĉa, vivi modeste, sed kun amata viro? Mi edziniĝis ne favore kun mia edzo. Mi ne amis lin. Kia agresema homo! Aŭdaca? Jes. Batalema? Jes. Kiam aperis la nova reĝimo, li tuj transdonis ĉiun sian havaĵon al la vilaĝa kooperativo, li kiel unua aniĝis al la partio. Ankaŭ kapablulo li estas. Kaj tamen mi ne amas lin. Mi edukiĝis en alia tempo. Tiam oni devis obei la gepatrojn. Tiam oni fakte mizerus, se oni volus iun malriĉan ami. Kara Ada, vi bone solvis la problemon de via vivo! Certe ne facilos via vivo. Mia edzo ne ĉesos ataki Adamon. Ah, miaj nespertaj karuloj! Domaĝe ke mi ne ordigis mian vivon laŭ via modelo. Tute alian vivon mi ĝuus. Sed por mi estas jam malfrue. Jes, kaj ĉio jam finita.

* *Tiun ĉi daŭrigon mi daŭrigos en la sekva numero.*

La historio de la teo

„Ŝutu teo-pulvoron inter la perlogutojn. Kiam la vežiketoj havas la formon de fiŝo-okuloj, la akvo ankoraŭ ne estas matura. Ŝutu en ĝin iom da salo kaj atendu, ĝis kristalaj perloj komencas suprenflugadi. Tiam ŝutu pulvoritan teon en la akvon inter la perloj kaj kuiru plu. Ne ĉagreniĝu, se ondoj komencas ekesti sur la surfaco: verŝu al ĝi kuleron da akvo kaj la bolanta teo trankviliĝos, la akvo reakiros sian junecon."

Li Ju antaŭ 1300 jaroj verkis pri la teo serion da libroj. Li estis fakulo de teo kaj liaj verkoj ne perdis sian aktualecon eĉ hodiaŭ... Iom pri la teo mem:

Ĉu vi scias, ke tiun ĉi bongustan trinkaĵon en Ĉinio la homoj trinkas jam depost 5000 jaroj?

Regantoj uzis ĝin kiel medikamenton en la antikvaj tempoj. Oni miksis gin kun spicoj diversaj kaj tiel trinkis.

La teo-trinkado baldaŭ iĝis populara. La ĉinaj imperiestroj postulis, ke la homoj pagu por la teo multan imposton. El Ĉinio al Japanujo budistaj monakoj portis la teon, ankaŭ tie ĝi fariĝis „nacia trinkaĵo". En Azio ĝi rapide disvastiĝis: en Vjetnamio, Hindio, poste eĉ en Afriko.

En Eŭropon verŝajne Marco Polo portis la unuan sciigon pri ĝi, en 1285 kiam li vizitis la ĉinan imperiestron. Tiam li aŭdis, ke la popolo murmuris kontraŭ la teo-impostoj. En Nederlandon kaj Anglujon oni portis la teon dum la 17a jarcento. Sed pli vaste ĝi farigis populara nur dum la 19a jarcento.

La teo poste atingis pluajn Eŭropajn landojn, ĉefe pere de karavanoj. (Tiu speco estis pli bonkvalita pro la dezerta sekeco. La teo liverita perŝipe ne estis tiel bona.) La dezerta varmo utilis al la gusto-konservado de la teo.

En la 19a jarcento eń Ruslando oni provis kultivi ĝin, sed ne kun granda sukceso. La 40 plantejoj dum la unua mondmilito pereis, sed poste en la montaro Kaŭkazo oni atingis gravan sukceson kaj ĝi daŭras ankaŭ hodiaŭ.

Teo kaŭzis eĉ militon! Inter la angloj loĝantaj en Anglujo kaj Ameriko estis multaj disputoj pro la teo-dogano, kiun la amerikanoj ne volis pagi. La angla reĝo sendis milit-trupon al Bostono, ĉar en la tiea haveno oni ĵetis la teon en la maron (16-a de decembro 1773). Tio estis la fama Bostona „teo-posttagmezo". – Ties daŭrigo estis la batalo por la sendependeco kontraŭ Anglujo.

Do, tiamaniere teo influis eĉ la historion, ĉar post tiu batalo fondiĝis Usono!

Tibor *Beŝŝenyei*

István Nemere

LA TREZORO

4. Onklino Gracia ekagas

Ili tri time eniris la banĉambron. Sur la planko, antaŭ la banujo kuŝis ledjaka, iom kalveta vireto. Li havis ĉirkaŭ kvardek jarojn. Liaj okuloj strange eliĝis – verŝajne pro la fortostreĉo: li volis liberigi sin el la ŝnuregoj. Gracia zorgeme lin ŝnurligis de la kapo ĝis la maleoloj. Meze de lia frunto granda ŝvelaĵo signis la lokon, kie li karambolis kun la fera ombrelo de la onklino.

– Lasu min foriri! – li kriis kolere-time.

– Kion ni faru pri li? – demandis Laŭra pale.

– Ni transdonos lin al la polico! – decidis Petro; li ne sciis, kial li subite ekmalamis la nekonaton. Ĉu ne sufiĉas, ke banditoj persekutas ilin – nun ankaŭ iu malgranda rompŝtelisto ĝuste ilian loĝejon elektis por sia fia laboro? Aŭ... aŭ tio ne estis hazardo?

Petro aliris la kuŝantan viron, surgenuiĝis apude. Li strebis konduti tiel, kiel li vidis tion en filmoj. Minacmaniere li kaptis la jakon de la viro:

– Parolu! Kiu ordonis al vi veni ĉi tien?

– Al mi? Neniu! Mi rompŝtelis, ĉar kredis, ke neniu estas hejme... mi volis trovi iom da mono... en la ŝrankoj – li balbutis konfuzite.

Post ioma hezito Petro iris al la telefono kaj raportis la aferon al la polico. Post kelkaj minutoj alvenis nigra aŭto. Tri uniformuloj forkondukis la malfeliĉan rompŝteliston, dume la kvara notis la vortojn de onklino Gracia, poste ankaŭ li foriris. Kiam ili finfine restis solaj, la maljunulino sidiĝis sur sofo de la salono (ŝian loĝejon malnovaj mebloj faris tre karakteriza), kaj severan rigardon ĵetis al la gejunuloj:

– Nu, infanoj! Mi volas aŭdi la tutan historion, de la komenco ĝis la fino!

– Sed kara onklino... kion ni devus rakonti? – Petro provis iomete ŝajnigi ke ili ne scias, pri kio temas. Sed Gracia – ŝiaj blankaj haretoj tremis apud la tempioj – estis senindulga:

– Knabeto, ja mi posedas logikon ! Ĉu vi scias ĝenerale, kio estas la logika pensado? Mia cerbo funkcias bonege ! – ŝi diris tute ne modeste, dume perfingre frapetis sian kranion: – Mia cerbo jam pli frue alarmis min! Unue: iuvespere vi alvenis neatenditaj, aspektantaj kiel persekutatoj... Due: vi jam antaŭsciis, ke iu rompŝtelisto vizitos mian loĝejon. Trie: Petro, antaŭ kvaronhoro vi demandis la krimulon: „kiu ordonis al vi veni ĉi tien? " Nu, ĉu vi rakontos al mi la veron, finfine?

Laŭra kaj Petro rigardis unu al la alia, poste li ĝemis kaj rakontis ĉion. Gracia atenteme aŭskultis, fine sur ŝia frunto aperis tiom da sulkoj, kiom havas tre junaj melhundoj. Post ioma pensado ŝi ekparolis:

– Unue montru al mi tiun testamenton, poste ni parolos.

* *

Antaŭ la domo staris aŭto, en ĝi sidis du viroj. Unu el ili – ulo kun densaj brovoj kaj grandaj oreloj – rigardis la nigriĝintan straton kaj mallaŭte diris:

– Hodiaŭ nokte ili verŝajne jam ne forlasos la domon.

– Tion oni neniam povas scii – respondis filozofie la alia: maldika, lentuga junulo. – Krome, la ĉefo ordonis atendi ĝis mateno. Do, ni gardos la domon ĝismatene.

Lia kunulo silentis. Ili atendis.

* *

Onklino Gracia demetis la okulvitrojn. La gejunuloj streĉatende observis ŝin.

– Do, infanoj miaj, vi troviĝis en granda malfeliĉo – ŝi diris fine.

– Tion ankaŭ ni rimarkis – respondis Petro amare.

– La teksto de la testamento estas ĉifrita – anoncis la maljunulino decide. – Mi devos ĝin deĉifri. Taŭga estus iu komputilo...

– Ĉu komputilo? – konsterniĝis Laŭra.

– ...Kaj kelkaj fakaj libroj – Gracia finfine rigardis al ili. – Iru dormi, karaj. Mi ankoraŭ iomete pensados...

...Kaj tiu „iometa pensado" certe daŭris kelkajn horojn, ĉar kiam Laŭra kaj Petro matene vekiĝintaj eniris en la salonon, Gracia tute vestita, kun flankenfalinta kapo sidanta dormis sur la sofo. Ŝi vekiĝis je la bruo:

– Kio... kio okazis? Denove rompŝtelisto?

– Tute ne. Nur ni iras labori – Petro ŝin trankviligis. Onklino Gracia ĝustigis siajn okulvitrojn, rigardis siajn notaĵojn kaj tuj rememoris ĉion, kio okazis pasintvespere.

– Do, iru, iru... – ŝi murmuris enpensiĝinte. La gejunuloj vidis, ke ŝi denove mergiĝas en la sekretoj, do tute ne eblas interparoli kun ŝi; Gracia nun estos „neuzebla". Do ili foriris.

* *

Posttagmeze Laŭra kaj Petro kune venis hejmen. Petro rimarkis, ke matene kaj posttagmeze du nekonataj viroj postsekvis lin. Li hezitis, ĉu diri tion al la edzino – sed Laŭra la saman aferon sciigis al li, kiam ili posttagmeze renkontiĝis.

– Imagu, karega, du viroj postsekvis min...

– La saman metodon oni aplikis ankaŭ al mi. Sed ĉiokaze ili estis malpli agresivaj kaj ne atakis!

– Mi jam komprenas nenion – skuis la kapon la edzino – Hieraŭ posttagmeze ĉiumaniere ili volis ataki kaj eble eĉ mortigi nin, kaj hodiaŭ ne...? Ho-

diaŭ ili estis tiel bone edukitaj, ke nur defore observis nin?

– Certe ili ŝanĝis sian strategion.

Kun ioma timo ili eniris la loĝejon. Se la onklino atendos en la malhela antaŭĉambro, kun la jam fama fera ombrelo en la manoj...? Aŭ ŝi jam kuŝas mortigita de krimuloj? Sed malgraŭ tiuj fantaziaĵoj, la onklino sana, kun ĝojego akceptis ilin. Tutvideble neniu malfeliĉo ŝin trafis tiutage. Kun energiplenaj paŝoj ŝi iradis en la ĉambrego nomita salono, turnis sin kun forta aplombo, kiam ŝi atingis muron aŭ meblon – kiel gardanta soldato.

– Nu, finfine vi alvenis! Sidiĝu! – Gracia ordonis. Laŭra kaj Petro miraj obeis. Ili apenaŭ havis tempon por demeti la surtutojn. Gracia severmiene atendis, poste rapide elprenis iun paperon:

– Jen la *mesaĝo* de via patro, Laŭra. Jes, tio estas la ĝusta vorto. Ĉar ĝi ne estas testamento. Ĉu vi ankoraŭ memoras la tekston? Jen la unua frazo: „Mi restigas al vi trezoron, bone ĝin flegu." Do, ni analizu ĝin! La vorto *trezoro* signifas grandan valoron, sed ne nepre diamantojn aŭ oron, tiaĵoj estis nur en iamaj aventurromanoj pri piratoj. La trezoro hodiaŭ povas esti kontanta mono, valorpaperoj, pentraĵoj, eĉ ĉeko, aŭ io alia. Sed unu afero certas: Laŭra, via patro restigis al vi ion tre valoran, sed ne trezoron, ĉar tion oni ne bezonas *flegi*. Do, kio povas esti la trezoro, kiun oni flegas kiel ĝardenon? Ankaŭ tion ni ne scias. Ni rigardu la duan frazon, eble el ĝi ni fariĝos pli saĝaj. „Ĝi donos al vi forton kaj memorigos vin pri mi." Pri la trezoro do ni scias jam tri aferojn: ĝi bezonas flegadon, donas forton kaj memorigas. La sekva frazo: „Se vi ĝin trovos, vi fariĝos riĉegaj kaj fortaj." Tio pruvas, ke temas pri granda valoro. Sed estas maltrankvilige, ke eĉ via patro mem dubis, ĉu vi trovos la heredaĵon aŭ ne? Li skribis: „*Se* vi trovos..." Ni analizu la kvaran frazon: „En la arbaro de la dua monteto, malantaŭ la duobla pordo, dum sunleviĝo." Finfine io konkreta! Mezurota de certa punkto, ne la unua, sed la dua monteto! En iu konstruaĵo, ĉar certe nur tie ni trovos pordon, aŭ pordegon... Kaj la sunleviĝo! Tiu sonas tute kiel en malnova romano. Do, la trovon de la trezoro faciligos iu videbla signo en la momento de sunleviĝo. Kiel ekscite! Kaj ankaŭ la lasta frazo demaskas ion: „Ambaŭ estu feliĉaj." La pluralo, ĉu vi komprenas? Via patro – Gracia la fingron kiel pistoleton direktis al Laŭra – jam sciis, ke vi edziniĝis, kiam li deponis la paperon ĉe la notario.

Laŭra emociiĝis.

– Eble li ŝtelrigardis nin defore, kiam post la geedziĝa ceremonio ni eliris sur la straton. Aŭ li postsekvis nin, kiam ni havis nian nuptovojaĝon?

– Ne fantaziu – Petro malpaciencis. – Onklino, vi preparis tre profundan analizon, sed ĉio ĉi nenion valoras, ja ni ne scias nur unu detaleton: kie troviĝas la domo kun la trezoro!

– Se vi tiel opinias, do vi terure eraras – ektremetis la blankaj haroj de la maljunulino. En ŝiaj okuloj ekbrilis petolaj fajreroj kaj faris etan, specialan paŭzon. Laŭra kaj Petro atendis eĉ forgesintaj spiri. Poste onklino Gracia eldiris triumfe:

– Mi scias, kie troviĝas la trezoro!

(Daŭrigota)



BÉRCI DARÁZS 70-JARA

En la „Enciklopedio de la Hungara Literaturo en Rumanio" volumo I, eldonita en Bukarešto en 1981 oni povas legi iom ankaŭ pri esperantaj rezultoj. Nome sur la paĝo 189 sub titolvorto „Beier Sándor" ĝi donas konatajn indikojn. Okaze de lia 70-jariĝo ni konsideras necese lin prezenti al nia legantaro.

Li naskiĝis la 28-an de marto de 1913 en Orientaj Karpatoj, apud Ĝilkoštô, en la nuna Gheorgheni. Li estas hungaro kun rumana ŝtataneco. Frue, en sia 17-a jaro li aliĝis al la movado, kaj iĝis UEA-membro en 1931. Tion sekvis hungarlingva artikolserio en la lokaj ĵurnaloj, gazetoj, revuoj. Poste li organizis kaj gvidis plurajn kursojn kun ĉ. 350 personoj, el kiuj 107 estis lingvoinstruistoj...

Lia unua poemo „Por velki" (1936) aperis en *Esperanta Antologio,* paĝo 530 sub la verkista nomo Bérci Darázs (neinversigebla vicordo!)

Poemoj, noveloj, studoj, kritikoj, movadinformoj kaj aliaj artikoloj, verkitaj originale de li aperis interalie en:

Heroldo de Esperanto kaj *Paco.*

Vidu nepre numerojn 1958/51-52, 1959/64-65 kaj 1963/114 pri „La ĝojo ĉe Karpatoj estas ankaŭ la via", „Ne enviu min! ". La legantoj povas percepti en ili la ritmon, dinamikon, dimension, impeton de lia laborstilo kaj ankaŭ la rigidajn laborcirkonstancojn. En „Norda Prismo" kaj „Hungara Fervojista Mondo" ofte aperis liaj verkoj. En „Hungara Vivo" 1977/3 li skribis pri Béla Dávid, kiu manskribe, desegne eldonis dek• dekses paĝan gazeton en 1913. Pliaj liaj verkoj legeblas en „Budapešta Informilo", „Informilo de la Internacia Esperanto Muzeo Wien", „Nuntempa Bulgario", „Bulgara Esperantisto", „Esperanta Laboristo" (Paris), „Pola Esperantisto", „Esperanto", „Monda Kulturo" kaj „Oomoto".

Aperinta memstara eldonaĵo: „Homo, lernu de la akvo", Gyula, 1970.

La partopreno de Bérci Darázs ĉe la kongresoj montras la jenan kurtan linion. Landaj: Kalocsa (Hungario), 1940 kaj Tirnovo (Bulgario) 1960. Universalaj: Varsovio 1959 kaj Budapešto 1966.

Lia profesia kariero dividiĝas inter didaktiko kaj praktika ekonomia laboro. Kiel doktoro de ekonomio li agadis kiel baz- kaj mezlerneja profesoro, asistento ĉe la estinta hungarlingva universitato BOLYAI, universitata lektoro ĉe Agronomia Instituto. Naŭ jarojn antaŭ ol iĝi pensiulo li pasigis kiel ĉefekonomiisto ĉe la loka Statistika Direkcio CLUJ-NAPOCA-KOLOZSVAR en Rumanio.

Pli ol dudekkvin mil leterojn li dissendis al la granda mondo pri problemoj movada, lingvistika, didaktika, literatura.

Li kiel ekonoma oficiro en rezervo partoprenis la mondmiliton de marto 1944 ĝis la 9-a de majo 1945. De la sekva tago ĝis 1948 decembro tra Stockerau (Aŭstrio), Rîmnicul-Sarat (Rumanio), Zaporoĵje (Sovetio) daŭris la militkaptiteco. En Zaporoĵje li gvidis E-kurson por oficir-kaptitoj sen lernolibro, sen vortaro.

Li havas la jenajn verkojn en manuskripto:

„Monumento por Kétvizköz". Plejparto de ĝia enhavo aperis jam en diversaj revuoj.

„En la arbaro de Ŝomkut" enhavas novel-serion pri la plej gravaj problemoj de la homaro.

„La Titana Skolo" estas studo-serio pri la historio de „Literatura Mondo" kaj ĝia signifo en la movado. Ĝi aperis en daŭrigoj ĉe Oomoto 1970-1971.

„Senvenenaj Sagoj". Kolekto de primovadaj kritikoj. Vidu la gazeton Esperanta Finnlando 1969-1970.

„Krie mesaĝi al Réztorok" enhavas la postan verkadon. Ĝenerale pli ol la duono de la supra materialo jam aperis en diversaj presorganoj, tamen ili sopire atendadas la libroformon deposi du jardekoj.

Lia hungarlingva verkaro post la kolekto de memstaraj artikoloj riĉiĝis per aŭtobiografia romano, kies sinteza titolo estas: *„Talán ember lesz belőlünk"* (Eble ni iĝos homo): la knabeto kaj liaj kunuloj kreskos, lernos kunvivadi, solvos la sociajn problemojn sen milito kaj ne viktimiĝos, sed regos la nuklean forton.

El ĝi estas preta la unua volumo: *„Atölelem a világot"* (Ĉirkaŭbrakante la mondon) kaj la dua *„Kétvízköz nem ereszt"* (Kétvìzköz ne cedas). La propra nomo ne estas kvartalo, nur grupnomo de kelkaj stratoj ĉe la rando de la urbo. Ĉi nomo ne figuras sur la urbo-mapoj, nur la tiea loĝantaro uzas ĝin, sed por li signifas la infanaĝon. Tiu marĝeno estas kaj restas kara por li, espereble ankaŭ por la legontoj. La periodo 1913-1948, la duono de la vivo estas preta.

Sub verkado troviĝas la tria: *„Mégis szêp volt..."* (Tamen estis bele...) kaj la kvara: *„A réztoroki vár"* (La fortikaĵo de Réztorok), se aperus la unua duono. Ekscita, bela temo estus la periodo de 1949-1985. La hungarlingvan verkaron li subskribas per la pseŭdonimo: HETHELYI Zoárd.

Nun li estas 70 jara. Sed lia plumo daŭre ne konas lacon.

Jaques Prévert

La ĝardeno

Miloj kaj miloj da jaroj
Ne sufiĉus
Por priskribi
La etan sekundon de eterneco
Kiam mi vin kisis
Kiam vi min kisis
Unu matenon en la lumo de l' vintro
Ĉe la parko Montsouris en Parizo
En Parizo
Sur la tero
La tero kiu estas astro.

El la franca: Aldo de' Giorgi

Originala Poezio

Aleksej Ĵuravlov

Versoj

„Ne povas esti! " – krias vi,
vidanta la najbaron brave
la aŭton stiri. Kaj envi'
en vi naskiĝas – eble prave? –
kaj restas jam ĝis fin' de l' viv'.

„Ne povas esti! " – flustras vi,
vidante inon, tente ĉarman,
promeni kun belul'. Envi'
en vi deziron vekas varman
kaj restas jam ĝis fin' de l' viv'.

„Ne povas esti" – certas vi,
vidanta la aŭtoron moke
ori vi aludi. Ĉu envi'
en vi naskiĝas postprovoke,
ĉu restas jam ĝis fin' de l' viv'.

Amiko! Se l' envi' en-vias,
al kiu, diru, vi envias?

Jiří Karen

Printempa kanto

Antaŭ belaj kruroj de la suno
genuas ame la natur'
Printempo tra kampoj kuranta
sin al ni pelas

Sentrankvilon vidu en la herbejoj
Ho! Per pistoloj de pistiloj
la floroj kontraŭ niaj
amplenaj koroj lume pafas

Printempo kara
longe restu ĉe ni
Atendetu Ne foriru
Tiun ĉi jaron eble

iuj el ni
vidas vin
laste

Julio Varga

Rosoguto

Infano de la nokto ferkolora.
Prezentas ĝin l' aŭroro roza, ora,
el granda mondo estas eta ulo,
perfekta, ĉarma, sorĉa, era bulo.
entenas sunradion, do ĝi riĉas,
kisadas florpetalojn: ĝi feliĉas,
valoras, brilas, gem', juvelo estas,
fieras, kiel krona kap' majestas;
la tempo urĝas: estas sinofera
la kurta viv': ne ŝajn', sed faro vera,
forflugas ĝi, kaj sorbas la ĉielo,
– ĉar pura – kaj revenos al la tero.

Imre Szabó

Tri variantoj pri la sama temo

trans kaj tamen en
en kaj tamen trans
dume milfoje tra

*

febro vi estas
deinterne palpas
miajn ĉelojn
forte mole nekapteble

kiel mi forŝiru vin?

*

mi staras hezite
kaj ĉifonadas la vortojn
mian dece deprenitan
vizaĝon.

Kion diri?

Tibor Beŝŝenyei

Romanco

Para stelo surĉiela
por mi via okulbrilo.
Ridado de viaj lipoj
kiel muzikanta grilo.
Veluro de via haŭto:
florburĝono en aprilo.
Blonde-ondaj viaj haroj:
fuĝas for de mi trankvilo.
Se mi vidas vin proksime,
por mi estas la jubilo.
Se min zorgoj persekutas
por mi estas vi azilo.

Sen vi malplenas la koro,
estas vi mia deziro.
Viaj manoj min karesu,
min konsolu via diro.
El via senfina amo
ne ekzistu jam eliro.
Viaj kisoj por mi estu
viviganta eliksiro.
Min konsumas por vi ĉiam
– eble ne vane –, sopiro.
Estu mia, kara mia,
tute, ĝis la lasta spiro.

Aliulon ne aŭskultu
sur la tuta, granda tero.
Nur ĉi miaj nunaj versoj
estu por vi bela sfero.
Aliulon ne aŭskultu
sur la tuta, granda tero.
Nur ĉi miaj nunaj versoj
estu por vi bela sfero.
Kaj se venas al vi de mi
amo-porta kuriero,
ĝin akceptu, ĝi mielas
dolĉe, pli ol la sukero.
Pli odoras, ol en korto
odoranta rozo-belo.
Por mi via okulbrilo:
surĉiela, para stelo.

Dr-o Georgo *Hevesy*

Pri la uzo de la pronomoj

La esperantlingva **teksto** nepre devas esti klara kaj unusenca. Sekve oni devas **ĝin** formuli precize kaj nemiskompreneble. En Esperanto specialaj normoj regulas, determinas tion, ke – en certaj kazoj – kiu (kiaspeca) pronomo (ordinara triapersona, montra aŭ refleksa pronomo) devas esti uzata, por anstataŭi, aludi, koncerni substantivan frazelementon aŭ alian pronomon. Ĉi tiuj specialaj reguloj formas normosistemon, kiun determinas la jenaj cirkonstancoj:

A./Oni devas anstataŭi, aludi, koncerni per pronomo aŭ tian frazelementon (substantivon aŭ pronomon), kiu estas la **subjekto** de la propozicio (frazo), aŭ kiu estas **cetera frazelemento** (objekto, prepozitivo, predikativo).

B./Oni devas anstataŭi, aludi, rilatigi per pronomo la frazelementon (substantivon aŭ pronomon) **aŭ en la sama propozicio, aŭ en la sekva** (posta) **propozicio.**

Jen la ĉi-koncernaj specialreguloj, t.e. la normosistemo:

1./Por anstataŭi, aludi, koncerni la **subjekton** (substantivon aŭ pronomon) – **en la sama propozicio – oni devas uzi refleksivon** (refleksan pronomon). = /si, sin, sia/

2./ Por anstataŭi, aludi, koncerni la **subjekton de la antaŭa propozicio** (frazo) – **en la sekva** (posta) **propozicio – oni devas uzi ordinaran triapersonan pronomon.** = /li, ŝi, ĝi, ili, lia, ŝia, ĝia, ilia/

3./Por anstataŭi, aludi, koncerni **ceteran frazelementon** (objekton, prepozitivon, predikativon) – **en la sama propozicio – oni devas uzi ordinaran triapersonan pronomon.** = /li, ŝi, ĝi, ili, ktp., same kiel en la 2-a normo./

4./Por anstataŭi, aludi, koncerni **ceteran frazelementon troviĝantan, funkciantan en la antaŭa propozicio** (frazo) – **en la sekva** (posta) **propozicio – oni tiuokaze devas uzi montran pronomon, se la subjekto kaj cetera/j/ frazelemento/j/ funkciantaj en la antaŭa propozicio** (frazo) **estas samseksaj kaj ununombraj, respektive plurnombraj** (substantivoj aŭ pronomoj); kaj oni povas (laŭplaĉe) **uzi alternative aŭ ordinaran triapersonan pronomon, aŭ montran pronomon, se la subjekto kaj cetera/j/ frazelemento/j/ troviĝantaj en la antaŭa propozicio (frazo) estas malsamseksaj aŭ malsamnombraj** (substantivoj, pronomoj).

Ĉi-lasta normo klarmetas tion, kiuokaze oni (nepre) devas uzi montran pronomon (tiu, tiun, ties), kaj kiuokaze oni povas uzi alternative ordinaran triapersonan aŭ montran pronomon.

Demonstro, interpreto:

1./La instruisto amas **sian** (la propran) edzinon; = La instruisto amas **lian** (de iu alia) edzinon. – Li retenis **al si** la monon trovitan. Mia amiko kulpigas **sin pro sia** fatala eraro. – La kato ofte lavas **sin.** – La direktoro sendis voki (venigis **sian** kuraciston. – Li estis batita de **siaj** amikoj, kvankam li ne tre volonte lasis **sin** bati (draŝi) per **siaj** amikoj. Koni **sin mem** estas laŭdenda virtuo.

2./Kiam mia amiko alvenis, **li** tuj vokis sian filon. La instruisto konfesis al sia kolegino, ke **li** amas ŝin. La patro ne sciis, ke **lia** filo ekamis la filinon de **lia** najbaro. La edzino konstatis, ke **ŝia** kara edzo estas ebria. Eva sidis en la parko, kie **ŝiaj** gefiloj estas ludantaj. La ĉevalo diligente trenis la ĉaron, kvankam **ĝi** estas jam laca. La hajlo faris grandan malutilon. **Ĝi** hakis la rikolton.

3./Mi renkontis **Evan** kaj **ŝian** amikinon. Karlo vizitis sian **amikon** kaj **lian** patron. La mastro tiris la **ŝteliston per liaj oreloj** el sub la lito. La ĉasisto aĉetis **ĉashundinon** kune kun **ĝiaj** hundidoj. Oni manĝas la **ovon sen ĝia ŝelo.** Lia hejmo (domo) estas bela konstruaĵo kun kelo sub **ĝi.** Antaŭ la domo **de Karlo** mi vidis **lian aŭton** sen **ĝia** (de la aŭto) ŝoforo. Antaŭ la domo **de Karlo** mi vidis stari **lian** (de Karlo) aŭton sen **lia** (de Karlo) ŝoforo. – Tamen: Lia aŭto (subjekto!) staris antaŭ lia domo sen **sia** (de la subjekto „aŭto") ŝoforo.

Renkontiĝo, koincido de la 2-a kaj 3-a normoj: Eva ĝuste tiam paŝis en la ĉambron, kiam la sekciestro riproĉis (la) tajpistinon kaj ŝian (? Ĉu de Eva aŭ de la tajpistino) amikinon. Per la ŝanĝo de la vortordo, aŭ per la uzo de la genitiva formo oni povas unusence formuli jene: Eva ĝuste tiam paŝis en la ĉambron, kiam la sekciestro riproĉis ŝian (de Eva) amikinon kaj la tajpistinon; aŭ kiam la sekciestro riproĉis la tajpistinon kaj la amikinon de Eva; respektive = kiam la sekciestro riproĉis la tajpistinon kaj la amikinon de la tajpistino. Jen simila modela frazo: La advokato informiĝis pri tio, ke la polico arestis (la) librotenanton kaj lian (?) bofraton. Ankaŭ nun helpas la metodo antaŭe prezentita.

4./La patro vokis sian **filon,** kiam **tiu** (filo) alvenis. La barono diris **al** sia **servisto,** ke **tiu** portu leteron al lia amiko. Eva abunde regalis sian junan **najbarinon,** ĉar **tiu** helpis ŝin fari ordonon en ŝia loĝejo. (La eventuala uzo de la triapersona pronomo: „ĉar **ŝi** (Eva!) helpis ŝin (najbarinon) fari ordon en ŝia (de la najbarino)

loĝejo" sendube estus nelogika.) – Du instruistoj renkontis siajn **lernantojn.** Ili (instruistoj) vokis **tiujn**, kaj **tiuj** (lernantoj) iris al ili. – La pigo diris **al** la **turto**, ke **tiu** (turto) provu fari pli bonan neston. La vulpo ĝuste volis kapti la leporon, kiam ĉasisto mortpafis **ĝin** (vulpon); kiam ĉasisto mortpafis **tiun** (leporon). Kamionoj alportis **fruktojn.** Oni enmagazenigis **tiujn.** = Oni enmagazenigis ilin. = (kamionojn) La inko makulis la **leteron.** Eĉ **ties** (de la letero) koverto fariĝis nelegebla. – La seĝo puŝiĝis **al** la **tablo**, kaj **ties** (de la tablo) piedo fendiĝis, aŭ ĝia (de la seĝo) piedo fendiĝis. La juro ofte vane provas limigi la **profitavidon**, ĉar **tiu** (profitavido) praktike pruviĝas ĝenerale pli forta, ol ĝi (juro). Cetere la juro tiom similas **al** la **gramatiko**, ke ĝiajn (de la juro) regulojn la advokatoj, kaj **ties** (de la gramatiko) normojn la lingvistoj provadas vortetorde impliki. – La **teatraĵon** akompanis muziko. Ĉu vi trovis, ĉu iis ĝin (muzikon) aŭ **tiun** (teatraĵon) pli bona?

En tiaj kazoj ne estas deviga la uzo de la montra pronomo: La patrino diris **al** sia **filo**, ke **li** (tiu) nepre devas viziti ŝian malsanan kuzon; aŭ ke ŝi devas viziti **lian** malsanan kuzon. La instruisto ekamis sian **koleginon**, sed **ŝi** (tiu) ne reciprokis lian altiriĝon. Eva ĝuste tiam ĝenis sian **bofraton**, kiam **li** (tiu) razis sin en la banĉambro. La librotenanto ĝuste tiam paŝis en la ĉambron, kiam la sekciestro riproĉis (la) tajpistinon kaj lian – ŝian koleginon. Mia fratino tre ŝatas la **sukeraĵojn.** Ŝi preferas **tiujn** (ilin) eĉ al la viando. Karlo abonis fakan gazeton, sed li nur malofte legas **ĝin** (tiun). La vento fordrivis kelkajn **tegolojn** de sur la tegmento. Post la ĉeso de la vento oni kolektis **ilin** (tiujn). En la arbaro oni povas vidi multspecajn **arbojn.** Sur ili (tiuj) nestas diversaj birdoj.

Kunmetitaj frazoj:

kun du rolantoj:

La patro diris al sia filo,
ke li (patro) nepre devas viziti sian malsanan kuzon,
ke li (patro) nepre devas viziti lian (de filo) malsanan kuzon,
ke tiu (filo) nepre devas viziti sian (de filo) malsanan kuzon,
ke tiu (filo) nepre devas viziti lian (de patro) malsanan kuzon.

kun tri rolantoj:

La profesoro (A) promenis kun sia (de A) amiko (B), kiam **li** (A) ekvidis sian (de A) najbaron (C) – lian (de B) najbaron (C) antaŭ sia (de A) domo – antaŭ ties (de B) domo – antaŭ lia (propra) (de C) domo. = **(A) promenas** kun (B), kiam **tiu** (B) ekvidis sian (de B) amikon (C) – lian (de A) amikon (C) antaŭ sia (de B) – antaŭ lia (de A) – antaŭ lia propra (de C) domo.

kun kvar rolantoj:

(A) ŝatas nek sian (de A) najbaron (B), nek lian (de B) amikon (C), kaj se lia (de A) frato (D) kune promenas kun lia (de A) najbaro, aŭ kun ties (de B) amiko (C), ĉi-kaze (A) neniam akompanas sin al ili (al D-B), respektive al D-C).

(A) interparolas kun (B) kaj kun sia (de A) amiko (C);
(A) interparolas kun (B) kaj kun lia (de B) amiko (C).
(A) interparolas kun (B) kaj kun **ilia** (de A-B) amiko (C).
(A) kaj (B) promenas kun la amiko (C) de (A). (du subjektoj!)
(A) kaj (B) promenas kun la amiko (C) de (B). (du subjektoj!)
(A) kaj (B) promenas kun **sia** (de A-B) amiko (C) (du jektoj!)

Kompletigo: Oni anstataŭas, koncernas per refleksivo la aganton (subjekton) de la lasta ago. = Se la determinanto (epiteto aŭ objekta predikativo) de cetera frazelemento esprimas nepredikatan agon, kies aganto estas la cetera frazelemento mem, ĉi-kaze – ene en la agosfero (aparta etapo!) de la nepredikata ago – oni anstataŭas, koncernas per refleksivo la aganton de la nepredikata ago; kaj la subjekton de la propozicio oni anstataŭas, koncernas **tie** per ordinara triapersona pronomo. Ekz.: En la stacidomo mi renkontis mian **najbaron akompanantan sian** filon. – Ili sidis **sub la arbo faliganta siajn** foliojn. - Hieraŭ mi vidis mian **najbaron sidadi en sia** ĝardeno. = La refleksivo tamen uzeblas nur post la vorto esprimanta nepredikatan **agon**, por povi koncerni **ties** aganton. Nome en alia vortordo la refleksivo aludas, koncernas la subjekton de la propozicio. = Karlo vidis en sia (de Karlo) ĝardeno sidadi Petron. En **sia** ĝardeno **Karlo** vidis Petron sidadi.

Gyula Juhász
(1883–1937)

Radiotelegramo

Gefratoj! Homoj nunaj!
Ho, premu manon en danĝeroj kunaj!

Feliĉaj! Suferantoj! Fine
vi antaŭ Bon' omaĝu kapokline!

Venkitoj! Triumfantoj! Celo:
vi unuiĝu en la pura Vero!

Kreduloj! Nekredemaj!
Sangantan homon ami estu emaj!

Revuloj! Militistoj!
En ĉiuj batas kor' kun samaj tristoj!

Gefratoj! Ne mortigu unu
l' alian! Ho, interbrakumu!

Tradukis: Julio Varga

La Fridteknika Industria Kooperativo 30-jara

La iam eta kooperativo – fondita en 1955 – fabrikis komence diversajn ferproduktaĵojn (barilojn, kaldronujojn, ĉaretojn), sed post kelkaj jaroj ĝi eklaboris por priservi la tiutempe disvastiĝantajn fridujojn. Dum tri jardekoj tiu ĉi kooperativo iĝis unu el la plej gravaj kooperativoj en la regiono, en la departemento Komárom.

Pri la fridtekniko la priservado ebligis akiri multe da spertoj. Oni ekkonis la plej konvenajn teknologiojn, ankaŭ la necesajn teoriajn sciojn: en 1964 la K ooperativo komencis fabriki frid-instalaĵojn por la industrio. Post zorga merkatesploro ili restis la sola produktaĵo de la Kooperativo, kiu eĉ ŝanĝis sian firmon je la nuna, tiel manifestante sian celon: fabriki vastan gamon de fridteknikaĵoj.

La evoluo de la Kooperativo estis rapida, kion bone demonstras ankaŭ ĝiaj produktaĵoj.

ELVAPORIGAJ KONDENSATOROJ

Komence de la fabrikado la maso de la kondensatoro estis ankoraŭ 4300 kg. Montriĝis tre grave malpliigi la enkonstruitan materialon, gardante samtempe la kapaciton. Nun la maso – kun simila kapacito – ne atingas eĉ la dekonon de la unua tipo.

Kiam la Kooperativo komencis eksporti (1966), ĝi spertis, ke nur teknike eminentaj, bonaspektaj, modernaj instalaĵoj estas vendeblaj. Tio bezonis pluan disvolvadon. La tipojn kun traspira sistemo baldaŭ anstataŭis la tipoj funkciantaj per trablova sistemo.

La nun fabrikataj kondensatoroj de tipoj TKA kaj TVKA havas teknikajn parametrojn de monda nivelo. (*Tabelo 1.*)

AERFRIDAJ INSTALAĴOJ

La unuaj familioj de tiuj instalaĵoj konsistis el nur kelkaj membroj, konstruitaj el ŝtalaj tuboj kaj lamenoj. Poste oni ekuzis kuprotubojn kaj aluminiolamenojn.

La ege rapida teknika evoluo instigis la Kooperativon ekigi vastan kunlaboron kun universitatoj kaj esplorinstitutoj por disvolvi siajn teknikon kaj teknologion.

La ideo de la sistemo kun aluminiaj lamenoj naskiĝis jam antaŭ 15 jaroj. Tiu materialo kun granda termokonduktivo estas ankaŭ korodrezista, malpeza, do taŭga por fabrikado de energioŝparaj aerfridiloj.

Sed tion realigi, krei la teknikajn necesaĵojn, tute ne estis facila afero. Tamen, rezulte de jardekon daŭranta disvolvo, la Kooperativo nun jam fabrikas laŭserie, sur moderna maŝinaro la aerfridilojn kun aluminiaj lamenoj.

La prospekto pri la plej novaj fabrikaĵoj montras 5 bazajn tipojn kaj plurmilojn da variantoj. La Kooperativo disvolvis specialajn aerfridilojn por certaj fridaj taskoj, bezonataj ĉe la mendantoj. Ekzemple la aerfridilo de tipo HALAS servas speciale por malvarmigi la aeron en prilaborejoj de viandaĵoj kaj kortbirdaĵoj.

Por kontentigi la postulojn pri kompletaj instalaĵoj, estis disvolvita ankaŭ freona aparataro, konvene al la plej preferataj dimensioj en la fridindustrio.

AKVON REFRIDANTAJ TUROJ

La elementoj de la nun fabrikataj TVA-tipoj estas utiligeblaj ĉe preskaŭ ĉiuj teknologiaj procezoj. Ili funkcias praktike sen perdo de akvo, per trablova sistemo, kaj konvene al la nuntempaj postuloj ankaŭ tre silente. Iliajn karakterizilojn montras *Tabelo 2.*

FRIDTEKNIKAJ PUMPILEJOJ

Ankaŭ en rilato de la porindustriaj, grandaj amoniaj frid-instalaĵoj ekzistas bezono tipigi ilin. Tiamaniere eblas pleje prefabriki ilin, kaj lige kun tio malpliigi la surlokan muntadon.

Pere de la kompaktaj fridunuoj – kreitaj por la etaj fridujoj – eblas liveri la tutan frid-cirkviton en unu bloko, kiel prete muntitan unuon.

Sed ĉe la grandformataj industriaj frid-instalaĵoj ĝenerale maleblas krei tipojn kaj prefabrikadon en tiu grado. Pro la dimensioj, maso kaj volumeno de tiuj instalaĵoj, dum fabrikado neniel eblas ilin kunigi, nek tiel transporti. Cetere, ju pli grandaj estas la tiuspecaj frid-instalaĵoj, des pli ili estas unikaj, des malpli ripeteblaj, do ne tipigeblaj. Oni devas kontentigi kreante tipojn kaj prefabrikadon de tiuj

---

Noto de la tradukinto: FRIDI = malvarmigi. Kiel poezia neologismo, en PIV la radiko ricevis adjektivan formon, sed la praktiko (tekniko) uzas ĝin kiel verban radikon: fridujo, -ŝranko ktp.

maŝinelementoj, kiuj bone aplikeblas kaj adapteblas al multspecaj frid-instalaĵoj, ankaŭ transporteblas sur ŝoseo kaj fervojo.

Tia tipigebla elemento de la frid-instalaĵo kun fermita cirkvito, estas la pumpilejo de la frid-substanco senpere muntita al la likvaĵon apartiganta vazo.

La Fridteknika Industria Kooperativo fabrikas pumpilejo-familion, kies seriaj produktaĵoj estas tipigitaj. Dank' al ilia utiligo iĝis pli malmultekosta la realigado de la industriaj frid-instalaĵoj, ankaŭ ,pli rapide fabrikeblaj. Krom tio, eĉ la projektisto de la instalaĵo havas malpli da zorgoj.

KONTENERA RAPIDFROSTIGATUNELO

La termino kontenero iĝis epiteto jam por la tria generacio de tiu varo. La daŭra disvolvado de la fabrikaĵo alcelis unuavice atingi la prete-muntitecon. Tiu ĉi instalaĵo, kapabla frostigi – depende de la varoj – 1000 kg/h, estas frostigilo por industriaj dimensioj, prete-muntita jam en la fabriko, kaj transportebla sur ŝoseo aŭ fervojo. Oni povas ĝin surloke – eĉ subĉiele – post minimuma fundamentado kaj muntado, dum kelkaj tagoj ekfunkciigi. La frostiga temperaturo ebligas -45 C gradojn.

GRAJNO-FRIDILO

La Kooperativo disvolvis - kun la Agrokombinumo de Komárom kaj IKR de Bábolna – novtipan sistemon por konservi, stoki maizon, nome la *frid-stokadon.* Pere de tiu sistemo, oni ne bezonas tiom sekigi la maizon, kiel oni faras por la tradicia konservado. Stokante la maizon en fridita aero oni ŝparas 30%-jn de la hejtmaterialo, krome eĉ pliboniĝas la internaj valoroj de la maizo. Por tiaspeca stokado estis disvolvita grajnofridilo, kies nominala frid-kapablo estas 100 tunoj dum 24 horoj –, kiam la temperaturo de la ekstera aero estas +23 °C kun 65%-a relativa humideco, kaj la maizo (kun 16%-a humideco) estas fridata ĝis 10 °C. Estas aten-

Tabelo 1.

TEKNIKAJ DATUMOJ

TIPO	Akvobezono m³/h			Povo de ventumiloj	Dimensioj Bazo mm	Alto mm	Akvo-alkonduko En	Akvo-alkonduko El	Maso kg Neta	Maso kg Funkcia
	Nom.	Maks.	Min.							
TVA-30	30	65	10	2 x 1,5	2850 x 1170	2460	80	80	650	1060
T TVA-40	40	75	15		2850 x 1560				800	1350
TVA-60	60	100	40	4 x 1,5	2850 x 2300	2460	2x80	2x80	1300	2100
TVA-70	70	110	45		2850 x 2700				1450	2400
TVA-80	80	120	50		2850 x 3100				1600	2700
TVA-100	100	140	80	6 x 1,5	2850 x 3840	2460	3x80	3x80	2100	3400
TVA-120	120	150	90		2850 x 4640				2 2600	4200
TVA-140	140	180	120	8 x 1,5	2850 x 5380	2460	4x80	4x80	2- 2900	4800
TVA-160	160	200	140		2850 x 6180				3200	5400

Tabelo 2.

TEKNIKAJ DATUMOJ

1.	Tipo			TVKA–40	TVKA–56	TVKA–80	TVKA–112	TVKA–160	TVKA–168	TVKA–240	TVKA–224	TVKA–320
2.	Nominala fridpovo kW 308 K (+35 °C) kondensado NH_3 291 K (+35 °C) humida temperaturo		kcal/h	240 000 280	336 000 390	480 000 560	672 000 780	960 000 1 120	1 008 000 1 170	1 440 000 1 680	1 344 000 1 560	1 920 000 2 240
3.	Frida surfaco		m^2	40	56	80	112	160	168	240	224	320
4.	Kompletiga akvobezono maks.		m^3/h	0,6	0,9	1,2	1,8	2,4	2,7	3,6	3,6	4,8
5.	Aervolumeno		m^3/h	27 000	27 000	42 000	54 000	84 000	81 000	126 000	108 000	168 000
6.	Statika aerpremo		Pa	140								
7.	Nombro de ventoliloj			2	2	2	4	4	6	6	8	8
8.	Nom. povo de elektromotoroj movantaj ventolilojn		kW	2 X 1,4		2X2,1	4X1,4	4X2,1	6 X 1,4	6 X 2,1	8 X 1,4	8 8X2,1
9.	Turnfrekvenco de ventolilo		frekv./min	1430		660/490	1430	660/490	1430	660/490	1430	660/490
10.	ventolilaj padeloj		ϕmm	630		1000	630	1000	630	1000	630	1000
11.	Cirkulita akvo 0,3 – 0,4 bar		m^3/h	25	40	50	80	100	120	150	160	200
12.	Dimensioj	Alto	mm	2688	2938	3288	2938	3288	2938	3288	2938	3288
		Larĝo	mm	2900								
		Longo	mm	1240			2440		3640		4840	
13.	Aliĝantoj NA	NH_3 premgaso		100			2 X 100		3 X 100		4 X 100	
		NH_3 likvaĵo		100			2 X 100		3 X 100		4 X 100	
14.	Akvokompletigo			1"								
15.	Akvoforigo			5/4"			2 X 5/4"		3 X 5/4"		4 X 5/4"	
16.	Akvo superfluanta			80								
17.	Maso (neta)		kg	1305	1580	1923	3160	3846	4740	5769	6320	7692
18.	Maso (malneta)		kg	1785	2060	2403	4120	4806	6180	7209	8240	9612
19.	NH_3 plenigaĵo		m^3	0,039	0,058	0,078	0,117	0,156	0,175	0,234	0,230	0,312
20.	Provpremo	per akvo	bar	27								
		per aero	bar	21								
21.	Funkcipremo maks.		bar	17								

deble, ke la Monda Banko per kredito financos la disvastigon de la grajnofridado en Hungario.

En la Kooperativo cetere estas ankaŭ fabrikataj: aerkurtenoj per unu, resp. du ventoliloj, amonio-filtriloj, fluo-indikiloj, kaj diversaj aliaj ekipaĵoj por la fridtekniko.

Ĝis nun la Kooperativo liveris opajn instalaĵojn al pli ol 20 landoj, resp. havas tie referencojn. La 400 laboruloj de la Kooperativo produktas jare pli ol duonmiliardon da forintoj.

Ankaŭ plu restas gravega tasko de la Kooperativo disvolvi daŭre sian teknologion, la produktadon kaj la produktaĵojn, ja nur tiamaniere eblas fabriki ĉie ajn bone vendeblajn varojn. La sukceson jam konfirmas la fakto: pli ol 70 procentojn de siaj produktoj la Kooperativo eksportas.

Entreprenista agado de la Fridteknika Industria Kooperativo

Antaŭ dek jaroj la Kooperativo kreis uzinon por surloka efektivigo de la fridteknikaj farendoj, kaj lige al ĝi ankaŭ entreprenistan sekcion. Ekigi la entreprenadon kaj surlokan muntadon iĝis tre necese pro la postuloj de la merkato; ja, la mendantoj forte bezonis dum investado kaj funkciado pli kompletan priservadon. Ni devis munti enigante niajn fridteknikajn instalaĵojn kaj aparatojn (kondensatoroj, aerfridiloj, ktp.) en – foje jam ekzistantan – kompletigendan fridteknikan sistemon kaj tiel ekfunkciigi ilin ĉar tio estis atendata de la investantoj.

La tasko de la entreprenista sekcio estis: krei kondiĉojn por efektivigi la kompletajn fridteknikaĵojn, postulatajn de la mendantoj. Ties bazo estas la altnivelaj produktaĵoj de la Kooperativo, ankaŭ ĝia granda produkta kapacito.

La celo estis ekigi la eksportadon de la fridteknikaj instalaĵoj por la fridejoj, buĉejoj, ktp., kunlaborante kun la ĉefentreprenistoj kaj entreprenoj pri ekstera komerco.

La projektadon de la fridteknikaj instalaĵoj ni komisiis al eminentaj, multspertaj institutoj pri teknika projektado (ÉGI, ÉLTERV, AGROBER, SZÖVTERV).

Mem la realigadon de la fridteknikaĵoj ni plenumas laŭ kontraktoj pri nia entreprenado, kiujn ni faris senpere kun la investantoj kaj funkciigontoj.

Multajn entreprenadojn ni plenumis enlande, precipe por la nutraĵindustrio (fabrikoj de biero, viandaĵoj, sukeraĵoj, frid-magazenoj, ktp.), sed ni laboris ankaŭ por aliaj, fridadon bezonantaj establaĵoj.

Surbaze de nia propra kapacito – fabrikado kaj muntado – ni entreprenis efektivigi kompletajn fridteknikaĵojn kaj mekanismojn, kunlaborante kun partner-entreprenoj. Fakte, tio signifas fabrikadon, transportadon, eksterlandajn aĉetojn, muntadon, izoladan laboron kaj ekfunkciigon. Tiamaniere jam realiĝis en Hungario kelkaj gravegaj fridteknikaj establaĵoj. Estu ĉi tie kelkaj el ili menciataj.

Frid-magazeno de leporbuĉejo, Környe

La stoka kapacito estas 100 vagonoj, en ĉambroj kun temperaturo -25 °C. La laŭetapa frostiga tunelo de tipo TATA, konstruita en la magazeno, fridas je -40 °C kun kapacito de 1 t/h; ĝi funkcias per du-ŝtupa fridaparato, kun amoniopumpilo.

DUNA Ĉokoladofabriko

Ni komplete rekonstruis la centran maŝinaron kaj kondensatorojn, kiuj klimatizas la laborejojn per sistemo de nerekta fridado (amonio-minusolo), kun fridpovo de 1500 kW.

Transita frid-magazeno por kortbirdopreparado, Győr

Estas stokebla kvanto da 500 vagonoj en ĉambroj kun temperaturo -25 °C. La tie konstruitaj du laŭetapaj, rapide frostigaj tuneloj havas kapaciton 2 t/h. En la preparejo ni efektivigis „FLUID" frostigilon, disvolvitan de MAHŰ.

Kortbirdo-preparejo, Szentes

La centran maŝinaron kaj kondensatorojn ni ne nur plene rekonstruis, sed ankaŭ kompletigis. Estis realigita frid-magazeno kun kapacito de 100 vagonoj kaj temperaturo de -25 °C. Ni muntis la fridteknikaĵon de la kontinue frostiga instalaĵo de tipo HOLIMA, kun kapacito 6 t/h kaj temperaturo -40 °C.

MAHŰ frid-magazeno – rekonstruado kaj kompletigo

Rekonstruado de la tie funkcianta manĝaĵo-preparejo (Mirelit) de la frid-magazeno, kaj kompletigo de la kondensator-grupo. Ni efektivigis novan frid-magazenon por kvanto de 1000 vagonoj, kaj temperaturo -25 °C. En la fridejojn ni enkonstruis 4 frostig-kamerojn kun kapacito 1 t/h kaj -40 °C.

FOTK frid-magazeno, Jászberény

Tiu ĉi havas kapaciton de 50 vagonoj en ĉambroj kun temperaturo -20 °C. Ĉiuhore estas frostigebla 1 tuno da varoj. La uzata frid-substanco estas „freon 22", en libere forvaporiĝanta sistemo.

Ĝi estis en la lando la unua granda frid-magazeno (kun frostiga tunelo), kiu uzas freonon. La kompletan instalaĵon – escepte la kompresorojn kaj aŭtomatismojn – la Kooperativo mem fabrikis kaj muntis.

Frid-magazeno de buĉejo, Keszthely

Plena rekonstruado de la tiea fridteknikaĵo, kompletigita per fridkapacito de 500 kW. Efektivigo de fridteknikaĵo en la frid-magazeno kun kapacito de 100 vagonoj kaj temperaturo -20 °C.

PHGT frid-magazeno, Albertirsa

Ĝi stokas en ses haloj kvanton da 750 vagonoj je temperaturo -25 °C. En la stokajn halojn ni konstruis 4 frostig-kamerojn, el kiuj du havas kapaciton de 1 t/h, la aliaj du tiun de 0,5 t/h, je -38 °C.

Ni efektivigis la tutan fridteknikaĵon de la preparejo, ankaŭ la klimatizadon je -10 °C, pere de frostigiloj fabrikitaj en Pollando. La perpumpila frostigilo funkcias kun amonia frid-substanco, je temperaturoj -10, -35 kaj -45 °C.

BOV frid-magazeno, Budapest, Kőér strato

En la lando la unua du-stupa, perpumpila frid-instalaĵo, funkcianta per frid-substanco „freon 22". Ĝi stokas kvanton da 50 vagonoj je temperaturo -20 °C.

Artefarita sketkampo, Pécs

Efektivigo de la kompleta fridteknikaĵo por 30 x 60 metra artefarita sketkampo. Ĝi taŭgas por konkuroj de arto-sketado kaj glaci-hokeaj ludoj. La frid-instalaĵo funkcias kun amonia frid-substanco en libere forvaporiĝanta, perpumpila sistemo.

Artefarita sketkampo, Győr

Similas al la sketkampo en Pécs, sed la frid-instalaĵo havas sistemon de nerekta fridado (amonio-minusolo).

Ni laŭkontrakte partoprenas apud ĉefentreprenistoj (EGI, AGROBER-AGROINVEST) la efektivigon de fridteknikaĵoj en frid-magazenoj, buĉejoj k.s., kies investadon organizas eksterlande laŭ internaciaj kontraktoj la entrepreno KOMPLEX.

Eksport-entreprenadoj

Liverado de kompletaj frid-instalaĵoj en Sovetunion

Laŭ kontrakto pri kunlaboro ni liveras en Sovetunion la kompletan frid-instalaĵon por frid-magazenoj, stokantaj 3000 tunojn da fruktoj:

en 1982 kaj 1983 kvar-kvar instalaĵojn.

en 1984 ok instalaĵojn, sed jam

en 1985 dekkvar frid-magazenojn ni devas ekipi.

Por mallongigi la daŭron de la surloka realigo, ni liveras kiel prete-muntitajn la kompresor-unuojn kaj la pumpilejojn, krome plejeble prefabrikante la tubo-tenajn aparatojn kaj krampojn.

Buĉejoj en Irano

Ekde 1980 ni komencis liveri la kompletajn frid-instalaĵojn por la buĉejoj establataj en urboj Moghan kaj Lurestan. Tiuj instalaĵoj priservas la tutan linion de la buĉado, per povo de 4500 kW klimatizante kaj fridante. La stokejoj estas malvarmigataj inter 0 kaj -20 °C gradoj.

Kortbirdo-preparejo por Ĉinujo

En 1984 ni liveris la frid-instalaĵon por kortbirdo-preparejo, kies kapacito estas 4500/h da brojler-kokidoj. Apud ĝi funkcias ankaŭ frid-magazeno por kvanto da 200 vagonoj, je temperaturo -25 °C. La preta varo frostiĝas je -45 °C en kontinua rapidfrostiga tunelo (pola produkto). La surlokan efektivigon helpas niaj fakuloj kiel konsilantoj.

Frid-magazenoj en Irako

Inter 1981–1984 ni efektivigis – laŭ kunlabora kontrakto – en diversaj urboj la kompletajn frid-instalaĵojn por 10 frid-magazenoj. Tio signifis liveradon de ĉiuj instalaĵoj, aparatoj kaj aŭtomatismoj, muntad-materialoj, krome ankaŭ la surlokan muntadon, izoladon kaj la ekfunkciigon. La taŭgajn cirkonstancojn por la eksterlanda muntado, ĉi tie devis krei mem la Kooperativo.

Kelkaj karakteriziloj de tiuj frid-magazenoj:

Magazenoj por terpomoj
(3 en Bagdado kaj Ramadi):
Stokeblo por 2000 t, la ĉambroj je +5 C gradoj. U nuŝtupa amonia sistemo.

Frid-magazenoj por lakto
(3 en Bagdado kaj Basrah):
Stokeblo por 50-100 vagonoj da lakto, je +5 C gradoj. Krome du-ŝtupa, perpumpila, kun amonio funkcianta fridigilo je -20 °C.

Frid-magazenoj GEEP
(4 en Bagdado kaj Basrah):
Stokeblo por kvanto da 1000 vagonoj, je +5 C gradoj; la frid-substanco estas „freon 22".

Por Algerio ni liveris en 1984 la frid-instalaĵojn por du kortbirdo-preparejoj. La surlokan efektivigon (muntadon) de tiuj frid-aparatoj ni plenumas ĉi-jare.

La kapacito de tiuj kortbirdo-preparejoj estas 3000/h da brojler-kokidoj. La frid-instalaĵo prizorgas malvarmigon por la tuta linio de la kortbirdo-preparado (prefridado, klimatizado, ktp.) per nerekta frid-sistemo per „amonia-minusol". Partoj de la tuta frida vico estas la aer-prefridilo kaj du rapidfrostigaj tuneloj. La preta varo estas stokata en ĉambroj je -25 °C.

Niaj entreprenadoj depost 1975 kontinue ampleksiĝis. En 1980 niaj enspezoj tiurilate estis 40 milionoj, en 1984 jam 70 milionoj da forintoj, sen la valoro de la instalaĵoj produktitaj de la Kooperativo. En 1984 el niaj entreprenadoj

60% estis plenumitaj enlande,
20% estis eksporto pagata per rubloj
20% estis eksporto pagata per internacie ŝanĝebla valuto.

En la pasinta periodo niaj entreprenadoj plenumiĝis ĉiam laŭ la fiksitaj terminoj kaj bonkvalite. Ankaŭ la teknika disvolvado, akomodiĝanta al la postuloj, kaj la altnivela agado de niaj laboruloj, kontribuas al la plua evoluo de la Kooperativo. Tiuj ankaŭ garantias atingon de la sekvaj celoj:

– Efektivigi „ŝlosilprete" la fridteknikajn entreprenadojn, fari tiujn laborojn pli kompletaj kaj teknike pli altnivelaj.

– Malpliigi la daŭron de la surloka teknologia muntado, liverante prefabrikitajn partojn, kiaj estas ekzemple la kontenera frostiga tunelo, kaj la valvogrupoj.

– Efektivigi termoutiligantajn, energioŝparajn sistemojn.

La Fridteknika Industria Kooperativo ankaŭ dum la venontaj jaroj nepre klopodos efektivigi la frid-teknikaĵojn laŭ postuloj de la mendantoj kaj funkciigantoj, senmanke plenumante la kontraktojn pri siaj entreprenadoj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Fridteknika Industria Kooperativo
H-2890 Tata II. Szomoródi út 4.
Telefono: /34/ 80-122
Telekso: 27-339

DESEGNAĴOJ DE JENŐ DALLOS



Kronometro



Sablohorloĝo

Epoko de konservaĵoj



GAJA PAĜO



Pli frue...

La fianĉino surpriziĝis, trovante sian fianĉon brakumantan parencinon duonnudan. Terure, terure! – ŝi kriadis lamente kaj elkuris.

– Kial vi nervoziĝas? – postkriis la fi-anĉo. – Nur post du horoj komenciĝos nia geedzigo!

Pli poste

– Sinjoro, mi jam petis vin, ne tiel spektakle amindumi! Mi estas ja edziniĝinta virino!

– Faras nenion. Mi ne estas ĵaluza.

Feliĉo

– Vi aspektas vere trankvila, amiko. Ĉu vi havas bonan edzinon?

– Male, mi havas nur amikinon. Ĉiusemajne dufoje ŝi *ne* venas – tiam mi tre feliĉas...

Venas la infanoj

– Paĉjo – entuziasmas fileto – mi sonĝis, ke vi donis al mi arĝentan dekŝilingon.

– Bone, ĝi restu la via, mi ne repostulos ĝin.

Lerni ĉiam eblas

Instruisto: Peĉjo, vi denove malfrue venis en la lernejon!

Peĉjo: Kompreneble, sinjoro instruisto! Panjo asertis al mi, ke lerni neniam estas malfrue.

Poet' naskiĝas jes ja...

– Depost du semajnoj mi lernas Esperanton. Depost unu semajno mi eklernis tajpadon. Do nun mi ektajpas Esperantan poemon, kaj mi certas, ke surpapere aperos genia verko.

Radio

– Sinjoro profesoro, mi ankoraŭ ne komprenas kiel funkcias la radio.

– Simile al la telefono, sed anstataŭ drato oni uzas aeron.

– Tre klare. Tamen, kiamaniere oni fiksas la aeron sur la telefonlinion tenantaj fostoj?

Emo al ĉevalproblemo

– Kara doktoro, sanigu mian edzon! Li imagas sin konkursĉevalo!

– Se estas tiel, la terapio estos longa kaj multekosta.

– Kosto ne gravas, ĉar monon ni havas: mia edzo jam triumfis en tri galopkonkursoj.

Memamo aŭ mamamo?

– Ej Roberto, kial vi tro alpremas vin al mia brusto?

– Sole por sentigi al vi la virecon de mia brusto, karulinjo.

Sen kontraŭemo

– Fraŭlino, ĉu vi kontraŭus, ke ni pasigu kune la nokton?

– Nu... tio neniam okazis ĉe mi...

– Ĉu vi do neniam pasigis kun viro...

– Kion vi pensas? Sed mi neniam kontraŭis tion!

Vireca estas la mondo

– Ĉu malplacas al via sinjora gusto mia modesta vestaĵo?

– Kial? Min ne ĝenas, fraŭlino, se vi aspektas vireca en vesto, se vi estos ineca sen vesto.

Ĝentila viro

– Mi intencas amindumi al vi, kara Klara!

– Do mi pripensos...

– Tamen se vi ne permesos, tion mi dankos!

Kiu postkuras?

Lola rakontas al sia amikino:

– Ho, kiel mi devis kuri hieraŭ, kiam knabo volis min kisi.

– Nu, kaj ĉu vi fine sukcesis atingi lin?

Modestulino

– Delonge mi ne vidis vin surstrate, kara Kristina!

– Mi jam ne volas interkonatiĝi, kial do mi eliru al la strato?

Donac' de Ignac'

– Kian surprizon vi prezentos je la naskiĝtago de via edzino?

– Verŝajne ian ĉapelon.

– Ne tro originala donaco, kara amiko!

– Vi pravas... Do mi donacos al ŝi pli originalan: la ĉapelon de mia avino!

Fraŭlo

Du amikoj renkontiĝas ĉe tramhaltejo.

– Olda fraŭlo! Delonge mi ne vidis vin! Ĉu vi jam edziĝis?

– Ankoraŭ ne.

– Sed kion vi atendas?

– La tramon!

Ervin *Fenyvesi*

DESEGNAĴOJ DE JENŐ DALLOS



Kronometro



Sablohorloĝo

Epoko de konservaĵoj



GAJA PAĜO



Pli frue...

La fianĉino surpriziĝis, trovante sian fianĉon brakumantan parencinon duonnudan. Terure, terure! – ŝi kriadis lamente kaj elkuris.

– Kial vi nervoziĝas? – postkriis la fi-anĉo. – Nur post du horoj komenciĝos nia geedzigo!

Pli poste

– Sinjoro, mi jam petis vin, ne tiel spektakle amindumi! Mi estas ja edziniĝinta virino!

– Faras nenion. Mi ne estas ĵaluza.

Feliĉo

– Vi aspektas vere trankvila, amiko. Ĉu vi havas bonan edzinon?

– Male, mi havas nur amikinon. Ĉiusemajne dufoje ŝi *ne* venas – tiam mi tre feliĉas...

Venas la infanoj

– Paĉjo – entuziasmas fileto – mi sonĝis, ke vi donis al mi arĝentan dekŝilingon.

– Bone, ĝi restu la via, mi ne repostulos ĝin.

Lerni ĉiam eblas

Instruisto: Peĉjo, vi denove malfrue venis en la lernejon!

Peĉjo: Kompreneble, sinjoro instruisto! Panjo asertis al mi, ke lerni neniam estas malfrue.

Poet' naskiĝas jes ja...

– Depost du semajnoj mi lernas Esperanton. Depost unu semajno mi eklernis tajpadon. Do nun mi ektajpas Esperantan poemon, kaj mi certas, ke surpapere aperos genia verko.

Radio

– Sinjoro profesoro, mi ankoraŭ ne komprenas kiel funkcias la radio.

– Simile al la telefono, sed anstataŭ drato oni uzas aeron.

– Tre klare. Tamen, kiamaniere oni fiksas la aeron sur la telefonlinion tenantaj fostoj?

Emo al ĉevalproblemo

– Kara doktoro, sanigu mian edzon! Li imagas sin konkursĉevalo!

– Se estas tiel, la terapio estos longa kaj multekosta.

– Kosto ne gravas, ĉar monon ni havas: mia edzo jam triumfis en tri galopkonkursoj.

Memamo aŭ mamamo?

– Ej Roberto, kial vi tro alpremas vin al mia brusto?

– Sole por sentigi al vi la virecon de mia brusto, karulinjo.

Sen kontraŭemo

– Fraŭlino, ĉu vi kontraŭus, ke ni pasigu kune la nokton?

– Nu... tio neniam okazis ĉe mi...

– Ĉu vi do neniam pasigis kun viro...

– Kion vi pensas? Sed mi neniam kontraŭis tion!

Vireca estas la mondo

– Ĉu malplacas al via sinjora gusto mia modesta vestaĵo?

– Kial? Min ne ĝenas, fraŭlino, se vi aspektas vireca en vesto, se vi estos ineca sen vesto.

Ĝentila viro

– Mi intencas amindumi al vi, kara Klara!

– Do mi pripensos...

– Tamen se vi ne permesos, tion mi dankos!

Kiu postkuras?

Lola rakontas al sia amikino:

– Ho, kiel mi devis kuri hieraŭ, kiam knabo volis min kisi.

– Nu, kaj ĉu vi fine sukcesis atingi lin?

Modestulino

– Delonge mi ne vidis vin surstrate, kara Kristina!

– Mi jam ne volas interkonatiĝi, kial do mi eliru al la strato?

Donac' de Ignac'

– Kian surprizon vi prezentos je la naskiĝtago de via edzino?

– Verŝajne ian ĉapelon.

– Ne tro originala donaco, kara amiko!

– Vi pravas... Do mi donacos al ŝi pli originalan: la ĉapelon de mia avino!

Fraŭlo

Du amikoj renkontiĝas ĉe tramhaltejo.

– Olda fraŭlo! Delonge mi ne vidis vin! Ĉu vi jam edziĝis?

– Ankoraŭ ne.

– Sed kion vi atendas?

– La tramon!

Ervin *Fenyvesi*



LA EBENO

Ni citas el la samtitola poemo de *Sándor Petófi:* „Sur marplata region' Ebena / estas mia mondo, hejmpejzaĝo..." La daŭrigon vi trovos en linioj H.1. kaj V.34. (ensendendaj linioj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn. *Limdato:* du monatoj post la apero.

Horizontale: **12.** Antaŭrandaĵ' de kapvesto. **13.** Antaŭsciigi kaj atentigi. **14.** Alfabeto. **15.** Estro de la katolika eklezio (R). **17.** Plibeligi per aldonaj detaloj (R). **18.** Ne ekzistanta, nenioma. **19.** Rapidege paŝus. **21.** Nerva kuntiro de vizaĝaj muskoloj. **22.** Instrumento. **23.** Aŭtoro de „Hungaraj fabeloj", eldonita de HEA. **25.** Demandvorto. **26.** Reen: komparativa konjunkcio. **27.** Rivereto. **28.** Land' en oriento de la Araba Duoninsulo. **30.** Identaj konsonantoj. **31.** Solena cirkuler' de la papo. **32.** Malliberej'. **34.** Malpliiĝo de la ruĝaj sangoĉeloj (R). **35.** Abomeninda, naŭza. **36.** Virina nomo. **37.** Kaŝi per surmeto de io. **39.** Situanta ĉe fino de la lando. **40.** Landa Societo. **42.** Estona poetino kaj tradukisto (Ellen). **43.** Pli malpli klara scio. **44.** Peter Peneter. **46.** Vokaloj de Monika. **48.** Blanka venena fungo. **50.** Vertikala konstruaĵo (R). **51.** Deziro havi ion de aliulo (R). **53.** Produkti akran bestan sonon. **54.** Vegetaĵo el kiu oni produktas sukeron. **55.** Taĉmento de aviadistoj (R). **57.** Poemo pri alteflugaj ideoj. **58.** Fortika, solida, kompakta (R). **59.** Membrano de la okulglobo (R). **61.** Urbo en Svisujo, kantona centro (Esperantigita formo).

Vertikale: **1.** Homo havanta surdorse elstaraĵon. **2.** Apartiĝo de aliaj (poemaro de Kalocsay). **3.** La... Literatura Revuo. **4.** Plenda ekkrio. **5.** Paŝi (R). **6.** Maldolĉe. **7.** Kemia simbolo de tantalo. **8.** Komenco de evoluo! **9.** Kapabla facile fari ion (R). **10.** Plurjara herbo, kulturata ankaŭ en rokĝardenoj (R). **11.** Komencis batalon. **12.** Tropika herbo, kulturata pro ĝiaj bonodoraj fruktoj. **15.** Sekvo de malpermesita faro. **16.** Hontema. **19.** Ligna aŭ metala peco por kunfiksi du partojn (R). **20.** Disĵeti grajnojn sur agron. **23.** Rilata al Sud-Amerika lando. **24.** Proteino el lakto. **27.** Fortan alkoholaĵon. **29.** Regulo por unuecigi fabrikaĵon. **31.** Buŝ' de birdoj. **32.** Eligi urinon (R). **33.** Poseda pronomo. **35.** Mita leĝo pri neeviteblaj okazontaĵoj. **38.** Skribu konsonancon al verso! **39.** Konsulti la sorton. **41.** Muzika ritmo-figuro (R). **43.** Malsupra ĉeftrabo de ŝipo aŭ boato. **44.** Prostituitino. **45.** Ago por kontroli. **47.** Tro ŝpari. **49.** Pasto el faruno kaj ovo (R). **50.** Sendita informo (R). **52.** Naskiton. **54.** ...Literatura Krestomatio. **56.** Tradicia, solena maniero de ceremonio (R). **58.** Malŝate ridindigi (R). **60.** Prepozicio por kvanto. **61.** Artikolo.

István *Takács*

Solvo de la krucenigmo en la *n-ro 1985/2:*

Poet' naskiĝas, jes ja,
Kaj nenio
Vin poetigos manke de genio.

(C.E.R. Bumy)

Premion gajnis per lotumado: *Ertl* Krisztina, Budapeŝto, H.; s-ro Max *Hillebrand,* Jablonec, CS kaj s-ro B.D. *Kaneen,* Vancouver, Kanado.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Febro

de István Nemere

En tiu ĉi verko de la populara esperantista prozisto kombiniĝas elementoj de amromano, psikologia kaj detektiva romanoj. Nemere scias kateni la atenton de la leganto ĝis la lasta paĝo.

1. Kiel nomiĝas la edzo de Anna?
2. Al kiu lando ŝi vojaĝis kun la edzo?
3. Kio estas la profesio de la amanto de Anna?

Limdato por respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
En la n-ro 1985/5: István Nemere: Sur kampo granita.
En la n-ro 1985/6: Károly Aszlányi: Sep vangofrapoj.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1985/2:

1. En hotelo „Brizo" loĝis Adéle, Klara, Leo kaj Emil.
2. Leo diris: „Esperanto estas nia lingvo, kaj al neniu mi permesas blasfemi ĝin."
3. Klara senspure malaperis dum la festo de Pozidono.

Premion gajnis per lotumado: *Csapó* Anna, Békés, H. kaj Roma *Torsin,* Kopenhago, DK.
La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Leterkesto

Adolf *Staňura,* Havířov, CS: Ni do konsentas jam, ke la s-anon *„oni nomas Petro"*, ankaŭ ke *„li nomiĝas (aŭ nomatas) Petro"*, se oni mencias lin. Konsenti ni tamen ne povas pri tio, ke nur dum nomdono (ekz. bapto) oni estas „nomata", ĉar *nomi* sencas „signi iun per nomo" (PV, PIV), kaj *nur* la 4a difino aludas pri nomdono originala. Ĉu escepta gramatikaĵo, ĉu akceptinda formo, nia lingvo akceptis la suprajn formojn. Via preferata formo: *mi nomitas* fakte ŝajnas ankoraŭ stranga, ja oni neniel kutimas ĉiutage aludi la momenton de la baptado. Ni esperas per tio fermi la interesan diskuton.

Szendi István jun. Debrecen, H: Kun intereso ni legis la tradukon el la „Konsolo de la filozofio" de *Boecio,* kiun vi brave faris el la E-a tradukaĵo de la originala latino, farita de la eminenta literaturisto *Albert Goodheir.* Akceptu nian dankon!

Bálint István, Kecskemét, H: Nia veterana s-ano tute prave vokas pro la teruregа minaco de la nuklea infero, kiun eĉ simpla (?) akcidento povas malbridi. Por eviti tion ekzistas neniu alia alternativo krom la konfido-plena interkonsento por iri la vojon likvidi atomarmilojn, kaj pli al senarmigo ĝenerala. Tre-tre serioze avertis nin pri tio i.a. ankaŭ Internacia kongreso de la kontraŭnuklea kuracistaro kune kun WHO, la prisanitara mondorganizo de UNO.

Aldo *Formaggio,* Chiavari, I: Se vi esprimas miron pro la granda plenumo de la E-a libroeldonado en Hungario, tio kompreneble igas nin tre kontentaj. Dank' al la tutmonda legantaro, nia eldona agado estas daŭre instigata, ankaŭ pro la mendoj, pro kiuj verkoj foje plene forigas el la kelo de HEA. Do, feliĉe, vi ne devas timi de ia grava reduktiĝo koncerne nian eldonan agadon. Pri vojaĝo al la Pekina kongreso venontjare, kio estas ja ebla, ankoraŭ detalojn ne eblas prezenti. Korajn salutojn!

Korespondi deziras

F-ino Tatjana *Ivanova* (19) oficistino, kol. bk, muzikaĵojn. *Silistra,* D. Donĉev-bl. Avrora-4/25. BG-75000. – Vasko *Iliev* (19) lernanto pri sporto, kino. *Silistra,* C.-Staro Selo, BG-75000. – F-ino Danuta *Kletkiewicz* (26) ktm, prefere hungaroj, pĉt. *Bobrowniki n.W,* PL-87-617. – Renata *Kamińska* (20) kemiistino, pri literaturo, poezio, vojaĝoj. *Skierniewice,* ul. Mazowiecka 43a, PL-96-100. – S-ino Czeslawa *Wilke,* mezaĝa s-anino, kun hungaraj ges-anoj. *Gniezno,* ul. Budowlanych 27A/9. PL-62-200. – *Filippov* Nikita k Irina (28-27) pri muziko, foto, sporto; trikado, modo, kun juna familio. (Baŝkiria urbo) *Salavat,* str. Lenina 27/10-78. SU-453.200. – Sergej *Derevjannik* (20) medicinisto kun gejunuloj pri moderna junularo. *Ufa,* prosp. Oktabrja 176/1-145. SU-450.055. – Anna *Terzieva* (44) ekonomikistino, pri turismo k.a. kaj Krasimir *Kirilov* (39) instruisto, pri turismo, futbalo. *Silistra,* SST-Dobruĝa, BG-7500. – Halina *Koczubik* (42) edzino, oficistino, pri kulturo, kutimoj de landoj, literaturo, muziko k.s. *Chorzów,* ul. Koniewa 7/177. PL-41-500. – Suzana *Gál* (17) lernantino, pĉt, ktm. *Sopron,* Vörös Hadsereg ú. 8. H-9400. – *Gudilin* Sergej (30) laboristo, ktm, pri moderna muziko, fotografio (ne kolektanto). *Bratsk,* Pk. 2161, SU-665.728 (ĝustigo de adreso en n-ro 1985/1). – *Fedotov* M. Nikolao (39) pri turismo, interŝ. bk, k.a. *Sańti,* str. Surfovaja 138, SU-346.518. – *Gyarmati* Péter (30) inĝeniero kaj edzino Piroska, instruistino, havantaj du gefilojn, kun junaj geedzoj, prefere en Italio, Francujo kaj Nederlando. *Miskolc,* Győri kapu u.8. H-3531. – *Dačiulytė* Danuté (17) litovino, int. muziko, lingvoj, bk, pm – certe resp. *Kupiškis,* Lauko 66. Litovio, SU-234.880. – F-ino *Ivanova* Nataŝa kun angloj aŭ francoj, ankaŭ franclingve, pri muziko, literaturo, ĵurnalismo, kol. monerojn, glum. *Lesosibirsk* (Krasnojarsk-reg.) Gorkego 83-11. SU-663.131. – Elzbieta *Chrominska* (27) ekonomikistino, int. pri muziko, filmoj, turismo, kol. bk. *Skierniewice,* ul. Mszczonowska 47/8. PL-96-100. – Inese *Tomaša* (22) ktm, pri junularaj temoj, kol. bk, pm, kalendaretoj, resp. garant. *Vecpiebalga,* Latvio, SU-228.540.

Lukoševičienė Palmira instruistino, kol. E-pm kaj pm de Nobelpremiitoj, rekomp. laŭ interkonsento. *Panevėžys,* Radastu 22-2, Litovio, SU-235.300. – *Kovnators* Naumo pri kuirarto, historio, literaturo, instrumetodoj, kol. bk, E-aĵoj, mapoj. *Aluksne,* Omskas 16-2, Latvio SU-228.730. – Katarzyna *Gasiorowska* (16) lernantino interŝ. bk kun samaĝuloj el tm. *Torun* ul. Dziewulskiego 11 B/32, PL-87-100. – *Avdik* Elena (29) pedagogo, int. pri arto, kino, turismo, lingvoj, ĉiutaga vivo, ktm. *Grodno* Dom Svjazi, poŝtrestante, SU-230.025. – Wanda *Grabowska* (32) ktm. *Skierniewice* ul. W. Wasilewskiej 10/14. PL-96-100. – *Gerasimova* Marina (31) ktm pri turismo, mod. muziko, foto, lingvoj k.a. *Kirov* Lenina str. 15-203, SU-610.004. – Ivan *Oginskij,* (34) ktm, pĉt. *Lielborne p.* Latvio, SU-228.443. – *Gelernantoj* (12-17) kun samaĝuloj tm. „Stelo de l' Espero" E-rondo, *Čelabinsk* Dvorec Pionerov, SU-454.000. – Sólange *Rodriguez da Rocha* (17) pri desegno, literaturo, bk, SHCE/ /S, Q.609 B1.B ap. 204. *Brasilia*–DF 70.650.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Arta redaktoro: **Oszkár Böhm.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István Laszló, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, Józsefnádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de HEA 85-0261
Indexszám 25 377 ISSN 0018–7704

VIA DOMMASTRO EN BUDAPEŜTO:
BUDAPEST TOURIST

La vojaĝoficejo de l'ĉefurbo

Uzu niajn servojn

- organizado de grupoj vojaĝoj
- organizado kaj aranĝado de kongresaj vojaĝoj
- organizado de vojaĝoj
- entreprenoj kaj premiaj vojaĝoj
- interpretistaj servoj
- servo de privataj ĉambroj

IDEGEN-FORGALOM

Turisma
Propaganda k
Eldona
Entrepreno

Magyar Konyha

UTAZÁSI MAGAZIN
Túrázás · Szórakozás · Üdülés

NIMRÓD

jó utat
autós magazin

Autósélet
A MAGYAR AUTÓKLUB LAPJA

NR NIMRÓD rejtvényújság

Magyar Hírek